88/2. * 16,-Ft

HUNGARA VIVO

Sopron, loĝkvartalo Jerevan

Sopron, loĝkvartalo József Attila

Tatabánya, loĝkvartalo (nia kooperativo faris ia struktur-konstrŭon)

HUNGARA VIVO

ENHAVO

Zeley, L.: La scienculo ne regu, kiel ankaŭ ne iu alia (György *Nanovfszky*) 42
Révész, S.: Faktoj, timoj kaj esperoj pri Hungario 5 46
Ternavski, M.: Du poemoj . . 49
Arany, J.: Toldi (Márton *Fejes*, d-ro Miklós *Fehér*) 50
Ambrus, Z.: Casanova 53
Por atingi pli multajn 58
Librovendoj – 1987 59
Panoramo 60
Fenyvesi, Ervin: Revuo de revuoj 63
Korĵenkov, A.: Pri la Esperanta kritiko 65
Aŭtomataj mezurinstrumentoj 69
Benczik, V.: Ĉefverko esperantologia 72
Aŭdaca libro dulingva 74
Recenzoj 75
Fenyvesi, Ervin: Gaja paĝo 78
Krucvortenigmo, Ekzameno sen risko 79
Leterkesto, Korespondi deziras 80

Sur la frontpaĝo foto de Zoltán *Fejér*.

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso:
Budapest, I. Szentháromság tér 1-3.
Telefono: 563-659, 564-093
Poŝta adreso:
Pf. 193, H-1368 Budapest
Aperas dumonate
XXVIIa jaro, 1988 n-ro 2 (138)
MÉMMI, Gödöllő, 1988/115

Meze de printempo...

Vintron, kiel ajn longan, sekvas certe printempo – eĉ la jus foriĝintan vintron, kiu montris misan aspekton tra granda parto de Eŭropo, kvazaŭ naŭza kaj malvintra. Ĝi venis kaj pasas for, dume neglektinte regali nin per neĝaj gajecoj, per blankaj plezuroj. Kiam mi skribas tiujn ĉi vortojn, estas ankoraŭ fino de marto, kaj deprofunde mi deziras urĝe forgesi la molestadojn de tiu ĝene pluva vintro, por ĝui la venon de verdiga printempo. Feliĉe varmigas rememoroj, estis „verda" nia somero kun escepte grandioza centjariĝo, kun jubileo en Varsovio, kie kunven(eg)is ankoraŭ neniam vidita grandnombra esperantistaro. Estis forpelitaj la eraraj pensoj pri nia aŭtuno...

Esperigaj sukcesoj, kiuj atentigis tra la mondo la publikon (en impona grado, antaŭe ne atingita) pri la valoroj de la vera internacia lingvo, atendas pluan firmigon. La *Jubilea Jaro* ne ĉesis, la somera Universala Kongreso en Roterdamo havos la festan rolon fini ĝin. Tamen nur la Jaron, ne la *Jubilean Jardekon,* la pluajn korvarmigajn jubileojn: la ĉi-jare centjaran kreon de la unua Esperanto-societo en Nurenbergo (pri kies daŭra ekzisto nia revuo kelkfoje jam informis); la centjariĝon de la Esperanta gazetaro (1889, *La Esperantisto*), la 80-jaran jubileon de UEA kaj la sekvajn aliajn, solenotajn lande kaj loke. Taŭgaj okazoj por altiri nove-denove atenton al la viva Esperanto, por plivastigi la utiligeblon de nia plezure praktikata komunikilo. Kaj samrajte eblas diri: akiri pli vastan komunikeblon por plezurdonaj utiligoj.

Por tiuj indas ja agi, ne nur atendi, sed ankaŭ kontribui, venos baldaŭaj okazoj kunesti. Veturoj inter landoj kirlos ankaŭ la societan vivon; novaj eldonaĵoj, beletraj kaj fakaj libroj tiklos frandemulojn kaj lernemulojn sur la librojn proponantaj tabloj. Denove svarmos nia vastiĝanta verda popolo.

Ervin Fenyvesi

LA SCIENCULO NE REGU, KIEL ANKAŬ NE IU ALIA

Konversacio de László Zeley kun Ede (Edward) Teller en Stanford

La mondfama hungara scienculo, troviĝanta preskaŭ ĉiam en la fokuso de disputoj, aktiva partoprenanto de la usona programo de atom- kaj hidrogenbombo, unu el la ĉefaj pledantoj por la Strategia Defenda Iniciato *(SDI), festis sian 80-jariĝon la 15-an de januaro 1988. Laŭ nia informo ĝis nun li ne donis intervjuon al ĵurnalisto el socialisma lando. Dank' al interveno de usonaj kolegoj, li akceptis la aŭtoron de tiu ĉi intervjuo en sia apartamento, situanta en la universala kvartalo de Stanford, la 12-an de septembro 1987. Lian deziron, ke oni devas publikigi la intervjuon donitan de li sen ŝanĝo de eĉ unu vorto, ni respektis, kvankam li bone scias, ke en multaj aspektoj ni ne konsentas kun li. La intervjuo estis farita en la hungara lingvo.*



Sinjoro profesoro, vi naskiĝis la 15-an de januaro 1908 en Budapeŝto. En perspektivo de okdek jaroj, kion signifas por vi esti hungardevena, ja vi kunlaboris kiel amiko kaj kolego kun tiel elstaraj scienculoj, kiel Jenő Wigner, Leo Szilárd, Tódor Kármán, János Neumann.

Grandiozaj homoj, eminentaj homoj! Kun Jenő Wigner ni foje eĉ publikigis komunan verkon. Ni ĉiuj estis bonaj amikoj. Tódor Kármán faris multe sur la kampo de esploro, evoluigo de aviadiloj; eble inter ni ĉiuj li havis la plej gravan rolon, ĉar tion, kion li kapablis fari dum la kontraŭnaziisma milito, oni ege bezonis siatempe. Leo Szilárd estis la iniciatinto de atombombo. Mi jam bone konis lin eĉ antaŭe. Li estis spertulo pri ĉio, krom stiri aŭtomobilon... Pro tio, en aŭgusto de 1939, li petis min veturigi lin al Einstein. Ili skribis leteron al Roosevelt, pli ĝuste, la letero estis tajpita de Szilárd, Einstein nur tralegis kaj subskribis ĝin. Tio okazis ankoraŭ antaŭ la milito. Kiam Roosevelt ricevis la leteron, Pollando jam estis dispartigita. Jene komenciĝis tio, kio fariĝis tre serioza, tre malfacila parto de mia vivo. Jenő Wigner projektis la unuan nuklean reaktoron. Tiu energiofonto de la estonto originas el liaj ideoj. Se li ne iniciatus tion, eble aliaj kreus ĝin alie. Sed tion, kion li kreis, li faris tre bone. Sendepende de tio, li krome komentariis la nukleojn, kio estas nur unu el liaj „bagatelaj" atingaĵoj. Kaj Joĉjo Neumann: li scipovis fari iun ajn laboron dum mallonga tempo. Li estis la plej saĝa, la plej rapida. Ĉu matematiko, ĉu io alia, li komprenis, sciis ĝin. Tamen li mortis la unua inter ni, antaŭ tridek jaroj. Mi ne scias, ĉu facilas esti hungaro, kiam miaj hungaraj amikoj faris tiel multe?!

Sinjoro profesoro, permesu al mi flankan demandon, kiu nur ŝajnas esti flanka. Vi menciis, kvazaŭ emfazite, la aviadon inter la inventoj de la jarcento. Ĉu mi komprenas bone aŭ erare?

Emfazite pro tio, ĉar la dua mondmilito okazis en la mezo de mia vivo. Ĝi estis la krizo, ĝi estis la granda danĝero. Kaj en tiu milito havis decidan rolon la aviadiloj. Sen Tódor Kármán, hodiaŭ ni vivus en la mondo de Hitler, aŭ pli ĝuste, ni ne vivus.

Sinjoro profesoro, laŭ vi, do la aviado difinis la sorton de la dua mondmilito. Ĉu finfine ne la atombombo kapitulacigis Japanion? Kia estis via rolo en la realigo de la atombombo, kaj kia estis via rilato al Oppenheimer, speciale koncerne la uzon aŭ neuzon de la atombombo?

Do, bedaŭrinde, oni uzis la bombon. Se oni estus povinta anticipe demonstri al la japanoj la forton de la bombo, hodiaŭ oni povus konstati: ni finis la mondmiliton demonstrinte la povon de la scio, sen mortigi iun ajn, tiukaze hodiaŭ ni vivus en pli bona mondo, pli sekura mondo, en mondo, kie la intelekto havus pli, kaj la ekscito malpli da loko. Bedaŭrinde, okazis alie. Rilate al tio, jen, historio, kiun, eble, valoras rakonti kaj aŭskulti. Leo Szilárd proponis, ke ni ellaboru la atombombon. Ni jam preskaŭ estis pretaj – ĉirkaŭ la unua de julio 1945. Mi mem estis en Los Alamos, kiam ni pretigis nin elprovi la unuan atombombon en Nova Meksikio. Tiam ve-

nis letero de Szilárd el Chicago. Li anoncis, ke li kun aliaj pritraktas la aferon: kion fari nun, kiam Hitler jam estas venkita, kaj oni jam preskaŭ havas la atombombon. Multaj konataj fizikistoj, James Franck kaj aliaj subskribis alvokon, leteron al la prezidento de Usono: oni ne uzu la bombon tuj, unue necesas demonstri ĝian efikon. Eble tiam la japanoj packontraktos. Eble oni sukcesos fini la militon sen plua masakro. Eĉ mi mem volis subskribi tiun peticion, sed Szilárd havis pluan proponon. Li volis, ke mi interparolu ankaŭ kun aliaj en Los Alamos, kaj ke mi kolektu pli da subskriboj. Mi pensis, ke mi ne rajtas fari tion sen demandi la direktoron, Oppenheimer. Oppenheimer estis fizikisto, estis saĝa homo, li montris sin amiko, mi konis lin kiel amikon. Mi vizitis lin. Li diris, ke tion ni ne povas kompreni, ĉar ni estas fizikistoj, laborantaj en la propra profesio. La homoj en Vaŝingtono devas tion bone pripensi. Ili scias kion fari, estas pli bone ne enmiksiĝi en tiun aferon. Kvankam mia decido, farita surbaze de tiu interparolo, ne havis konsekvencojn, tamen ĝis nun mi bedaŭras pri ĝi. Mi sentis tiel, ke Oppenheimer pravas: la respondeco, nome kion fari per la atombombo, ne koncernas nin. Mi respondis al la letero de Szilárd, kaj mi ne subskribis la peticion. Post kelkaj monatoj mi eksciis, ke tiam, kiam Oppenheimer parolis kun mi, li mem jam kondutis tute alie. Oni demandis lin kaj aliajn unuarangajn fizikistojn: kion fari per la atombombo? Oni demandis al Fermi en Italo, al Ernest Lawrence kaj al Arthur Compton. Fermi, Lawrence kaj Compton ne volis uzi la atombombon. Oppenheimer volis. Li estis tre bona debatanto, li konvinkis la aliajn tri. La bela libro de A. Compton: *Atomic quest* („La serĉado de la nukleo" aŭ „La utiligo de la nukleo")enhavas. Pri ĉio ĉi mi eksciis jam post Hiroŝimo. Tiam mi eksentis, ke mi agis erare. Estis eraro ne fari. Se oni eĉ ne estus atentintaj mian subskribon, tamen, mi estus devinta subskribi ĝin. Kaj poste mi eksciis multe. Hodiaŭ oni jam konas laŭ la historio la konsekvencojn de Hiroŝimo, nome, kiom da homoj pereis. Estis terure, sed tio ne kaŭzis al ni grandan surprizon. Tio, kion mi eksciis per tio, estis la fakto, ke Oppenheimer neniel pravis. Kiam la sciigo alvenis el Hiroŝimo al Tokio, la japana milita komitato voĉdonis pri tio, ĉu oni nun finu la militon. Tri membroj voĉdonis por, tri membroj kontraŭ. Antaŭ la okazintaĵoj en Hiroŝimo la du triopoj havis precize la saman opinion. Hiroŝimo tion ne influis. Ĝi influis tion nur en unusla aspekto. Hirohito, la japana imperiestro, adepto de la mallaŭta pacpartio, nomumis tiujn anojn de la komitato, kiuj tiutempe jam sopiris al la paco. Laŭ la japana leĝo la imperiestro estas Dio, sed li ne rajtas paroli, ĉar per tio li malobservus la leĝon. Li rompis la leĝon kaj parolis, kaj tio haltigis la militon. Do, mi demandas min: kio estus okazinta, se ni estus ĵetintaj la bombon sen mortigi amason da homoj? Ni estus povintaj eksplodigi la bombon je la alteco de dek mil metroj, tiamaniere, ke ĝi estu videbla de iu ajn ĝis la distanco de dek mejloj, por fari tondregon kaj mortigi neniun. Oni estus povintaj fari tion super la golfo de Tokio. La imperistro tiel povus vidi ĝin, tamen ni agis alimaniere, kvankam tiu ĉi maniero estus la ĝusta elekto. Do, mi ripetas: tiam mi kulpis grandan eraron, kvankam mia eraro ne povis rezultigi konsekvencojn. Tamen ĝi estis eraro. En mia metio mi devas labori kiel nura specialisto, sed se mi scias ion, kion la aliaj ne scias, mi devas diri tion al ili. Ke la atomarmiloj havas grandajn eblojn, pri tio ni, fizikistoj, pensis siatempe pli ofte ol aliaj. Niaflanke estus pli oportune mencii, ke oni devus unue demonstri tiujn eblojn. El ĉio ĉi mi konkludis: mia tasko estas kompreni, kion eblas fari, ke mi faru tion, kion mi povas fari, kaj ke mi klarigu, kio eblas. Silenti tiam, kiam mi scias ion kaj aliaj ne scias tion, estas neĝuste. Mi laboris en la realigo de la atombombo, tion mi ne bedaŭras. Kaj se ni ne inventus ĝin? Mi scias, la rusoj jam laboris pri ĝi, kaj ankaŭ ili pravis. Ankaŭ la germanoj laboris pri ĝi, kaj ni timis tion. Hodiaŭ oni jam scias, ke Heisenberg, mia profesoro, laborante pri ĝi, faris kvazaŭ nenion alian, nur erarojn. Kvankam kutime li neniam eraris. Mi suspektas, ke li ne volis labori por la nazioj. En Rusujo Kurĉatov bone progresis. Se ni ne estus farintaj la atombombon, ĝi estus realigita ankaŭ sen ni. Ni uzis la bombon por fini la militon, kion ege ni bezonis. Fini la militon alimaniere, estus eĉ pli oportune. Oni kapablus turni la militon eĉ sen bombo, sed per multe pli da sangverŝado. Estis pli oportune uzi la bombon ol fari demarŝon en Japanio, sed estus eĉ pli oportune unue montri la bombon.

Sinjoro profesoro, el tia logiko por mi estas du konkludoj. La unua, ke estus pli oportune unue prezenti la bombon, kaj la dua, ke per la realigo de la bombo, kio estis farita poste ankaŭ de la sovetia flanko, komenciĝis tia sinarmada spiralo, kiu eĉ nun tenas la homaron en timo, naskas malkonfidon. Kio kondukis vin al la vojo, per kiu vi fariĝis konata kiel la patro de la hidrogenbombo? Vi rakontis al ni pri viaj duboj koncerne la uzon de la atombombo. Kio tamen instigis vin havi decidan historian rolon en la realigo de la hidrogenbombo?

Ne tamen, sed pro tio. Mia tasko estas scii tion, kion eblas scii. Fari tion, kion eblas fari. Diri tion, kion mi komprenis. Dum oni laboris pri la atombombo, klariĝis por mi, klariĝis jam en 1942, ke oni povas uzi atomenergion ne nur per „nuklea fisio", sed ankaŭ per „nuklea fuzio". Kiel oni diras angle, estas eble realigi ne nur *fission,* sed ankaŭ *fusion*. Mi eĉ tion sciis, ke tiu eksperimento estos verŝajne sukce-

sa. Kaj tion, kiel ĝi povas fariĝi sukcesa. Oni haltigis la laboron en 1945, kvankam mi neniam aprobis ĉesigi ion jam komencitan. Oni devas ĝin fini, oni devas ĝin kompreni, oni devas ĝin realigi. Kion fari poste per ĝi, tio jam estas la sekva demando. Sed ni ĉesigis la laboron en 1945. En 1949 la rusoj realigis sian atomarmilon. Tio kaŭzis grandan surprizon por la plej multaj homoj. Mi havis la opinion, ke post tio oni jam ne povas kaj ne rajtas prokrasti la pluajn esplorojn. Mi opiniis, ke la nescio neniam rezultigas sekurecon. Tiu mia opinio havis ankoraŭ unu specialan kialon. Ankoraŭ en 1945, post Hiroŝimo, Stalin deklaris: ankaŭ la rusoj havos atomarmilon. Kaj li diris, ke ili havos eĉ pli. Mi supozas, ke mi jam tiam komprenis, pri kio pensas Stalin. En 1949 mi jam ne povis halti, ne povis dubi, estis necese „scii". Aliaj, multaj – eĉ multaj miaj amikoj – diris, kio sufiĉas, tio sufiĉas. Se ni ne kreos la hidrogenbombon, la rusoj neniam kreos ĝin. Ili malpravis. Nun la faktoj jam estas konataj: en la unua duono de 1948 Saĥarov – la granda kaj brava rusa fizikisto – jam komencis labori rezultoplene pri la hidrogenbombo. Ili finis sian laboron proksimume tiam, kiam ni. La argumento, se ni ne kreos la bombon, ankaŭ la rusoj ne kreos ĝin, tutevidente havis nenian bazon. La hidrogenbombo tamen havas unu avantaĝon. Neniu, neniam uzis ĝin. Neniu, neniam ĵetis ĝin. Almenaŭ ĝis nun ne. Estu tiel ankaŭ en la estonto. Oni devas scii ankaŭ tion, kion oni faras poste per la scio, ja ankaŭ tio gravas, eĉ gravegas. Kaj tio jam estas afero ne nur de la scienculoj, sed la afero de ĉiuj. Afero ankaŭ de la politikistoj, eĉ specife de la politikistoj. Kaj ĉar en demokratiaj sistemoj ĉiuj influas la politikistojn, tio do estas la afero de ĉiuj.

Sinjoro profesoro, se oni sekvas tian logikon, kiamaniere vi respondos al mia sekva demando? Vi estas unu el la pledantoj por la programo SDI – ĉe ni oni nomas ĝin strategia defenda inciiato. Eĉ tion ni supozas scii pri vi, ke vi estas la konsilanto de Reagan en tiu ĉi afero. Kial vi rigardas tiom grava la evoluon de SDI, ke vi uzas vian personan aŭtoritaton por tiu ĉi afero, kontraŭ multaj eĉ en Usono mem?

Vidu, la aŭtoritato certe ne estas mia zorgo! Mia zorgo estas diri tion, kion mi scias. Kaj diri tion, pri kio mi kredas, ke ĝi koncernas ĉiujn, kaj kion ĉiuj devas koni. Estas necese kompreni, kio eblas kaj kio ne. Tion, ke armiloj, detruaj armiloj ekzistas, tion oni devas scii, kvankam oni ne ĝojas pro la fakto, ke la detruaj armiloj estas tiom fortaj. Ja tio ne dependas de ni, tio „ekzistas en la naturo". Aliflanke oni same devas scii tion, ke ekzistas ankaŭ defendaj armiloj. Kaj se ili ekzistas, tiam oni devus ege ĝoji pro tio. Mi diras konstante dum tridek jaroj al ĉiu, kiu volas aŭskulti min, kaj al multaj, kiuj ne intencas aŭskulti min, ke oni devas labori pri ĉia ajn armilo, sed specife pri la defendaj armiloj. Bedaŭrinde nek Usono, nek la cetera parto de Okcidento faris tion. Ni ne faris tion, ĉar tio estas ege malfacila, kaj ni ne faris tion, ĉar la plimulto ne volas labori pri ia ajn armilo. Sekve, oni laboras nur pri tio, kio estas facila, kaj tio estas la ataka armilo. La rusoj, tamen, forte laboris pri la defendaj armiloj. Ili laboris kaj evoluigis tiun armilaron. Ili kapablas defendi Moskvon, kapablas defendi ĝin bone. Ili klopodas defendi pliajn teritoriojn krom Moskvo, kaj ili plene pravas. Mi konsilis al ĉiuj okupiĝi pri la defendaj armiloj. Mi konsilis ne nur ĝenerale, mi klopodis konsili eĉ en detaloj. Ĉar mi fariĝas pli kaj pli maljuna; ĉar la junularo estas pli saĝa, miaj junaj amikoj konsilis multe pli kaj multe pli bone. Estas nun tamen kelkaj, kaj ilia nombro estas ne malmulta, kiuj komencas kompreni ĉi tie en Usono, kion eblas fari kontraŭ la sindefendo de la alia flanko? Ni tion ne iniciatis. Ni nomas ĝin SDI, t.e. *iniciato de strategia defendo.* Tio ne estas ĝusta nomo. La ĝusta nomo estus SDR, *Strategic Defence Response*, la respondo al la strategia defendo. La rusoj iniciatis tion jam antaŭ 30 jaroj. Okcidento devis respondi al tio. Jen, pri kio temas. Sed en tio, kion Reagan proponis, tamen troviĝas nova iniciato. Tion tamen ne mi konsilis al li, li mem inventis ĝin, kaj bone inventis ĝin. Li diris, ke la defendo ne estas aranĝebla fare de unusola nacio. La defendo devas esti farata *fare de* kaj *por* la mondo. La defendo devas esti iniciatata kaj efektivigata fare de ni ĉiuj. Kaj se en tio oni sukcesas, oni devas apliki unuiĝintajn fortojn. En Usono ni jam spektas la aferon alimaniere, kaj ni havas kontraktojn kun la angloj, kun la okcident-germanoj, kun la israelanoj, kun la italoj kaj kun la japanoj. Ni proponis kontrakti ankaŭ al la rusoj. La rusoj tion ne akceptis. (Ankoraŭ ne.) Mi esperas, ke estos paco, kaj ĝi baziĝos sur tio, ke ni ĉiuj volas pacon. Ni volas la pacon kune, kaj per la evoluigo de defendaj armiloj la situacio de atakonto pli kaj pli malfaciliĝos, dume la paco ekhavos pli kaj pli da probableco.

Sinjoro profesoro, el ĉio, kion vi rakontis, sekvas, ke la ĝisnunan tradician strategion – kies nomo ĉe ni estas la „strategio de fortimigo", „la stretegio de sinarmado per ofensivaj armiloj" – vi malaprobas kaj malakceptas. Kiuj estas la riskoj de la fortimigo?

Mi ne rifuzas la fortimigan strategion, kvankam mi emus ĝin malakcepti. La esenco de la fortimiga strategio konsistas el tio, ke oni ne havas ion alian. La merito de la defenda strategio estas tio, ke oni entute ne bezonu ĝin aŭ bezonu malpli. Mi proponis la defendon jam en 1960. Antaŭ kelkaj monatoj mi venkis ankaŭ libron pri tio sub la titolo *Better a shield than a sword*

(Ŝildo estas pli bona ol glavo). En ĝi mi priskribis la grandegajn avantaĝojn de la defendo. Mi priskribis, kiamaniere estiĝis la atombombo, la hidrogenbombo, kiamaniere konstruiĝis la reaktoroj, kaj kiamaniere rezultigis la teknologio la pli komfortan kaj pli bonan vivon, kaj kiamaniere ĝi rezultigis pli danĝeran vivon. Kaj mi priskribis eĉ tion, ke en ĉio, plenumita de mi, kiajn erarojn mi kulpis. La libro konsistas el mallongaj ĉapitroj. Oni povas tralegi ĝin dum mallonga tempo, antaŭ endormiĝo.

Sinjoro profesoro, en 1984 vi donis intervjuon al la gazeto *Stern*, kaj al unu el la demandoj vi respondis jene: „La tasko de la scienculo estas okupiĝi pri scienco. Li devas uzi sian scion; lia respondeco konsistas el tio, ke li devas klarigi ĉion faritan de li mem, inkluzive ties konsekvencojn. Jen, kie ĉesas la respondeco de la scienculo." Bonvolu paroli iom pli detale pri tiu pensaro, pri la problemo de scienculo kaj etiko, pri la etiko de la scienco.

Jen estas nia tasko, kaj ĝi ne estas facila. Scii estas ĝojo, ofte ne simpla, sed se oni sukcesas, ĉiam estas bone scii. Efektivigi jam estas pli malfacile. Klarigi la konsekvencojn estas jam preskaŭ maleble. Ĉar ja de kie mi povus scii la konsekvencojn? Kiamaniere mi povus scii, kiel oni uzos mian sciencan produkton, kiel oni misuzos ĝin, kio estas ĝusta, kio estas malĝusta? Al tio la respondo mankas. Ĉar, se eĉ mi estas la inventinto, el tio ankoraŭ ne sekvas, ke mi entute scias, kiamaniere oni uzos mian inventaĵon kaj kiajn konsekvencojn ĝi rezultigos. Al tio, mi pensas, tamen oni povas doni praktikan respondon. Ni parolu pri ĝi! Rakontu ĉiu sian direndon, rakontu ĉiu sian imagon, kiel uzi ĝin. Ni ne trompu nin per la kredo, ke ni ĉiuj estas objektivaj, ĉar se temas pri vivgravaj problemoj, tiam preskaŭ maleblas esti objektiva. Sed ni ĉiuj malkaŝu niajn antaŭjuĝojn! Mia antaŭjuĝo favoras la liberecon. La plejparton de mia vivo mi pasigis en Usono, en lando kie fremdulo estas akceptata kvazaŭ li estus naskiĝinta ĉi tie. Tie ĉi mi ricevas komplimentojn pro mia „bela prononco" de la anglaj vortok, kie la „bela prononco" fakte signifas, ke mi prononcas ilin malĝuste. Kaj oni rimarkas tion ne malice, sed afable. Ke tio povas ekzisti, ke oni povas superi la strikte proprajn interesojn, ke oni povas pensi pri komuna intereso – je tio mi kredas eĉ en la praktiko. Kaj pro tiuj kaŭzoj mi volonte kaj plezure laboras pri tio, ke ni ĉiuj povu bone kunvivi en sekureco. Aliaj pensas alimaniere. Ili rakontu tion, kion ili devas rakonti. Mi tamen komprenas jene la parolliberecon, la moderigitan parolliberecon, kaj la taskon de ni ĉiuj: fari sian propran farendaĵon. Poste ni klarigu tion, kion ni devis fari. Aŭ tion, kiel ni vidis niajn proprajn farendaĵojn. Kiel ni ĝin imagis, kion ni esperas, kion ni timas. Ĉion ĉi oni devas diskuti, eblas diskuti pri tio. Mi parolas pri tio longe, kvankam oni povas rakonti tion simple. La laboro en la scienco estas la sama, kiel en la agrikulturo, en la arto, en la regado aŭ iu ajn alia agado. Eĉ la laboro de la medicinistoj estas la sama, kvankam ĝi estas la plej grava. Ĉiu plenumu sian farendaĵon. Okaze, se nia agado kaj pensado koncernas aliajn, ni devas tion klarigi. La kunagado eblas nur tiamaniere, kaj la penso, ke se io estas farita de scienculo, do tio devas esti klarigata de la scienculo mem, tia penso ne havas sencon. La scienculo ne regu ion ajn, same kiel neniu alia regu. Nek la kapitalo, nek la registaro, nek la scienculo, sed la popolo.



Victor Vasarely: Isadan-Pos-1, 1977

El la hungara:
d-ro György *Nanovfszky*

Sándor Révész

Faktoj, timoj kaj esperoj pri Hungario

5. Loka-socie

György Enyedi, akademiano, la plej prestiĝa hungara *setlo*-sociologo asertas tion, ke la plej forta malegaliga faktoro en Hungario estas la malegaleco inter la diversaj setlej-tipoj (urboj, urbetoj, vilaĝoj, vilaĝetoj ktp.). La recentrigaj tendencoj en la 70aj jaroj multe profundigis tiun malegalecon. Pro la unuigaj kampanjoj pri kiuj ni jam parolis, granda parto de la vilaĝoj perdis la bazajn instituciojn de la vilaĝa vivo (lernejon, memstaran industrian entreprenon, kooperativan centron, parokejon ktp.). Pli ol duono de la vilaĝoj ne plu estas administrataj kune kun aliaj vilaĝoj de iu alia pli granda, pli centra setlejo. La setlej-evoluiga koncepto, kiu ekvalidis en 1971, respegulas miskredon: „ju pli granda, des pli socialisma". Tiutempe prepariĝis ekzemple (inter la aliaj) eĉ tia tutlanda setlej-evoluiga projekt-studo, laŭ kiu *la plej malgranda* socialisma setlejtipo devas havi minimume 3 mil loĝantojn! Tiu projekto-studo antaŭvidis la likvidadon de la pli malgrandaj vilaĝoj ĝis 1990, ĉiuokaze antaŭ la jarcentfino. (Imagu, laŭ la 1980a popolnombrado en 86% de la hungaraj setlejoj loĝas malpli ol 3 mil loĝantoj!)

Sume, la malgrandaj vilaĝoj (laŭ la hungara statistika klasifiko la vilaĝoj, havantaj malpli ol mil loĝantojn konsideriĝas malgrandaj) en la pasintaj jardekoj evoluis multe malpli ol la pli grandaj setlejoj. Signifa parto de la vilaĝoj simple fariĝis maltaŭgaj por dudeka jarcenta, eŭropeca vivo. Fine de la jarcento ni havas ankoraŭ ne malmulte da etaj vilaĝoj, kie nur 2-3 foje semajne oni vendas lakton, freŝan panon. La loĝantoj de ĉ. mil vilaĝoj devas vojaĝi proksimenmalproksimen por aĉeti neprilaboritan viandon. Okazas, ke eĉ por simpla lerneja kajero oni devas busveturi najbarvilaĝen. Estas vilaĝoj, kie la geknaboj praktike neniam renkontas tropikajn fruktojn en la kaduka vendejo. En la malgrandaj vilaĝoj ĝenerale ĉiam mankas (provizore, porokaze) iuj elemente bezonataj artikloj. Kaj ni ankoraŭ ne parolis pri la trafik-problemoj kaj kostoj, pri la manko de trinkebla akvo, pri la stato de la ŝose-reto, pri la manko de la laborlokoj hejm-vilaĝe (pri la neregistrita virina senlaboreco) ktp. György Enyedi, la eksperto jam menciita pruvis tion, ke loĝanto de malgranda vilaĝo havas duonan(!) ŝancon por eniri hospitalon ol urbano suferanta pro simila malsano. La mortokvanto de la vilaĝanoj jam atingis, en kelkaj aĝgrupoj eĉ superis tion de la urbanoj, ĉar la avantaĝo, kiun la vilaĝanoj havas pro la malpli poluciita medio, pro la manko de la tipe urbaj danĝero-faktoroj, pro la pli sana vivmaniero, perdiĝas pro la malalta nivelo aŭ foreco de la sanitaraj servoj.

Por vidi pli klare kiel oni malpreferas la vilaĝojn, ni trarigardu kiel decidiĝas la monsumo, kiun la opaj ŝtat-administraj unuoj (la konsilantaroj) povas elspezi. Unue oni kalkulas, kiom da mono bezoniĝas por funkciigi la ekzistantajn konsilantarajn instituciojn (lernejojn, poliklinikojn ktp.) kaj servojn. Poste oni aldonas la t.n. „kap-kvoton". La „kap-kvoto" estas difinita porkapa sumo, kiun la konsilantaro ricevas por evoluigaj celoj (konstrulaboroj, investoj, modernigo, infrastruktura evoluigo ktp.). Se la „kap-kvoto" de iu vilaĝo estas *x* kaj la koncerna vilaĝo havas *y* loĝantojn, la garantiita sumo por evoluigaj celoj en vilaĝo estas *xy*. Tiuj ĉi du sumoj, (la unua por funkciigi kaj la dua por evoluigi) estas garantiitaj. Tio signifas, ke, se la enspezoj de la konsilantaroj ne kovras tiujn elspezojn (praktike neniam kovras), oni aldonas la mankantan parton el la centra ŝtata buĝeto. Al la tiamaniere ricevita sumo aldoniĝas la konkretcelaj mon-apogoj, kiujn aljuĝas la departementa konsilantaro por realigi konkretajn celojn, projektojn, kaj la diverstipaj „melkmonoj". La gravaj „melk-fontoj" estas la lokaj entreprenoj kaj kooperativoj. Oni povas „melki" ankaŭ la loĝantojn en formo de „setlej-evoluiga kontribuo", se la plimulto de la lokaj familioj voĉdonas por tio, sed la tiamaniere melkebla sumo estas preskaŭ bagatela.

La funkciigaj kostoj kalkuliĝas baze de la aktuala stato kaj proviziteco de la koncerna institucio aŭ servo, kaj ne surbaze de ĝeneralaj normoj pri ĝi. Tio signifas, ke la funkciigaj kostoj de iu nova, bone ekipita lernejo aŭ polikliniko enhavas ankaŭ la amortizon por la grandvaloraj ekipaĵoj, la funkciigaj kostoj de la malbone ekipitaj instituciojn enhavas amortizon nur por „tabulo kaj kreto". Kiu jam havas, tiu ricevas...

La „kap-kvoto" departemento-nivele estas egala, t.e. la sama por ĉiuj departementoj (1156 Ft en la aktuala planperiodo). La departementa konsilantaro jam libere diferencigas la „kapkvoton" de la diversaj setlejoj inter la difinitaj minimumo kaj maksimumo. Ekzemple en la Sud-Hungaria departemento Csongrád la „kapkvoto" por la malgrandaj vilaĝoj estas 400 Ft, por la departementa ĉefurbo, Szeged 1844 Ft, 30% de la loĝantaro loĝas vilaĝe, kaj la vilaĝanoj ricevas entute 14%-n de la departementa kapkvota sumo. 39% de la departementanoj loĝas en Szeged, kiu ricevas 60%-jn de la kap-kvota sumo. (Aldone: la plenuma

komitato de la departemento havas 12 membrojn loĝantajn en Szeged, kaj nur unusolan membron loĝantan en vilaĝo. (La ekzemplo de Csongrád ne estas ekstrema, sed tipa. Estas departementoj, kie la diferenco inter la vilaĝa kaj la ĉefurba „kap-kvotojn" estas sesobla!)

La „kap-kvotan" sistemon oni enkondukis en 1986. Antaŭe ne ekzistis ia ajn garantiita minimumo por evoluigaj celoj, kaj la malegaleco estis eĉ pli enorma ol nun!!! Nun la departementaj konsilantaroj klopodas restarigi la malnovajn, pli malegalajn proporciojn pere de la konkret-celaj mon-apogoj. Por preni la saman ekzemplon: en la departemento Csongrád la konkret-celajn mon-apogojn (nekalkulinte la ne enplanigitan rezervon por urĝaj aferoj aŭ superplanaj elspezoj) 89%-e ricevas la urboj kaj 11%-e la vilaĝoj.

La „kap-kvoto" kovras ĉ. la kvaronon (laŭ la planoj: 27%-n) de la evoluigaj elspezoj. La trikvaronan parton konsistigas la konkret-celaj mon-apogoj kaj la „melk-monoj". La „melk-monoj" memkompreneble ankaŭ efikas malegalige, ĉar post la unuigaj, recentrigaj kampanjoj malmulte da memstaraj industriaj kaj agrikulturaj unuoj restis vilaĝe. La iamaj memstaraj entreprenoj fariĝis partoj de pli grandaj entreprenoj, kies decidfaraj organoj rezidas urbe, do tiuj entreprenoj melkiĝas unuavice por la urboj. Same efikis la unuigado de la kooperativoj. Ne parolante pri tio, ke la entreprenoj funkciantaj inter pli evoluintaj publikaj servoj kaj institucioj, baze de pli evoluinta infrastrukturo havas avantaĝon surmerkate, havas pli da ŝanco por esti finance sukcesaj, do ili estas pli melkeblaj.

Ĝis nun ni parolis pri la malegaleco inter la ŝtat-administraj unuoj, sed kiel jam dirite la ŝtat-administraj unuoj tre ofte entenas plurajn vilaĝojn, kaj la pli malgrandaj vilaĝoj estas preskaŭ nekontroleble kaj nedokumenteble, sed forte malpreferataj eĉ ene de la jam forte malpreferataj konsilantaraj unuoj.

La vilaĝoj estas la viktimoj de (i.a.) la duone farita discentrigo, kio fortigis la departementan potencon kontraŭ la setleja potenco.

Dum la lastaj jaroj signife vastiĝis la decid-kampo de la lokaj konsilantaroj, kaj ankaŭ en la vilaĝoj sen memstaraj konsilantaroj formiĝis el la loke elektitaj konsilantaranoj „magistratetoj" kun limigita decidrajto, sed la domina rolo de la departementa centro en la financa sistemo estas praktike senŝanĝa, kaj kun malplena poŝo estas malfacile utiligi la plian decidpovon.

Estas antaŭvidebla ŝanĝo por la jardekfino, ke la lokaj konsilantaroj senpere ricevos la individuan enspez-impoŝton de la loĝantoj.

La postmilitaj jaroj mirinde pruvis la forton kaj efikecon de la lok-socia sinorganizado. La sinorganizaj, interesdefendaj kapabloj de la lokaj socioj kaj antaŭe kaj poste estis sufoke subpremataj (kun malmultaj kontraŭekzemploj). Nuntempe la institucia strukturo, la administra sistemo kaj la juro estas iome, la „politika klimato" estas jam signife malpli malfavora al la disvolviĝo de tiuj kapabloj.

Rapide plinombriĝas la ekzemploj pri la reaktiviĝo de la lokaj socioj: plurloke reaperas tiuj societaj, asociaj kadroj, diverstipaj rondoj, sinistruaj, sinevoluigaj institucioj (ekzemple la tielnomitaj „popolaj altlernejoj"), kiuj donas formon al la loksocia publika vivo kaj bazon de amasforto al la luktado por la lok-sociaj interesoj. Oni renkontas ankaŭ novajn formojn, originalajn inciatojn.

Ni devas tuj aldoni, ke tiu ĉi fenomeno estas ankoraŭ sporada, la iniciatoj plejofte inokuliĝas deekstere en la lokajn sociojn fare de urbaj (eĉ ĉefurbaj) intelektuloj, la afero tro forte dependas de subjektiva hazardo (ĉeesto de taŭgaj lok-sociaj gvidantoj), okazas ofte, ke la novaj formoj de la loka publika vivo entenas nur la lok-socian eliton ktp.

La fenomeno de la lok-socia sinorganizado nuntempe tute ne havas tendenco-ŝanĝan forton, sed ĝia dinamismo estas okulfrapa, kaj estas espereble, ke ĝi atingos tiun sojlon, kie la escepto fariĝas normo, kaj trapasante tiun sojlon la fenomeno lavangrapide iĝos amasa.

Ekzemple: rehavigi la „forcentrigitan" lernejon aŭ infanvartejon por iu malgranda vilaĝo ŝajnis anĝele naiva revo antaŭ kvin-ses jaroj. La fakto, ke kelkaj forte luktantaj vilaĝoj tamen sukcesis reakiri propran lernejon, ne modifas observeble la aspekton de la lernej-reto, sed modifas la konscion pri la realaj alternativoj. Rehavigi la lernejon – estas ankoraŭ escepte, sed pritrakti la aferon, enplanigi ĝin, cerbumi pri la ŝanco kaj la senco de la rehavigo – ne plu estas escepte.

Alia ekzemplo: ĝis tiu ĉi minuto inter la 1574 senkonsilantaraj vilaĝoj kvin sukcesis konsilantare rememstariĝi. La unuaj tri tute silente, la kvara des pli brue. Jen la historio:

En 1975 oni subite-haste unuigis tri mezgrandajn vilaĝojn, kaj – samgeste – ankaŭ la vilaĝajn kooperativojn. En la vilaĝo Valkó ekrezidis la komuna konsilantaro, en la vilaĝo Vácszentlászló estis la kooperativa centro, en la tria vilaĝo Zsámbok restis nenio. Inter 1975 kaj 1986 el la konsilantara buĝeto elspeziĝis en Valkó (havanta 1800 loĝantojn) ĉ. 70 milionoj da Ft, en Zsámbok (havanta 2300 loĝantojn) ĉ. 10 milionoj da Ft. La kooperativaj investaĵoj koncentriĝis memkompreneble al Vácszentlászló. Antaŭ la unuiĝo Zsámbok estis pli evoluinta vilaĝo ol la aliaj du, jardekon poste ĝi menciiĝas jam inter la postrestintaj vilaĝoj de la departemento. En 1984 la lokaj instancoj (la vilaĝaj komitatoj de la partio kaj de la Popolfronto) diris: sufiĉe! kaj elpaŝis por la rememstarigo de la vilaĝo. La departementaj instancoj kaj la gvidantoj de la komuna konsilantaro provis diversmaniere haltigi, silentigi, senkuraĝigi la movadon por la rememstariĝo, sed vane. La vilaĝanoj sendis peticion al la Prezidio de la Popolrespubliko pri la memstariĝo. La peticion

subskribis 93% de la vilaĝaj familioj. Nomumiĝis departmenta komisiono por priekzameni la situacion. Fine oni organizis vilaĝan asembleon, dum kiu la vicprezidanto de la departementa konsilantaro informis la vilaĝanojn pri la eventualaj sekvoj de la memstariĝo. La tri vilaĝoj kune konsideriĝas grandvilaĝo, kies „kap-kvoto" estas 1000 Ft (jare por loĝanto). Zsámbok sola ne plu konsideriĝos grandvilaĝo, kaj ĝia „kap-kvoto" estus nur 600 Ft! Do, estas multe pli avantaĝe interkonsentiĝi kun la aliaj vilaĝoj pri la pli egala ĉerpado de la komuna buĝeto ol memstariĝi. La asembleo tamen voĉdonis unuanime por la memstariĝo. Kelkajn semajnojn poste sekvis la vilaĝa plebiscito, kaj nur 4% de la voĉdonantoj esprimis sin kontraŭ la memstariĝo. Laŭ la rezulto de la plebiscito la Prezidio memstarigis Zsámbok januare de 1987. (Estas aldonende, ke la departementoj ne estas jure devigataj plebiscitigi la memstariĝemajn vilaĝojn, kaj la Prezidio ne estas jure devigata konsideri la rezulton de la plebiscito.)

Dum la lasta jaro de la „sendependiga batalo" Zsámbok ŝoviĝis fokusen de la publika atento. La tagĵurnalo de la Patriota Popolfronto komentariis la unuan kunsidon de la rememstariĝinta konsilantaro jene: „Dum la pasinta jaro Zsámbok fariĝis modelo kaj mezurilo... Modelo timita de multaj homoj, pro ke ekde nun aperos malkaŝe la ŝajnaj aŭ realaj konfliktoj inter la perforte kunigitaj, en truda geedzeco vivantaj vilaĝoj. Povas esti, ke ni fakte ekvidos mil konfliktojn kaj pli, sed almenaŭ ni jam scias, *kion* oni devas prikuraci kaj *kiel*! tiel kiel Zsámbok modelis." Tiel optimisma mi ne estas. La porokaza decido de la Prezidio ne signifas ĝeneralan aprobon de la memstariĝaj klopodoj, sed post la memstariĝo de Zsámbok la ŝtatadministra kuntruditeco ne ŝajnas esti plu neŝanĝebla fato.

Ankaŭ ĉi-momente daŭras kelkaj „sendependigaj" bataloj, kaj en iu popolfronta komisiono jam lanĉiĝis eĉ ideo pri ĝenerala solvo, laŭ kiu ĉiuj vilaĝoj havus memstaran konsilantaron kiel decidfaran organon, kaj nur la aparato, la plenum-organo restus komuna. (Ja, havi konsilantarajn rezidejon, oficistojn ktp. ĉiuvilaĝe estus fakte malŝpare kaj koste de la aparata kvalito.) Sed serioza traktado pri tiu propono ankoraŭ ne okazis.

La temo ne estas finebla sen paroli pri la loka amaskomunikado, pli precize pri la loka ĵurnalismo. La ĵurnalismo laŭ tiu vasta kompreno, kiu nun taŭgas al ni, estas la kontinua (ĉiutaga) publika reflektado pri la ĉiutaga vivo, nivele de la ĉiutaga konscio. Sen tiu praktiko de la publika sinreflektado politika vivo en la moderna (t.e. nov-epoka) senco de la vorto ne povas ekzisti. Sen la rimedoj de la loka ĵurnalismo (ekzemple lokaj gazetoj) la lokaj socioj estas politike impotentaj. Kaj fakte, la frakaso de la loka amaskomunikado komence de la stalinisma epoko estis parto de la impotentigo de la lokaj socioj. Antaŭe en malgranda urbo de kelkdek mil loĝantoj aperis du-tri tagĵurnaloj, eventuale eĉ pli, ankaŭ la pli grandaj vilaĝoj havis propran ĵurnaleton aperantan du-trifoje semajne. Nun ekzistas 4 tutlandaj politikaj hungarlingvaj tagĵurnaloj, krome ĉiuj departementoj havas po unu, kaj nur tri grandaj urboj (Budapest, Miskolc, Szeged) havas urban tagĵurnalon. En la tuta lando aperadas plimalpli tiom da tagĵurnaloj, kiom aperadis komence de la jarcento nur en Budapeŝto (25). (La eldonkvantoj intertempe memkompreneble plurdekobliĝis.)

Sed ankaŭ ĉiterene okazas io. La hungara amaskomunikada strukturo eĉ nun ne havas lokan nivelon, sed sporade aperadas lokaj amaskomunikiloj.

La forta bezono je lokaj informoj unue direktiĝis al la jam ekzistanta regiona amaskomunikilaro. La legantaro de la departementaj ĵurnaloj duobliĝis dum dekkvin jaroj, la aŭskultantaro de la kvin regionaj radiostacioj duobliĝis dum dek jaroj, ĝis la mezo de la 80aj jaroj. Intertempe ekfunkciis ankaŭ du regionaj televid-stacioj.

La ĉi-temaj enketoj de la Hungara Esplorinstituto pri Amaskomunikado montras tamen tion, ke la regionaj amaskomunikiloj havas signifan rolon en la provizado de lokaj informoj nur por la rezidurboj kaj iliaj ĉirkaŭaĵoj. La lok-nivela inform-trafiko funkcias sub la institucia nivelo, unuavice pere de personaj kontaktoj.

La plej signifa paŝo ĝis nun al la rekonstruado de la loka amaskomunikado estas la disvastiĝo de la lokaj kablotelevidaj programoj. Fine de la 70aj jaron en pluraj hungaraj urboj oni ekeksperimentis pri kablotelevida sistemo, sed post malfavora centra decido la eksperimentoj (escepte en unu-sola urbo) ĉesis aŭ daŭris plu sekrete. En 1983 aŭtune naskiĝis en la particentro favora rezolucio pri la kablotelevido, kaj fine de la sekva jaro jam funkciis dudek urbaj televid-stacioj kun loka programeto aŭ almenaŭ teleteksto; nun ekzistas jam pli ol tridek lokaj programoj. La fulmrapida disvastiĝo tute ne rezultis de centre organizita kampanjo. El la centro venas nek iniciatoj, nek mono, nur aprobo kaj reguligaj provoj.

La lokaj televid-stacioj aspektas tre diverse. Kelkloke la loka programo estas nur flanka afero, gravas pli la aliaj funkcioj de la kablosistemo (pli bona detektado de la tutlandaj kaj najbarlandaj programoj, reguligo de certaj publikaj servoj; hejtado, lift-kontrolo ktp., kino-kanalo, reklamado ktp.), kelkloke la programo estas miniatura imitado de la tutlanda televido, kelkloke ĝi servas la personajn ambiciojn de la lokaj gvidantoj, kelkloke esprimas sin per ĝi nur la lokaj potencoj ktp. Sed tamen ekzistas lokaj televid-stacioj, kiuj proksimiĝas al la baz-demokratia, „komunumeca" funkciado, kiuj servas kiel malfermaj publikaj forumoj, iloj de la socia kontrolo, kvankam kelkaj ĉitipaj provoj estis abortigitaj, sed ne ĉiuj kaj ne poreterne.

Estas neforgeseble, ke la diversaj tavoloj de la lokaj socioj kaj la lokaj instancoj („delegitaj" en la lokajn sociojn) suferas samtempe pro la manko de la amaskomunikadaj rimedoj, kaj okazas ofte, ke la unusola disponebla rimedo servas nur la pli fortan „bezonanton", kaj la aliaj iĝos eĉ pli dependaj ol antaŭe. La lokaj amaskomunikiloj funkcias demokratie nur tie, kie jam ekzistas sufiĉe altgrada reciproka konfido inter la instancoj kaj la loĝantaro. Amaskomunikadi *por* konfidindaj lokaj instancoj kontraŭ la eventuale ne konfidindaj, estas praktike neeble.

Ricevi aprobon de la Buroo pri Informado de la Registraro por aperigi lokan gazeton estas praktike neeble. La dua plej granda urbo de la lando (Debrecen) dum multe da jaroj devis lukte strebadi por la aprobo aperigi semajnan urban magazinon. (Estas multe pli simple aprobigi kaj aperigi provincajn revuojn, sed ili, kvankam havas grandan rolon en la intelekta vivo, ne servas la menciitan ĵurnalisman funkcion.) Estas nova fenomeno, ke urboj kaj vilaĝoj provas tamen iamaniere ekhavi gazeton en tiuj formoj, kiuj ne estas aprobigendaj de la Inform-Buroo. Estas ekzemple moda truko transformi la programkajeron de la kulturdomo al loka gazeto. En pluraj urboj la gazeto de la granda entrepreno, dominanta la urbon fariĝas praktike urba gazeto. Kelkloke la konsilantaro eldonas jare lokajn kalendarojn. Kelkaj departementaj tagĵurnaloj havas urbajn redakciajn filiojn (kun unu-du ĵurnalistoj), kiuj redaktas apartan pri-urban paĝon por la speciala urba eldono de la ĵurnalo ktp. En kelkaj urboj oni jam provis elbatali urban rediostacion, sed la instancoj konsekvence malaprobas tiujn planojn.

La malegaleco inter la diverstipaj setlejoj malegaligas memkompreneble ankaŭ la ŝancon por la loka amaskomunikado. En vilaĝoj ne funkcias grandaj memstaraj entreprenoj kun rajto eldoni ĵurnalon (la kooperativoj tiun rajton ne havas), la departementaj ĵurnaloj lokigas redakci-filion nur en pli grandaj urboj, kie oni povas esperi, ke la speciala urba paĝo signife levos la nombron de la legantaro, la kablosistemoj estas multe pli kostaj en vilaĝoj, kie oni devas kablizi ne altajn domojn kun multe da loĝejoj, sed opajn familiajn domojn. En vilaĝo la kostoj de la loka studio dividiĝas inter pli malmulte da homoj ktp.

Mem la rimedoj por emancipiĝi kiel setlejo – lok-socie, kaj emancipiĝi kiel civitano en la loka socio, estas malegale alireblaj. Ju malpli estas malpreferata iu setlejo, des pli da ŝanco ĝi havas por kontraŭstari sian malpreferadon.

Mikaelo Ternavski

du poemoj

* * *

mi opinias tiel:
se mi havas deziron
trinki akvon –
mi bezonas tuj
kontentigi la deziron
čar tio ne estas kaprico
tio ne estas nura deziro
tio ege necesas por mi

mi opinias tiel:
se mi havas deziron
veturi al Varsovio –
mi bezonas tuj
kontentigi la deziron
čar tio ne estas kaprico
tio ne estas nura deziro
tio ege necesas por mi

mi opinias tiel:
se mi havas deziron
kisi fraŭlinon –
mi bezonas tuj
kontentigi la deziron
čar tio ne estas kaprico
tio ne estas nura deziro
tio ege necesas por mi

* * *

al kiu vi povas prezenti
pretendon?
ja ankaŭ vi iam
havis boaton
ja ankaŭ al vi iam
lumis fajretoj
de fora insulo
sed vi timis
(oni devas almenaŭ foje
diri la veron al si)
vi timis
forlasi la bordon
en tia boato
sed li ne timis
kaj en sia malgranda boato
atingis la insulon
pri kiu vi revis
dum la tuta vivo

kaj nun
kiam li rakontas
kiaj arboj estas tie
kiaj birdoj estas tie
kiaj floroj estas tie –
vi aŭskultas lin
kun intereso
kaj doloro



Desegno de Tibor Kaján

János Arany

TOLDI

János Arany (1817-1882) apud Sándor Petőfi estas rigardata kiel la plej granda hungara poeto de la 19a jarcento. Lia „popola rakonto en versoj" Toldi aperis en la jaro 1846. Ĝi klasiĝas en la sama literatura kategorio, kiel Johano la brava de la fama poetofrato: ankaŭ ĝi priskribas la aventurojn kaj heroaĵojn de subpremita junulo, sed ĉifoje el la 13a jarcento.
La lingvaĵo de Arany en tiu ĉi verko eĉ pli senpere ĝermas el popola grundo ol la lingvaĵo de Johano la brava. Transplanti tion en Esperanton montriĝis tiel aŭdaca tasko, ke eĉ Kalocsay ne kuraĝis alfronti ĝin.

Sed la tempoj ŝanĝiĝas, kaj nun eĉ du hungaraj esperantistoj faris plenan tradukon de la verko, el kiu nun ni publikigas la unuan kanton en ambaŭ tradukoj. Ni tre bonvenigus rimarkojn pri la du tradukoj, kaj ankaŭ pri la verko mem, por konsideri eventualan libroforman aperigon.
Toldi – kiu cetere havas du pliajn partojn, kiuj priskribas la maljunaĝon kaj amon de la heroo – estas parto de la kultura minimumo por hungaroj: ĝia plena teksto estas detale instruata en la sesa klaso de la hungaraj elementaj lenejoj. La du pliaj partoj de la trilogoio estas malpli konataj kaj nekompareble malpli popularaj.

‚Pri pasintaj tempoj volas mi memori
En pasinta temp' pri Nikolao Tholdi'

Ilosvai

‚Pri pasinta gloro rememoras nun mi,
En pasinta temp' pri Nikolao Toldi.'

Ilosvai

Kiel aŭtunnokte fajro de bivako
Flagras el la fora stepo, en imago
Bild' de Nikolao Toldi flagras same,
El dek vivojn daŭra tempo ellontane.
Kvazaŭ ŝajnus al mi lia kresko forta,
Lia lanco-piko en batalo murda,
Kvazaŭ sonus tondre forta voĉo lia,
Oni pensus, tondras koleregо dia.

Estis li ja viro ĉiam en danĝero,
Paron li ne havas sur la tuta Tero;
Se li nun aperus inter vi el tombo,
Liajn agojn ĉiu konsiderus trompo.
Pezus por tri homoj lanc' lia puŝpika,
Ĵet-ŝtonoj, simile la klabo mortiga;
Konsterniĝus ĉiu pro la ŝildo granda,
‚Kaj pro la spronego surbote estanta.'*

Kiel en aŭtuna nokto la paŝtista
Fajro flagras el la stepa fono dista,
Bild' de Nikolao Toldi flagras flame
El la plurcentjara pasinteco – same.
Kvazaŭ li aperus kun staturo granda,
Uzus li lancegon en batalo sanga,
Sonus lia forta voĉo kun fiero;
Oni kredus: sonas tondra di-kolero.

Tiu fama homo ĉiam brava estis,
Sama forta vir' ne ĉiujare kreskis;
Se li reviviĝus, inter vi aperus,
Liajn agojn vi nun sorĉo konsiderus!
Peza estus lia klab' por homtriopo,
Ŝton-ĵetilo, lanco – indaj por ciklopo;
Certe konsterniĝus time nun la homoj
'Pro la egaj ŝildo kaj surbotaj spronoj.'

Unua kanto

‚Grandan trabon estis li mane kaptanta
Per ĝi al Buda li la vojon montranta'

Ilosvai

Ardas pro sunvarmo kalva stepo ege,
Laca ar' lokusta paŝtas sin engrege;
Sola ne troviĝas nun herbero kreska,
Verdas lok' nenie, eĉ ne polmapleksa;
Ombre de la stakoj homoj dormas ronke,
Kvazaŭ labor' sia pretus jam delonge;
Kvankam duonŝarĝe eĉ tute malplene,
Grandaj fojno-ĉaroj staras kampo-ene.

Svelta puto-forko kun granda baskulo
Gapas en la puton akvo-serĉe; kulo,
Pensus oni, estas kulo ĝi giganta,
Sangon de maljuna tero nun suĉanta.

Unua kanto

‚Stangon ĉarordandan li kaptinta estas,
Jen al Buda vojon li montranta estas.'

Ilosvai

Pro la sun' la kalva soda tero ardas,
La lokustaj gregoj sur ĝi lace fartas;
Eĉ herber' ne ĝermas sur la tero seka,
Mankas verda loko en la stepo ega.
Deko da servistoj – ombre de la stakoj –
Ronkas, kvazaŭ orde estus ĉies agoj,
Kvankam tutmalplene, aŭ duonŝarĝite
Grandaj ĉaroj haltas vice – fojn-avide.

Svelta putbaskulo rigardadas strange
En la put-profundo akvon priserĉante;
Oni kredus: kulo estas ĝi giganta,
Sangon de l' maljuna tero nun suĉanta.

Ĉe la trog' siestas bovoj, la soifaj,
Ili al tabanoj frontas ofensivaj,
Regas la pigreco, plena neni-faro,
Verŝas ja neniu akvon al brutaro.

Viro unusola staras nur surplande,
Ĝis rigard' atingas vasta-horizonte;
Stango ĉaroflanka sur la ŝultr' dekcola,
Eĉ, ne flirtas vange lanugeto mola.
Gapas li al dista, larĝa vojo landa,
Kvaz' al kamp' alia estus sopiranta;
Kredus oni: estas li haltsigno viva,
Ĉe la vojkruciĝo, malpermes-signifa.

Kial frat' vi staras sub sunardo sola?
Vidu, ĉiu ronkas en stakombro mola;
Kuŝas kun pendanta lango sur la grundo
Sen la em' mus-kapti ĉiu korta hundo.
Aŭ ĉu vin ne trafis ĝin nun kirlovento,
Kiu kun vi frontos post unu momento,
Kiu nun la vojon lekas rapidmove,
Kaj kiel kameno kuras fumo–blove?

Ne, li ne rigardas nun la kirloventon,
Vojan, ĉar alio kaptas la atenton:
Trans la tur' far vento el la polv' farita
Armiloj ekbrilas de taĉment' elita.
Kiam arme' el la polvo sin prezentas,
La junula koro grandan ĝemon sendas;
Longe li rigardas, al la malproksimo,
Kvaz' okule estus koro kaj animo.

„Brilaj batalantoj, hungaraj bravuloj!
Mi vin rigardas kun tristo en okuloj.
Kien vi iras? Ĉu por milit', batalo?
Ĉu kontraŭ la turko, ĉu kontraŭ tataro?
Ĉu al ili finan bonan nokton diri,
Kaj por vi florkronon de la fam' akiri?
Ho, se mi inter vi povus rajdi, karaj,
Brilaj batalantoj, bravaj, vi, hungaraj!"

Havis Nikolao ja grandan ĉagrenon,
Kiu erpis lian sopirantan memon;
Kaj kiel pensadis en si mem plu Toldi,
Lian koron trist' jam komencis ektordi.
Patro ja – nobelo; kaj Georg', la frato
Kreskis kun reĝid' en amika rilato;
Dum li mem rikoltas, falĉas surkampare,
Tiu en kortego pigras neni-fare.

Venas jen armeo, marŝas jam pretere,
Laczfi, l' palatino gvidas ĝin fiere,
Brave li sidas sur flava rajdĉevalo,
Oraj pasamentoj pezas sur vestaro,
Sekvas lin junuloj plumornamaj, belaj,
Dance prancas sube rajdbestoj buntselaj.
Toldi dum rigardas, rekoni ne volas,
Ke okuloj pro la forta gap' doloras.

Soifantaj bovoj ĉe la trog' siestas,
Kontraŭ tabanaro militantaj estas.
Pro la varmo ĉiu estas ripozema,
Do neniu verŝas la trinkujon plena.

Sur la kamp' nur solan viglan fraŭlon povas
Vidi la okulo, kiun jen ni trovas:
Sur la ŝultro ega ĉaroflanka stango,
Kvankam barb' ankoraŭ mankas sur la vango.
Sur la voj' rigardas li al malproksimo,
Kvazaŭ pri alia kamp' avidus sino.
Ĉu sur altaĵet' ĉe l' vojkruciĝo staras
Viva signo, kiu malpermes-signalas?

Kial vi subsune staras, juna frato?
La aliaj ronkas ombre de la stako;
Pendas eĉ la kuvasz-*hunda lang' anhele,*
Mankas nun la em' por mus-kaptadi, vere.
Aŭ ĉu vi rigardas kirloventon tian,
Kiu post momento provos forton vian?
Lekas ĝi la vojon dum kurad' rapida,
Kiel fum-blovanta tubo malsolida.

Ne la kirloventon nun li rigardegas,
Kiu la vojpolvon preterkure lekas:
Trans la tur' farita de la vent' el polvo
Armilaro brilas sub la ĉielvolbo.
Dum arme' aperas tra la polv-nebulo,
Lasas flugi ĝemon li el korangulo...
Toldi nur la brilon rigardanta estas,
Kaj anim' kaj koro enokule nestas.

Bela junularo, ora bravularo,
Kiel triste vidas vin mi, kun amaro!
Kien iras vi, ĉu por milit', batalo,
Por kolekti florojn de la fam' per ŝtalo?
Ĉu vi kontraŭ turkoj, aŭ tataroj iras,
Por etern' al ili bonan nokton diras?
Hej, se inter vi mi iĝus tuj husaro –
Ora bravularo, bela junularo!...

Tiajn pensojn havas Nikolao Toldi.
Zorgoj la avidan enon volas tordi.
Kial trist' la filon de hero' digestas?
Ĉar la insidema frat' kortano estas,
Plenkreskinte kun la reĝo en la korto,
Nur la tagon ŝtelas ankaŭ nun Georgo,
Dum li estis nur en ĉi-vilaĝ' infano
Kaj laboras hejme, kiel kamparano.

La arme' fiera venis al proksimo,
Kun ĝi venas Laczfi *mem, la palatino.*
Plaĉe sidas li sur virĉevalo flava,
Pasamenta estas lia vesto rava.
Ĉiu lia hom' kun kask' ardeo-pluma
Sidas sur selita rajdĉevalo bruna.
Nikola' rigardas kaj li ne rimarkas,
Ke la okulparo jam lacege fartas.

„He, kampulo! Kie voj' Buda-direkte?"
Laczfi lin demandas tute malrespekte;
Tiu vorto trafas Toldi-n kiel sago,
Ekstere aŭdeblas korbat' – la reago.
„Ĉu kampul' – mi!" Jene grumblas lia eno,
„Kiu do la mastro estus de l' bieno?
Ĉu Georg', la ruza, vulpanima frato,
Kiu atendas ĉe reĝo je la plado?"

„Ĉu kampul'?" Kaj kion al li vort' aldonus,
Tio pri Georgo Toldi sakre sonus;
Li la pezan trabon mane tuj ekprenis,
Kiel bastoneton ĉe la fino tenis;
Per la dekstra mano tenis longe, rekte
Montris li la vojon al Buda–direkte.
Kvazaŭ estus lia brak' el fer-alojo,
Eĉ ne tremis trabo, montranta al vojo.

Vidas palatino Toldi-n kun la trabo,
Miras lin armeo tuta jam kun gapo.
„Jen homo, bravulo, kiu ajn li estas;
Knaboj, por duelo kiu do sin vestas?
Kiu la stangeton levos unu fojon,
Per kiu ĉi knabo montris al ni vojon?"
Honte, malhonore: grumblas brue ĉiu,
Kun kampulo luktos inter ni neniu!

Sed kiu decidus lukti en duelo
Kontraŭ la milito ŝtorma de l' ĉielo?
Di-koleron kiu frontus per atako,
Kontraŭ serpentuma kaj fajrega sago?
Frontu kontraŭ Toldi, kiu jam ne ĝuas,
Belan mondon de Di', kaj pro ĝi enuas;
Ve, terure estus kapt' en lia mano,
Sin replorus kaptit' al patrina mamo.

Longe, densavice marŝas ar' soldata,
Ĉie Toldi estas nun priparolata;
Ĉiu lin amike, ĝoje, kare miras,
Ĉiu al li belan kaj afablan diras;
Jene: „Venu lukti kun ni, kamarado,
Ĉe ni oni taksas la bravulojn." – „Frato,
Ve, domaĝe kampul' via patro estis –
Diris la alia – kaj vi sama restis."

Bruo malaperas kaj taĉment' soldata,
De la vent' blovata, de la polv' kovrata;
Ankaŭ Toldi iras hejmen, triste, lante,
Pro la pezaj paŝoj bruas ter' tremante;
Iro kiel tiu de morna virbovo,
Kiel bruna nokto, lia okul–movo.
Kiel apr' vundita, li kolera ĝemas,
Stangon fera mano preskaŭ rompe premas.

Tradukis: Márton *Fejes*

‚Stangon ĉarordandan li kaptinta estas,
Jen al Buda vojon li montranta estas.'

* La versoj markitaj per tiu ĉi signo,...' estas transprenitaj de Ilosvai.

Sur vizaĝ' de Laczfi malrespekto sidas.
„He, kampul'! Al Buda *kiu vojo gvidas?"*
Liaj vortoj trafas Nikolaon sage,
Aŭdas oni, kiel batas kor' tiktake.
„Ĉu kampulo estas mi?" – kaj tremas gambo –
„Mi? – kunposedanto de ĉi-larĝa kampo
Kun Georgo Toldi, kiu nur intrigas
ĉe la reĝo, dum al manĝo surtabliĝas.

Ĉu kampulo mi?.." kaj liaj pensoj kreskis,
Kiuj pri Georgo blasfemegoj estis.
Nun – sen vort' – la trabon kaptas li ĉe l' fino,
Per ĝi montras vojon al la palatino.
Longe li la trabon – kiel bastoneton –
Tenas, ĉiu mire vidas la atleton;
Ĉu el fero estas ŝultro, brako, mano?
Sen moviĝ' la trabon tenas ĉi infano.

Laczfi ekmiregas pro la forto kruda.
Ne nur li rigardas: la armeo tuta!
Diras Laczfi: „Estas iu ajn, bravul' li!
Knaboj! Kiu ŝatus lin por lukt' insulti?
Kiu povus teni same la stangaĉon?
Montru same vojon, havu vi kuraĝon!"
– Honte, malhonore, sonas nur murmuro:
„Ĉu nobel' ekluktu kun kampul-junulo?"

Sed ja kiu luktus kontraŭ fulmotondro,
Neĝoblova vento, uragana ombro?
Kiu volas lukti kontraŭ fulm' ĉiela,
Longa, zigzagada brila vipo hela?
Frontu kontraŭ Toldi, se vi jam ne ŝatas
Vivon, se pri l' mond' de Dio enuadas...
Se vin Toldi kaptus, estus tre dolore,
Al mortinta via panj' vi kurus plore.

Longaj, densaj vicoj de l' arme' foriras,
Ĉiu nun al Toldi kelkajn vortojn diras.
Ĉiu sendas ĉarmajn vortojn per la lango,
Ĉiu alridetas per afabla vango.
Unu jen: „Frateto! Venu al batalo!
Havus ja vi vian prezon sur ĉevalo!"
„Frato! Ve kampulo estis patro via
Kaj kampul' vi restas..." – diras la alia.

Malaperis en la polvo la taĉmento
Kaj armila bruo, ĝin forportis vento.
Li direkton hejmen malĝojege prenas,
Pro la pezaj paŝoj eĉ la tero tremas.
Kiel taŭro morna, tiel li nun iras,
El okuloj nigro de l' noktmezo brilas;
Ofendita apro estas li kolera,
Rompos tuj la stangon lia mano fera.

Tradukis: d-ro Miklós *Fehér*

Kuvasz (diru: kuvas) = hungara bruthundo
Laczfi (diru: lacfi) = familia nomo.
Buda kaj Pešto estis apartaj urboj.

Zoltán Ambrus
(1861-1932)

Casanova

Dum iu vintra vesperkrepusko – la jaron 1802 signis tiam la skribosciuloj – , en Ĉeĥujo, en la kastelo de Dux, la granda fripono Giacomo Casanova – kiu sin nomis Giacomo Casanova de Seingalt pro la prarajto de impertinenteco – trankvile kaj en plena animpaco laboris super siaj Memuaroj. La bonega kverkligno el la ĉeĥaj arbaroj de grafo Waldstein gaje kraketis en la kameno; la anserplumo vigle knaris sur la holanda papero, kaj Giacomo Casanova, ekscitita de rememoroj, ofte glutadis la Tokajan vinon. Kelkfoje, kiam la ortografiaj demandoj lin malesperigis, li levis la rigardon de sur la verko, kiun Jules Janin iom poste juĝis cinika, kaj se li ekvidis sian sulkohavan, ŝrumpintan vizaĝon en la fenestroforma speguleto, dekoranta la muron, li parolis en si mem kun denaska sincero kaj franclingve:

– Nu, se mi pripensas, ke ĉi simieto malampleksiĝinta, kiu min alrigardas vidalvide, iam antaŭlonge signifis por la kompatinda Miĥaela, la Visitandine-monaĥino la bluan firmamenton mem, la revojn kaj surterajn plezurojn!... Ho, ho, ej, ej!

Kiam ĉesis la tusado, li komencis flartabaki kun denaska vivi-scio, longe, sperte, laŭ senmezura plezuro.

– Tiu kurbadorsa skeleto – li daŭrigis la monologon – , kiu havante telergrandecan lunlumon sur sia senforma kranio, monoklon sur la blindecaj okuloj, kurbakrure, kun stumblaj paŝoj laŭiros mir-urbojn de la venonta jarcento, kaj kun magio de ĉi nomo historia: „Don Rodrigo de Bivar" ensorĉos la naskotajn senkulpulojn: kompare kun mi tiu estas la Aŭroro. Ho, kiel abomena mi estas, ho, kiel humilige memuarojn verki!... Kaj Lujza, jes, Lujza iutempe estus mortinta pro mi! Fakte s™i tamen mortis, la kompatinda, ja ne pro mi, sed nur tiel, senofere!...

Dume li ekmemoris, ke la ortografia regularo nobelon ne devigas, kaj li daŭrigis la verkadon.

Li estis ĝuste formulanta tiun faman detalon, en kiu li rakontas la liberiĝon el sub la plumbategmentoj, kiam subite aŭdiĝis frapeto kaj ĉeporde aperis ĉambrista kapo ŝmirita per ĉiaspecaj kremaĵoj.

– Kio? Ĉu mi ne ordonis, ke neniu molestu min?

– Sinjoro bibliotekisto, iu vizitanto petas permeson enveni.

– Ĉu vizitanto? En tiu ĉi horo?

– Li asertas, ke li venis de malproksime nur por vidi la sinjoron bibliotekiston.

La neatendita vizito neniel plaĉis al la bibliotekisto de grafo Waldstein.

– Tiun gaston demalproksiman mi trovas iom suspektinda – li meditis en si. – Kiel li staturas? Ĉu juna aŭ olda?

– Li aspektas juna kaj havas bonan veston.

– Kiel vi opinias: ĉu li ne estas la diablo? – demandis Casanova plu malkonfide.

– Absolute ne – respondis la ĉambristo. – Li havas tre bonan fizionomion.

– Do enkonduku lin. Sed tenu la okulojn en streĉo, kaj se vi rimarkos, ke li volas min kunporti, retenu lin iom kaj marĉandu kun li. Se vi vere naskiĝis en Napolo, mi fidas vin.

La ĉambristo eliris kaj tra la pordo malferme lasita enpaŝis afablamiena junulo, kiu okulfrape similis al la eminenta aktoro, kiu nuntempe sur scenejo kutimas personigi la junularon entuziasmiĝantan por altaj ideoj.

La afabla, juneca kaj estimoplena mieno iele-iome trankviligis la oldan venecianon. Tamen li demandis kun iom suspektema voĉo:

– Kiu min honorigas per sia vizito?

– Mi estas la Disĉiplo – respondis la fremdulo.

– Ĉu disĉiplo? Kies disĉiplo?

– Nun la via.

– Vi honorigas min treege... sed ĉu mi povus ekscii vian nomon?

– Mi ne havas nomon – respondis la gasto ridetante – , kaj por esti tute sincera, mi devas konfesi, ke ĝustadire mi ne estas homo, nur – abstraktaĵo.

– Mi ne neas tion.

– Vi povas esti tre laca... Bonvolu sidiĝi.

– Dankon, majstro. Longe mi estis disĉiplo de iu Doktor Faustus, mi aŭskultadis la prelegojn de Kepler, sed sincerdire nun unue okazas al mi, ke oni sidlokon al mi proponas.

– Vi estas tro eluzita, ĉu ne?

– De jarcentoj ofte ripetiĝintaj miaj ekflamiĝoj cindrigis ion-tion el mia malnova memo. Mi studis jursciencon, medicinon, mi adeptiĝis al ĉiuj mondkonceptoj, sistemoj,

ismoj kaj fine mi trovis, ke pravas sole vi. Mi asertas tion ne per la inta ardo, sed per firma konvinkiĝo.

– Ah!

– Kaj mi venis de tiel malproksime solsole tial, ke mi povu diri tion al vi persone. Cetere vi komprenos mian interesiĝon; ankaŭ vi vizitis sinjoron Voltaire en Ferney.

– Bonvolu ne memorigi min pri tiu fatala vizito. Eĉ nun estas dolore por mi, ke tiun grandulon mi ofendis. Sed la diablo pensis, ke li tiom plenas je vanteco! Kiam mi eksplikis al li, ke „Henriade" ne kompareblas kun „Jerusalemo liberigita" kaj ke lia „Pucelle" estas fuŝverko kompare al „Orlando", li iele-iome konsentis konversacii kun mi, sed kiam mi komencis glorigi Rousseau-n, li foriozis kiel aktorino, antaŭ kiu oni laŭdas la koleginon. Tiu ĉi rememoro min ege doloras, kaj kredu, ankaŭ vi pripentos, se pretekste de interesiĝo vi kritikos min rekte en la okulojn...

– Mi eĉ ne pensas pri tia intenco. Male, mi venis admiri vin, kiel la plej grandan pensulon de ĉiuj tempoj.

– Ho, mi petas, mia formulado estas mankohava!... Kaj kial kaŝi? La ortografio eĉ nuntempe kaŭzas multe da zorgoj al mia kompatinda kapo...

– Se temas pri granda pensulo, kiun ja ĝenus tiaj bagatelaĵoj, kiel stilo kaj ortografio?

– Bedaŭrinde miaj verkoj abundas eĉ je aliaj malĝustaĵoj. Ili okupiĝas multe pli pri ampetolaj mitologiaj scenoj, ol pri gravaj demandoj de ekzisto kaj fina kaŭzeco.

– Kiu meditus pri tiuj demandoj nerespondeblaj? Turmentiĝi pri objekto, subjekto, pri substanco kaj ceteraj galimatioj, tio ne estas filozofado, pensado, sed senutila difektado de la cerbo. La vera pensulo estas vi, kiu vivis plej saĝe el ĉiuj konataj granduloj. Sole Epikuro povus konkuri kun vi, kvankam li superflue multe disertis. Saĝo signifas: deŝiru la floron de ĉiuj viaj horoj, la cetero estas stultaĵo. Nu, pli multe jam ne tre eblas deŝiri de la bono, ol kiom...

– Ho, amiko kara – interrompis la Disĉiplon la bibliotekisto de grafo Waldstein – , mi devenas el Ĝenova familio, kaj miaj prauloj estis ŝtelistoj ĝis la sepa generacio. Mian konsciencon ŝarĝas vere multaj aferoj, kial nei tion. Senutila, maljuna kartludanto mi estas, kiu – al vi mi povas konfesi – okaze ĝustigis ion kaj tion en la fortuno. En miaj memuaroj kompreneble mi ne fanfaronas pri tio, sed bonvolu memori pri miaj subitaj forvojaĝoj. Sincere dirite, mi forvojaĝis ĉiam tiel subite, ĉar ne tre mi ŝatis la policon. Nu, ĉe mia naskiĝo mi estis volvita en verdan drapon, kaj ankaŭ la ĉerka tegilo por mi estos el verda drapo. Se temas pri kartludo „faraono", certe eĉ Platonon kaj Aristotelon mi defius je lukto, sed ne forgesu, ke per kartludo ja eblas vivteni sin, tamen ĝi ne feliĉigas. Ho, mia plej granda peko!

– Majstro, vian eksprofesion la moralistoj ne laŭdas ekstramaniere, malgraŭ tio ĝi havis la bonan flankon, ke – krom via tritaga kartoduelo – grandmezure ĝi lasis al vi la nervojn trankvilaj. Tiele viajn korpajn-psikajn kapablojn ne paralizis la sencela meditado, nek la Laboro, kiu fasonas la vivon de la homaro pli mallonga, ol faras militoj kaj pestoj... Kaj viaj amoj? Vi nenion mencias pri viaj amoj. Ĉu ne amo konsistigas la plej altan filozofion de la mondo?

– La amo? – demandis la bibliotekisto de grafo Waldstein. – La amo estas vere bela afero, se oni aĝas dudek jarojn. Mi ekmemoras Annan kaj Marionan... Ili gajis, kiel du hundidoj. Ho, ili estis tre ĉarmaj, tiuj Anna kaj Mariona!... Kiel oni suferas pro tiuj ĉu kelkaj jaroj! Vi ja ne konis Charpillonon. Vi ne povas imagi, kiom ŝi turmentis min, la bestio, nur tial, ĉar mi ne estis dudekjara!...



Ildikó Benyó: Skizo

– Annan kaj Marionan disigas preskaŭ duonjarcento de Charpillon. Kaj la interaj, Majstro, la interaj? La tuta litanio?

– La interaj? La interaj estis iom unuformaj kaj ili malaperis unu post la alia tiel rapide, kiel bildoj de iu lanterno magia. La amo estas belaĵo ĝenerale, sed kredu, al la homoj tre malmulte disdoniĝas el ĝi. La tuta historio tiom mallongas! Preferindas ĝin eĉ ne komenci.

– Sendube estas dolore rezigni pri ĝi.

– La plej alta saĝo en la mondo estas: rezigni; rezigni pri kiel eble plej multo. Se mi estus kompreninta en mia dudekjara aĝo, ke la ĝusta vivofilozofio entenas ne la multajn virinojn kaj malmultajn librojn, sed la multajn librojn kaj kiel eble plej malmulte da virinoj, eĉ la malica Charpillon ne superregus min. Al kio ni ne alkutimiĝis, tio ne mankas. Anna kaj Mariona estis tre ĉarmaj, sed kiom da ĝojo povas havi tiu, kiu bezonas por la bonstato nenion alian, nur kruĉon da akvo kaj kelkajn bonajn librojn, por ekzemplo... ho, ne miajn memuarojn!

– Kaj tion diras vi, Majstro?! Vi, la plej granda artisto de la vivi-scio! Kiu neniam laboris, nur ĝojis!

– Mi povus diri: kiel kompetentulo mi alparolas la aferon.

– Kiel vi pensas, se vi havus la povon ĝisvivi ree homan vivon, ĉu vi ne komencus same?

– Eĉ por la mondo ne.

– Kvankam vi estis tre bonŝanca.

– Ho, jes. Kaj mi pensas, tiu bonŝanco naskiĝis kune kun mi. Ĝi kuŝis en mia naturo. Ia naiveco loĝis en mia koro, kiu substituis ĉe mi kaj la prudenton, kaj la moralon. Ĉu vi kredus, ke mi ĉiam amis, ke mi enamiĝis al ĉiuj miaj amatinoj komencante de Anna ĝis Charpillon, kiomope ili estis?! Krom tio mi ĉiam pretis riski ĉion, eĉ vivon mian por kvingroŝa sukceseto. Nu, jen la ŝlosilo de la bonŝanco. Kion mi gajnis per ĝi? Sepdek ok jarojn.

– Kaj se vi iĝus denove dudekjara kun via nuna sperto?...

– Unue mi evitus la amon, kiom nur eblas. Due: mi klopodus ofici ie kiel bibliotekisto. Sed ne ĉe grafo Waldstein, ĉar ĉi tie libroj ne troviĝas, nur likvoroj. Ie, kie pli abundas elzeviroj. Kredu min, pli bela pasio ol libroj ne ekzistas. La jurscienco, la medicino kaj aliaj, kiujn vi nomas senutilaĵoj. Kiom da ĝojo ili donas sen ia ajn pago!... Kelkfoje mi eble verkus: ne sonetojn, sed distikojn!...

– Kavaliro Seingalt, vi seniluziigas min. Vi devigas min ankoraŭ hodiaŭ vespere foriri de ĉi tie por serĉi novan majstron kaj alian filozofion.

– Malbone vi faras. Belegan libron mi donus al vi kiel porvesperan legaĵon.

– Pardonu min, kavaliro, sed estu permesate memorigi vin, ke mi estas la Disĉiplo. El mia sortodestino sekvas, ke mi senĉese serĉas la Majstron. Por mi la Majstro estas tio, kio por aliaj la aero.

– Vi vojeraros en la arbaro de Dux.

– El arbaro iel troviĝas elirvojo. Ho, se la gravaj demandoj de la vivo prezentus sin same, kiel la densejo de arboj!...

– Plej oportune neniom zorgi pri la gravaj demandoj de la vivo. Iom post iom saĝaj ni fariĝos post ricevo de batoj.

– Por mi eĉ tio signifas revon – respondis la Disĉiplo. – Ne forgesu, ke mi estas nur abstraktaĵo.

– Akceptu mian kondolencon – diris Casanova. – Fariĝi homo – tio ne estas bona, ĉar „homo homini lupus". Tamen iu kompatinda abstraktaĵo povas havi eĉ pli malbonan sorton. Kiu zorgas pri iu malfeliĉa, pli bonan sorton meritinta, kompatinda abstraktaĵo?!

Je tio ili adiaŭis kaj la Disĉiplo forvaporiĝis.

Kiam li malaperis, Croce, la olda ĉambristo, trempita en ĉiajn malicojn – , kiun la peko trasorbigis tiome, ke la malbono senĉese haladzis kaj daŭre ŝvebis ĉirkaŭ li – , scivoleme enrigardis tra la pordo.

Casanova ĝoje raportis al li:

– Ne la diablo li estis, nur lia filo.

El la hungara: Jozefo *Kiss*



Sándor Tardy: Pejzaĝo

KONSTRUINDUSTRIA KOOPERATIVO „FERTŐD"

la plej granda tia kooperativo en okcidenta Hungario, fondita en 1957. Post 30-jara laborado jam konatas tutlande, ĉar la kvincent kooperativanoj plenumis eminentajn konstrulaborojn pro kiuj ili ricevis jam altan distingon de la registaro, ankaŭ la titolon „Eminenta Kooperativo".

Plej multe estas konstruataj loĝejoj, precipe en Sopron, per moderna teknologio de ŝelaĵoj; ankaŭ en Tatabánya skeletojn de loĝdomoj, kion la Kooperativo daŭre realigas, laŭdezire kune kun aliaj entreprenoj.

Zorgege plenumendan rekonstruadon de artaj kaj historiaj monumentoj kapablas fari la kvalifikita kolerago; pro sukcesaj laboroj en renovigo de Kastelo Eszterházy kaj de Muzikdomo de Josef Haydn en Fertőd aparta Nivelpremio estis aljuĝita fare de ekspertoj.

Fertőd, Kastelo Eszterházy, ĉina ĉambro



Fertőd, Muzikdomo, interna korto

Ceteraj laboroj de la Kooperativo koncernas lernejojn, hotelojn, sportejojn, uzinejojn, magazenojn ankaŭ por la agrokulturo.



Ĝenerala Lernejo en Fertőd

La kompleksan konstrulaboron necese servas propraj metiejoj: prekonstruitaj elementoj, ankaŭ ferbetonaj, feraĵoj, lignaĵistaj kaj ĉarpentistaj produktaĵoj helpas la konstruadojn.

Sekve de kontinua teknika disvolvo estas novaĵo, inter aliaj la term-izola murbloko, fabrikata laŭ Aŭstria patento, kun marko ISOPLUS. Ties 5 specoj plurmaniere subtenas la konstruadojn de loĝ- kaj aliaj domoj, magazenoj kaj pavilonoj.



Varmoizola murbloko ISOPLUS

Ĉi-jare estis ekfabrikataj tegment-fenestroj kunlabore kun dana A.S. International, kies patento vendiĝas kun marko Hungvelux el Fertőd. Atendeblas fabrikado de kornicaĵoj kaj tegmentizolaĵoj el moderna Aŭstria materialo „Styrolbeton" per internacia kunlaboro.

Pli kaj pli, la Konstruindustria Kooperativo „Fertőd" gardos la bonan nivelon de sia laboro kaj sian renomon ankaŭ venonte.

FÉSZ
FERTŐDI ÉPÍTŐIPARI SZÖVETKEZET
H-9431. Fertőd, Fő u. 38.
Telefon: 99/45-925 45-926
Telex: 24-9188.

Por atingi pli multajn...

Multaj el niaj legantoj konas jam la fakton, ke István Nemere estas populara ne nur en Esperantujo, sed liaj verkoj furoras ankaŭ en la hungara libromerkato. Ĉar ne ekzistas oficiala statistiko pri la plej multe vendataj libroj en Hungario, oni povas nur taksi, ke verŝajne li starus pinte de tia statistiko — la suma eldonkvanto de liaj hungarlingvaj libroj dum la lastaj jaroj atingis kelkajn milionojn (en lando kun nur dek milionoj da loĝantoj!). Tio donis la ideon fine de 1985 aperigi iun lian hungarlingvan libron ĉe HEA.

La unua tia libro estis Titkok könyve (Libro de sekretoj), kiu enhavis materialojn pri aferoj, kiuj ĝis tiam havis malmulte da publikeco en Hungario, kiel pri parapsikologio, NIFOJ, la sentranĉa kirurgio en Filipinoj, kontaktebloj kun eventuale ekzistantaj aliaj civilizacioj ktp. En tiu volumo aperis ankaŭ tri artikoloj pri Esperanto — unu pri la lingvo mem, alia pri la Esperanta literaturo kaj la tria pri la Esperanto-movado.

La libro elvokis fortajn reagojn en kelkaj kulturaj gazetoj, oni kulpigis la aŭtoron pri disvastigo de pseŭdosciencoj. Tamen, troviĝis ankaŭ ĵurnalistoj, kiuj defendis la libron en la nomo de la principo pri libera esprimado de opinioj. Ĉiukaze, la 110.000 ekzempleroj de la libro disvendiĝis dum kelkaj monatoj, kaj tiamaniere tre multaj homoj ricevis bazajn informojn pri Esperanto — kaj krome la bela financa profito de la libro kontribuis al la plivastigo de la agado de la hungara Esperanto-movado.

Surbaze de tiu sukceso la eldonejo de HEA lanĉis printempe de 1987 la „daŭrigon" de tiu ĉi Új titkok könyve (Libro de novaj sekretoj). Ankaŭ en tiu ĉi libro aperis tri pliaj artikoloj pri Esperanto, tamen ĉifoje aŭtoris tiujn priesperantajn artikolojn V. Benczik kaj P. A. Rados. Unu artikolo priskribis koncize la persekutojn kontraŭ Esperanto, alia pri la ceteraj planlingvoj, la „senseperaj konkurantoj" de Esperanto, kaj la tria pri Sándor Szathmári, kiun la hungara kultura vivo ĝis nun ne scias inde pritaksi. Fine de la libro estis presitaj rektaj reklamoj pri Esperanto: unu el tiuj alvokis fariĝi subtena membro de HEA, la alia aliĝi al koresponda kurso de Esperanto.

Ĉi tiu libro eliris en 150.000 ekzempleroj, kaj ĝi plene elĉerpiĝis dum ĉ. ses monatoj. Dank' al la zorgaj financaj kaj merkataj antaŭpreparoj, tiu ĉi libro alportis preskaŭ trioble pli da financa profito ol la antaŭa — tiu profito egalas al ekz. ĉiuj produktokostoj de Hungara Vivo dum kvar jaroj! Sed kio ne malpli gravas, la koresponda kurso de HEA, kiu pli frue havis averaĝe nur ĉ. 100 kursanojn, gajnis pli ol mil novajn aliĝantojn, kaj proksimume sama nombro da personoj fariĝis subtenaj membroj de HEA.

Dum 1987 aperis ankaŭ alia Nemere-libro ĉe HEA: tio estis la hungara versio de la romano Serĉu mian sonĝon. La teksto sur la dorsa kovrilo informis, ke temas pri libro verkita originale en Esperanto, kaj ankaŭ fine de tiu ĉi libro aperis la reklamo pri la koresponda kurso, kaj la alvoko fariĝi subtena membro de HEA. Tiu ĉi libro aperis en 80.000 ekzempleroj (en majo de 1987), kaj la jarfina inventaro de HEA registris nur 489 nevenditajn ekzemplerojn, dum en la ekstermovada distribua reto la libro plene elĉerpiĝis. Ankaŭ ĉikaze la financa profito estis signifa, sufiĉa por la plena financado de ĉ. ok esperantlingvaj libroj en po 3000 ekzempleroj.

Dum la kuranta jaro HEA antaŭvidas eldoni ok hungarlingvajn librojn, kun la suma eldonkvanto de 920.000 ekzempleroj. Aperos la hungara versio de La alta akvo, Sur kampo granita kaj Dum vi estis kun ni (nova romano de Nemere, elironta esperantlingve dum julio). Estos prezentitaj al la hungara publiko la traduko de Kredu min, sinjorino de Cezaro Rossetti, Varmas en Romo de Corrado Tavanti, kaj Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo de Tibor Sekelj. HEA eldonos krome sciencfikcian novelaron sub la titolo A rejtélyes idegen (La mistera fremdulo), kaj meze de februaro jam aperis dulingva (hungara-Esperanta) gvidlibro pri la tekniko de amorado — pri tiu libro oni povas legi apartan prezenton en tiu ĉi numero. Kompreneble, fine de ĉiu libro aperas la reklamo pri la koresponda kurso, kaj la alvoko fariĝi subtena membro de HEA.



Tri hungarlingvaj libroj de István Nemere, kiuj aperis entute en 340.000 ekzempleroj, alportante ne nur signifan financan profiton por HEA, sed ankaŭ informojn pri Esperanto al amaso da homoj, verŝajne ne atingeblaj alimaniere

Librovendoj — 1987

Jen la informa statistiko pri la vendiĝo de la propraj eldonaĵoj esperantlingvaj de HEA dum la kalendara jaro 1987. La statistiko ne inkluzivas librojn eksterlandajn, kaj ankaŭ ne tiujn, eldonitajn de aliaj hungaraj eldonejoj. Ne aperas en la statistiko ankaŭ la hungarlingvaj libroj eldonitaj de HEA, escepto estas Hungara Antologio, kiun eldonis la eldonejo Corvina, sed financis la eldonon HEA, kaj ekster la kadroj de HEA ĝi estis praktike tute ne vendita. Forfalas el la suba statistiko ankaŭ tiuj libroj, el kiuj dum la jaro vendiĝis malpli ol dudek ekzempleroj.

La Libroservo de HEA dum la jaro 1987 havis la bruttan enspezon de 3,5 milionoj da forintoj — tio egalas proksimume 600 averaĝajn hungarajn monatsalajrojn. El tiu sumo la subaj libroj konsistigas ĉ. la duonon — t.e. 300 averaĝajn monatsalajrojn. La alian duonon konsistigas Esperantaj libroj el eksterlando, Esperantaj libroj eldonitaj de aliaj hungaraj eldonejoj, kaj hungarlingvaj libroj eldonitaj de HEA. Tiu lasta ero tamen ne superas ĉ. dekonon de la tuta enspezo, ĉar la hungarlingvaj libroj, eldonitaj de HEA plejparte vendiĝas pere de neesperantistaj distribuaj retoj.

La suma kvanto de la subaj libroj estas 34.337. Por komparo jen la ciferoj de la du antaŭaj jaroj: en 1986 vendiĝis entute 27.345 libroj, dum 1985 22.219 libroj. Oni konstatas konstantan kreskon, tamen aldonindas, ke la produktado en ĉiuj tri jaroj superis la vendadon — dum 1987 aperis rondcifere 51.000 ekzempleroj de 19 titoloj en la eldono de HEA.

En la suba listo post la nomo de la aŭtoro kaj titolo interkrampe staras la ĝenro kaj la eldonjaro — ĉe libroj, aperintaj dum 1987, estas indikita ankaŭ la monato de la enmerkatigo, por doni realan bazon al konsideroj pri la vendoritmo.

La proporcio inter la enlanda kaj eksterlanda vendado ŝajnas resti senŝanĝa: ĉ. 30%-jn de la libroj aĉetas hungaraj esperantistoj, la cetero iras al eksterlando. La vendoj al Sovetio pasintjare sumis ĉ. kvaronon de ĉiuj vendoj de la libroservo, do preskaŭ duonon de la vendoj de propraj eldonaĵoj. Tio signifas, ke ĉ. 15.000 ekzempleroj de niaj esperantlingvaj libroj dum 1987 iris al Sovetio.

1. Princz, O.: Eszperantó nyelvkönyv (1984) 2367
2. Benczik, V.: Baza legolibro por komencantoj (1986) 1792
3. Baross-Kóródy, Zs.: Gramatika ekzercaro al la lernolibro Esperanto 1 de I. Szerdahelyi. (1987, marto) 1779
4. Nemere, I.: Serĉu mian sonĝon (Orig. romano, 1986, dec.) 1265
5. Twain, M.: La aventuroj de Tom Sawyer (Bildrakonto, 1981) 1222
6. Cvetkova, V.: Vojaĝimpresoj pri Japanio (1987, junio) .. 1206
7. Lienhardt, A.: Amuzaj dialogoj en Eo (1981) 1085
8. Gárdonyi, G.: Steloj de Eger (Bildrakonto, 1980) 1069
9. Baghy, J.: La verda koro (Romaneto por komencantoj, 1982) 1000
10. Mikulás, J.-H.: Taskfolioj por komencantoj (1983) 993
11. Modest, J.: Mistera lumo (Orig.noveloj, 1987, julio) 960
12. Móricz, Zs.: Malriĉaj homoj (Tr. rakonto, 1979) 960
13. Nedelĉeva, N.: Dum nokta deĵoro (Orig. rakontoj, 1987, marto) 898
14. Nemere, I.: Febro (Orig. romano, 1984) 833
15. Pechan, A.: Gvidlibro por supera ekzameno (1979) 808
16. Vaha, B.: Adolesko (Orig. romano, 1987, julio) 759
17. Móricz, Zs.: Varmega kamparo (Tr. romano, 1985) 713
18. Adrianova, N.: Vagante tra la mondo maltrankvila (Orig. poemoj, 1987, julio) 699
19. Heltai, J.: La Morto kaj la kuracisto (Dulingva rakonto, 1981) 670
20. Seppik, H.: La tuta Esperanto (1984) 661
21. Kalocsay, K.: Kiel verki kaj traduki poemojn? (Studoj pri versfarado, 1982) 613
22. Benczik, V.: Baza literatura krestomatio (1979) 609
23. Nemere, I.: La alta akvo (Orig. romano, 1986) 598
24. Nemere, I.: Terra (Orig. romano, 1987, oktobro) 535
25. Gáll, I.: Obsedita de l' Suno (Tr. romano, 1986) 530
26. Ĥitrov, D.: En la mirinda mondo de la kino, 1985) 509
27. Prus, B.: La faraono (Bildrakonto, 1980) 508
28. Móricz, Zs.: Ĉiela birdo (Tr. rakonto, 1980) 489
29. Baghy, J.: Gramatika demandaro resuma (1982) 484
30. Nemere, I.: La fermita urbo (Orig. romano, 1982) 443
31. Dinnyés, J.: Al venko! (Kantaro, 1986) 421
32. Nemere, I.: La naŭa kanalo (Orig. noveloj, 1981) 411
33. Modest, J.: La ora Pozidono (Orig. romaneto, 1984) 391
34. Socipolitikaj aspektoj de la E-movado (1986) 370
35. Baghy, J.: Hura! (Orig. romano, 1986) 354
36. Enciklopedio de Esperanto (1986) 338
37. Gajdar, A.: Timur kaj lia taĉmento (Tr. romano, 1982) 334
38. Lorjak: Mariagnes (Orig. romano, 1986) 329
39. Nemere, I.: Sur kampo granita (Orig. romano, 1987, julio) 311
40. Nemere, I.: La blinda birdo (Orig. romano, 1987, sept.) 303
41. Tabi, L.: La damo de l' Fatalo (Tr. komedio, 1985) 303
42. Modest, J.: D-ro Braun vivas en ni — Kripto (Orig.teatraĵoj, 1987, sept.) 295
43. Krúdy, Gy.: La rozo de l' sultano (Tr. fabelo, 1982) 294
44. Kníchal, O.: Adiaŭ, Kuzko! (Orig. romano, 1987, julio) ... 264
45. Nemere, I.: La Monto (Orig. romano, 1984) 206
46. Golden, B.: Marĝene de la lernolibro (Prilingvaj artikoloj, 1982) 202
47. Aszlányi, K.: Sep vangofrapoj (Tr. romano, 1984) 201
48. Modest, J.: Ni vivos! (Orig. dramo, 1987, novembro) 192
49. Johano la brava (Tr. poemfabelo, 19840 176
50. Karinthy, Fr.: Vojaĝo al Faremido — Kapilario (Tr. romanoj, 1982) 175
51. Lienhardt, A.: Amuza legolibro en Eo(1984) 171
52. Kalocsay, K.: Dek prelegoj (Eseoj, 1985) 146
53. Lorjak: Eŭlalia (Orig. romano, 1984) 141
54. Barna, Z.: La laborista E-movado en Hungario 1913-1934 (1987) 133
55. Kemalov, N.: Naŭ jaroj en la infero (Tr. prozo, 198..) 122
56. Gorov, H.: Ribela kordo (Orig. poemoj, 1983) 119
57. Dudich, E.: Ĉu Vi konas la Teron (Pri geologio, 1984) 110
58. Hulеš, A.: Katoj kaj ĉevaloj (Orig. poemoj, 1982) 87
59. Elem, J.: Betonterapio (Tr. teatraĵo, 1985) 67
60. Lorjak: Iluzioj (Orig. noveloj, 1982) 61
61. Szilvási, L.: Radioteknika artikolaro (1984) 60
62. Mészáros, B.: Oklingva nomaro de Eŭropaj birdoj (1980) 55
63. Kalocsay, K.: Tutmonda Sonoro 1-2 (Tr. poemoj, 1981) 48
64. Koutny, I.: Perkomputila tekstoprilaborado (1985) 37
65. 133 tagoj (1979) 28
66. Hungara Antologio (1983) 25

La unua de majo en Budapeŝto

Kiel ĉiujare, ankaŭ en 1988 la laboruloj de Budapeŝto festis la unuan de majo per granda demonstracio. Ĉifoje marŝis kune kun la Budapeŝtanoj ankaŭ la partoprenantoj de la MEM Konferenco, okazinta dum tiuj tagoj en la hungara ĉefurbo.

Post la demonstracio amasoj amuziĝis en la Urba Parko, kiu prezentis milojn da ebloj agrable -- kaj foje-foje eĉ utile -- pasigi la tempon. Ankaŭ nunjare funkciis tie esperantista stando, pere de kiu tre multaj povis informiĝi pri la Internacia Lingvo.

Antaŭpreparante la Partian Konferencon

La 25-an de aprilo kunsidis la Budapeŝta Partia Komitato, kaj ĝi pritraktis la rezoluci-proponon, prezentotan al la Nacia Partia Konferenco, kunsidonta inter la 20-22-a de majo.

La Budapeŝta Komitato de la Hungara Socialisma Laborista Partio akre kritikis la dokumenton redaktitan fare de la Centra Komitato, kaj ĝi rekomendis baze tralabori ĝin. La alparolintoj emfazis la neceson rapidigi la reformprocezon komencitan, substrekante, ke la reformoj ne povas limiĝi nur al la ekonomio, sed ili devas tuŝi ankaŭ la politikan instituciaron

Riĵkov en Budapeŝto

Fine de aprilo vizitis Budapeŝton Nikolaj Riĵkov, ĉefministro de Sovetio. Li havis intertraktojn kun la gvidantoj de la hungara registaro kaj de la Partio, en kiu efrolis ekonomiaj temoj.

Riĵkov kaj la hungaraj gvidantoj konstatis la similecon inter la reformoj disvolvataj en Sovetio kaj Hungario, kaj el tiu simileco ili tiris la konkludon pri la eblo reciproke lerni el la spertoj de la alia lando.

Sur nia foto: Károly Németh, prezidanto de la Prezidio de Hungario (maldekstre) akceptas la sovetian ĉefministron.

Grósz en Londono

La hungara ĉefministro, Károly *Grósz* komence de majo vizitis Brition je la invito de la brita kolegino Margaret *Thatcher*. Dum la vizito la du ĉefministroj pritraktis krom la duflankaj kontaktoj ankaŭ demandojn ligitajn al la kondiĉoj de komerco inter Hungario kaj la Komuna Merkato. *Thatcher* faris promeson subteni la hungarajn dezirojn por atingi pli favorajn kondiĉojn.

Károly *Grósz* reciprokis pli fruan Budapeŝtan viziton de Margaret *Thatcher*. Sur nia foto: la du ĉefministroj.

BLAZIO VAHA

ADOLESKO

Kiel influas duflankaj postuloj
la evoluantan individuon,
kiu kelkfoje pli sentas
la intensecon de la voloj,
ol la intencojn kaj motivojn?
Kiel eblas plenkreski en ĥaoso
de kulpigoj kaj laŭdoj?
Je tiuj demandoj respondas
la atentoĉena aŭtobiografia
psikologia romano de Blazio Vaha.
Adolesko ***estas atuta plenumo de***
la moderna Esperanta prozo.

Blazio Vaha: Adolesko. Romano. Eldonis Oy Mendoservo Ak (Finnlando) kaj Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1987. 248 p., 21 cm. Prezo: 18,- ned. gld. (Por Hungario: 80,- forintoj.)

La sciencfikcia romano de la
populara aŭtoro ĉerpas sian temon
el la fora estonteco, kiam la homaro,
elmigrinta el sia naskoplanedo,
jam eĉ perdas la memoron pri ĝi.
Sed brava spacvojaĝanto retrovas
Terra-n, kaj informas pri siaj
spertoj la tutkosman homaron.
Lia rakonto pri la degeneriĝo
de Terra povas esti instrua
ankaŭ por ni...

István Nemere: Terra. Sciencfikcia romano. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1987. 151 p., 21 cm. Kun multkolora frontpaĝo. Prezo: 18,- ned. gld. (Por Hungario: 80,- forintoj.)

revuo de revuoj

Jam lastafoje mi komencis la rubrikon per orientaj plendoj pri kaj pro facilanime enkondukitaj eŭropismoj, kapablaj forkonduki nian lingvon internacian al „lingvo regiona". Nun mi devas eĉ pli decide daŭrigi, i.a. post publika letero en MONATO (1.) de „Afrikano". Post tutjara lernado liaj konoj, vane helpataj per Plena Vortaro (ne freŝa), ne permesus kompreni ricevatajn simplajn leterojn el okcidenta Eŭropo. Ja svarmas en ili vortoj: adolto, afirmi, itinero, turneo, kaj vortare ne troveblaj aliaj. *Malneŭtrala* estas do tiu Esperanto, favoranta nur okcidentanojn? — li demandus. Ekzistas ja tuta teorio en certa reto, kiu insistas establi tavolajn vortarojn de Esperanto kun diversaj vortostokoj, distingendaj laŭ aŭtoraj celoj, ĉu hobiaj, ĉu komunuzaj, ĉu aliaj. Eventuale laŭ tiaj distingoj oni devos porti simile distingantajn Esperanto-insignojn, por tiamaniere ŝanĝi nian uzindan vortostokon alparolante iun...

La plaĉaspekta REVUO ORIENTA (1.) — venontjare 70-jara! — daŭrigas tiun temon per vortoj de *Zhang Qicheng.* Kun ĉina ĝentileco li supozas ĉe la arbitraj enkondukantoj sinceran deziron evoluigi Esperanton, *tamen sen pensi* pri ties malavantaĝoj en lernado kaj disvastigo de nia lingvo. Krome, forte difektiĝas — substrekas Zhang — ĝia neŭtraleco pro la troa okcidenta koloro. Ankaŭ mi antaŭvidas — groteske — egan protestadon de la samaj novigemuloj kaj iliaj protektantoj, se oriente oni same abunde enkondukus *sinonimojn arabajn,* ja internaciajn en la islama mondo. Nepre perspektiva akceptiĝu *la principo*: novaj vortoj, se vere necesaj, kreiĝu laŭeble el Esperantaj elementoj!

Ĉu vere ni bezonas terminon por „kvadrata ĝardeneto meze de placo": skvaro? — demandas la redaktoro de L'ESPERANTO (1.) neante kontraŭ opinio de *B. Golden.* Tiun, ĉar anglalingvano, vere kurioze, „tute ne ĝenas *anglaj* vortoj en Eo" (ankaŭ ne: mitingo). Nu, miaflanke mi ne estas ne-ĝenata legante hungarajn vortojn enkondukitajn superflue en Esperanton, eĉ se ili ŝajnas ie-tie „internacie" konataj. Ekzistas tiaj, sed tamen... Estas ankaŭ legebla emo de italoj, uzi erare-false italajn vortojn *kiel Esperantajn* pro la ŝajna simileco de la du lingvoj. Certe tie troviĝas unu radiko de supre traktita enkondukemo kaj superflua enigo de sinonimoj.

Ĝuste tial mi konsideras tre konvenaj la infanajn poemojn kaj la multspecajn distrajn-instruanj tekstojn de JUNA AMIKO (1.), ĝiajn vorto-klarigojn. Ili bone kontraŭpezas ĉiajn „modajn" premojn enigi novajn vortojn Usonanglajn aŭ Eŭropecajn. Prave. Brave!

INTER NI BLINDULOJ (19.-20.) estas magazino, sed *sonanta* por la samsortanoj. Ĝi eliras de geedzoj *Adam kaj Kristina Goralski,* el la Kanariaj insuloj al la tuta mondo kiel ligilo kaj konatigo de movadaj aferoj (nun precipe pri la jubilea UK) en interesa, vere aŭdinda maniero lerte reĝisorita. Pionira metodo estas sonmagazino en Esperantujo, al kio indas aldoni la mencion: ĝin dissendas la redaktorparo jam depost 5 jaroj, favore al blinduloj-esperantistoj.

Verŝajne multajn interesas la tradicia ĉina medicino (EL POPOLA ĈINIO, 1.), kiu elformiĝis laŭ spertoj plurmiljaraj. Kvankam ĝi ne tute samas kun la moderna medicino (Eŭropa), tamen oni ne vidu ĝin io mistera. Tabeloj kaj figuroj jen klarigas la ideojn kaj efikajn punktojn, eĉ laŭ ŝanĝiĝoj de la korpaj organoj, ĉar tiuj servas diversmaniere kiel „bazoj" por la ĉinaj terapiistoj. Estas konate, ke ili volonte amikiĝas kun la anatomiaj kaj terapiaj spertaroj de la moderna medicino, kio certe povas multe kontribui al perfektigo de la kuracado — kaj finfine tio estas la grava.

Jam de pli ol dek jaroj aperas en Milano BULTENO, eldonata de Centro Esperantista Katolika, redaktata de *Glauco Corrado,* ĝenerale kun varia informaro, kies aldonaj vortaraj paĝoj estas aparte kaj detale indaj por studado. Nun grava kaj ampleksa eseo pri problemoj de la Eŭropa Komunumo (de *Leo Franzoni*), precipe pri la interlingva situacio, turnis mian atenton al tiu escepte serioza bulteno. Inter aliaj interesaĵoj ni ekscias, ke preskaŭ 12 procentoj de la Eŭropaj parlamentanoj (kaj kvarono de la italaj) partoprenas la komunan Esperanto-grupon por favori la progresivan adopton de Esperanto kiel oficiala lingvo (n-ro 11/1987). Se ni jam tuŝis iel politikan terenon, estu menciata el ISRAELA ESPERANTISTO (junio, 96.) la pledo *por* la internacia konferenco pri la israela-araba konflikto. Argumentoj estas i.a. la netolereblaj interrilatoj, la 20-jara okupado de dense loĝataj arabaj teritorioj, disrompantaj la socian kaj moralan strukturon de Israelo, la sekva kreiĝo de etoso fanatikeca, netolerebla por progresemaj tavoloj — *por citi laŭvorte.* Aperis apude kontraŭado (de renoma esperantisto) sed iom kurioze, nur retropaŝante. Ŝajnas, ke por defendi la rifuzan starpunkton de la registaro restis nenio alia, ol ripete aserti: *„klarigoj* mankas — nesufiĉas — nekompreneblas" en tiu ĉi pledo favoranta la konferencon, kiu „povos savi Israelon de milito". Krom tio legeblas tre atentindaj artikoloj pri historio de la popola lingvo jida aŭ jidiŝa (decido inter tiuj terminoj Esperantaj diskutataj ŝajnas ne facila).

Ervin *Fenyvesi*

En Departemento Heves estas via gastiganto

Eger TOURIST

Bonvenige ni atendas Vin por:

RIPOZADO
EKSKURSOJ
ALIAJ PROGRAMOJ

EGERTOURIST – Turisma Oficejo de Departemento Eger
3300 Eger, Szarvas tér 1.
Telefono: 36/11-225, 36/10-946
Telekso: 63-424

Ĉefa Oficejo:
EGERTOURIST
3300 Eger, Bajcsy-Zs. u. 9.
Telefono: 36/11-723, 36/13-249
Telekso: 63-378

Oficejo:
MÁTRATOURIST
3200 Gyöngyös Szabadság tér 2.
Telefono: 37/11-565
Telektos: 26-285

3360 HEVES, Erkel F. u. 1.
Telefono: 39/11-907

Eger TOURIST

Lokoj de servado:
Hotelo Sírfőkút
Noszvaj
Telefono: 31

Aŭtista Kampadejo **
3300 Eger, Rákóczi u. 79.
Telefono: 36/10-558

Monta kampadejo **
3348 Szilvásvárad, Egri u. 36/a
Telefono: 36/55-207
Telekso: 63-490

Kampadejo de Sástó
Mátrafüred, Sástó
Telefono: 37/74-025

Tourist Motel
3300 Eger, Mekchey u. 2.
Telefono: 36/10-014

Mini Motel
3300 Eger, Lenin u. 11.Telefono: 36/11/388

Aleksandr Korjenkov

Pri la Esperanta kritiko

Tiu ĉi referaĵo estas gazeta versio de raporto prezentita en unu el Literaturaj semajnfinoj en Uralo. Per tiu materialo estas celata ne revolucio en la organigramo de la Esperanta kritiko, sed nur konigo de la jama ĉi-terena sperto. Tial la aŭtoro prezentiĝas, ĉefe, kiel kompilanto. La liston de la uzita literaturo vidu fine de la artikolo.

Anstataŭ enkonduko

„La ĝisnuna Esperanta kritiko havas du ĉeftendencojn: detalan zorgan elsarkadon de la lingvaj pekoj kaj pardoneman indulgon, se temis pri literatura valoro. Laŭ mia opinia la unua tendenco eĉ nun ne estas forlasebla, ĝi ĉiam devos esti grava vidpunkto... sed la tempo de la dua tendenco forpasis nereteneble. Nun la Esperanta literaturo jam havas altkvalitajn verkistojn kaj en la originala kaj en la traduka parto; jam alvenis la tempo distingi... ni rekonu niajn verajn talentojn, ni klarigu iliajn kvalitojn; kontraŭe ni komprenu, ke aliaj, eble ankoraŭ modaj verkistoj jam nekontesteble apartenas al la pasinto; ni aprezu ilian literaturan signifon, sed ni ne prisilentu, ke sian karieron ili dankas al sia feliĉa senkonkura situacio".

La unua efektiva Esperanta kritikisto L. Tárkony jam antaŭ pli ol 50 jaroj instigas onin studi en la Esperantaj verkoj ne la oftecon de preseraroj, mistajpoj k.s., sed la valoron. Sed kiel oni studu ĝin? Nu, samkiel ĉiujn aliajn literaturojn kun konsidero de nuresperantaj specifaĵoj. Banale? Sed ja tiel. Fakte, kiel oni studas la literaturon? Ni iom rememoru la popularajn universitatajn konojn.

La scienco pri literaturo nomiĝas literaturologio kaj tradicie dividiĝas je tri grupoj (ne estas mia tasko modifi, nur prezenti):

Teorio de literaturo: TL studas la originon, specifaĵojn, socian realon, kreajn principojn kaj kategoriojn de la literaturo (plu ni uzu la vorton literaturo en la senco de 'beletro').

Literaturhistorio: LH studas la evoluon de la literaturo, difinas la lokon kaj signifon de specialaj literaturaj fenomenoj — beletraj kaj kritikaj verkoj, apartaj verkistoj kaj literaturistoj, ĝenroj kaj metodoj.

Literatura kritiko: LK estas prezento kaj analizo de aktualaj literaturaj fenomenoj, takso de ilia signifo por la nuntempo.

Krom la tri ĉefaj branĉoj la literaturologio establis por si helpajn disciplinojn: bibliografio, tekstologio, historiografio, kiuj estas la bazo por serioza literatura laboro. Krom la iiteraturologio la literaturon studas ankaŭ aliaj sciencoj kaj disciplinoj, kies primara esplor-objekto ne nepre estas literatura: lingvistiko, artologio, psikologio, historio, filozofio, sociologio k.a.

La objekto de nia hodiaŭa parolo estas LK. Necesas tuj diri, ke la tri literaturologiaj disciplinoj, kiujn ni menciis, strikte ligitas. TL povas ekzisti nur baze de pristudo de apartaj verkoj, ĉar ne eblas establi la kriteriojn tute arbitre; aliflanke LH kaj LK interferas: kritikisto ne kompetenta pri la evoluo de la literaturaj tendencoj nepre malĝustos en sia takso. Li ne scios juĝi la verkon nova aŭ remaĉa kaj inverse... Tial ni frontu LK-on ĉiam memorante pri la ĵusdirito.

La ĉefa kriterio de la kritiko

La kritikon naskis la gazetaro tra kiu ĝi direktiĝas al la legantaro kaj aŭtoroj. La unuaj kritikistoj aperis el la plej intelekta frakcio de la publiko mem. Kiel supre dirite, la ĉefa adreso de LK estas la legantaro (publiko), al kiu ĝi strebas taksi kaj komprenigi la analizatan verkon. La objekto (analizato) povas esti aparta verkisto, verkaro de unu aŭtoro aŭ tuto da verkoj de kelkaj aŭtoroj.

La adreso kaj direkto de LK determinas ĝian diferencon disde la aliaj disciplinoj. Nome, ĝi orientiĝas al legantoj kaj ŝatantoj de literaturo, sed ne al literaturistoj, kiujn — primare — priservas TL kaj LH. Sekve, argumentado de LK estas pli populara kaj malpli scienca (faka) ol tiuj de TL kaj LH. La adreso determinas ankaŭ rapidecon de la reago kaj kontinuecon de la publikaĵoj. Akcesore, LK adresiĝas al la aŭtoroj; ni memoru la grandan rolon de tiaspeca kritiko de V. Belinskij kaj N. Dobroljubov, kies verkoj orientis kaj edukis ne nur la publikon, sed ankaŭ verkistojn.

La alia specifo estas, ke LK studas la aktualan tuton de literaturo plentorente, ne nur la tn. mejloŝtonojn kaj geniulojn je kiuj metas sian atenton, ekz-e, literatur-historiisto. Ĉia beletra produkto estas objekto de la literatura kritiko.

Ni scias, ke etimologie 'kritiki' signifas 'juĝi'. Niakaze, juĝi pri valoro de arta verko. La fundamenta kriterio laŭ kiu oni juĝas artaĵon, ankaŭ literaturan verkon, estas estetiko, koncepto pri belo. Tiun elementan tezon ni ilustru per la vortoj de V. Belinskij.

„Ĉiu artaĵo devas esti analizata kun nepra konsidero de la rilato de la aŭtoro al la socio... aliflanke... difino de la estetika valoro de la verko devas esti la primara afero de la kritiko. Se la verko estas negative taksita dum la estetika analizo, ĝi jam ne meritas la kritikon historian".

Sekve, por la kritikisto ege gravas akreco de la estetika kaj literatura sento. Eblas instrui kaj lerni kompreni aŭ analizi la literaturajn verkojn, enkapigi multajn utilajn historiajn sciojn kaj metodojn, sed enkapigi la estetikan guston ne estas eble. La neglekto havas duoblan rezulton:

1. Neakcepto de nuancitaj verkoj kun subtila konstruo, sen deklaroj kaj intence emfazitaj pozitivaj kaj negativaj protagonistoj;

2. Trolaŭda de arte feblaj, grizaj verkoj, kies ideologia laŭdoktrineco estas senkontesta laŭ nunaj kondiĉoj.

La arta percepto signifas riĉecon de asociacioj: ju pli multas asociaciaj bildoj kaj imaĝoj, des pli plenas la estetika koncepto.

Tute noramalas, ke diversaj kritikistoj diverse taksas la saman objekton, ĉar ili povas starti el diversaj sintenoj aŭ meti malsamajn akcentojn (eduka valoro, estetika ĝuo, noveco), sed oni prefere evitu absolute impresisman kritikon. Tia persona kritiko deduktanta ĉion el si mem bazas sin sur nur propraj konceptoj, sentoj, preferoj kaj gusto. La takso „plačas — ne plačas" (trafe titolata 'bonhumora analfabeteco') neglektas sciencan metodologion kaj argumentadon, ne difinas lokon de l'verko aŭ aŭtoro en la aktuala kaj historia skaloj.

La kritikisto trovas en verko tra subjektiva analizo objektivajn tendencojn, rilatajn al la socia vivo. Tiu konekso al la realaj fenomenoj, metodologio kaj jamaj socioj estas nomata historia analizo, diference disde la estetika. Ĝi grave akcesoras ĝin kaj ebligas pli adekvatan juĝon.

La dua aliro

Ĉar la plej evidenta kaŭzo de la verko estas aŭtoro, la plej malnova kaj uzata metodo fontas el studo de la personeco kaj biografio

de la aŭtoro. Certe, tiu vojo povas klarigi iun elementon, tamen ne estas la universala rimedo, eĉ kiam la verko posedas biografiajn koloron aŭ originon. En beletraĵo eĉ plej strikta ligo kun la vivo de la verkinto ne rajtigas nin identigi ĝin kun la realo. Ofte, tiu metodo malhelpas, ĉar ĝi ne konsideras literaturan tradicion, substituante ĝin per la vivo de l'kreinto. Aliaj metodoj de la historia aliro estas filozofia, psikologia kaj socia. La lastan oni aplikas plej vaste.

La literaturo estas integrita en la socion: ĝi estas socia kreaĵo, samkiel aŭtora, ĉar nur la socio naskis la literaturajn rimedojn kaj konvenciojn, kaj la literaturo „montras" la vivon aŭ ĝian speguliĝon (ne nur la socian vivon, sed ankaŭ la naturon, intiman mondon de unika persono...). La verkistoj havas certan socian engaĝon, ricevas socian agnoskon kaj pozicion, adresas al la socio. Tamen la problemo alias: ofte oni priparolas la rilaton de la literaturo al speciale elektita politika aŭ ekonomia sistemo, kiuj doktrinigas la arton (ankaŭ la literaturon). La kritiko bazanta sin sur tiela koncepto preteratentas la koncepton pri belo, preferas tiun de iu politika aŭ klasa prefero (rememoru la cititan fragmenton el Belinskij). Tia kritikisto nur perescepte klarigas, ekz-e, la fakton, ke preskaŭ ĉiuj rusaj grandaj verkistoj apartenis al aristokratio aŭ estis burĝoj. Kvankam kelkaj fervoruloj „pruve" verdiktas, ke Puŝkin esprimis interesojn de la bankrotiĝanta nobelaro, kaj Gogol — tiujn de ukrainiaj terenet-posedantoj. Ĉiulande la aŭtoritatoj penas diversgrade kaj diverssukcese kontroli la literaturon per negativaj (cenzuro, silentigo, persekutoj, librobruligo) aŭ pozitivaj (laŭdado kaj kompenso de naciismo kaj lojaleco al la reganta doktrino) rimedoj, kiujn oni neniel povas nomi estetikaj. Ni ja memoras, ke beletro estas senfunkcia (neaplika) literaturo, diference dis de la religia, politika, edifa aŭ propaganda literaturoj.

Influon de la socio (aŭtoritatoj, legantaro, normoj) reciprokas inversa influo de artisto je la socio. Ja la artisto tra siaj verkoj — ofte senintence — ne nur montras la vivon tia, kia ĝi estas, sed ankaŭ tia, kia ĝi, liaopinie, devas esti. Spure al tiuj verkoj legantoj povas taksi sin, kompari al la etalono, plani sian vivon. Ekz-e, en la mezeŭropaj landoj la verkistoj kaj intelektuloj grave kontribuis al la ŝtata formiĝo de siaj nacioj. Rememoru ankaŭ pri la influo de Goethe, Dostojevskij, Tolstoj, Petőfi al la publika opinio, institucioj kaj junularo de sia epoko. En tiaj okazoj oni kutimas paroli pri la „misia rolo" de la literaturo. Sed kial oni rigardu ĉiun verkon el la lumturo de misiismo?

Plia argumento estas, ke tra la prismo de l'beletro oni konatiĝas kun vivo de aliaj epokoj aŭ de aliaj popoloj. Tial iuj verkoj titolatas „la enciklopedio de l'popola vivo" k.s. En nia lando Puŝkin, Gogol, Turgenev, Tolstoj, Ĉeĥov, Ŝoloĥov, Ŝukŝin k.m.a. faris tiajn bildojn, sed klaras, ke la beletrajn prezentojn kaj imaĝojn necesas garni per objektivaj historiaj dokumentoj. La historiistoj nur escepte laboras surbaze de l'beletro, ĉu?

Certe, la aliro devas esti sinteza kaj kompleksa. La demando „ĉu la artaĵo estas bona?" estos diskutata ankoraŭ longe kaj diverse, kvankam la koncepto 'artaĵo' — 'belo', restos la kerna kriterio.

Produkto de la kritika laboro

Tiu ĉi ĉapitro plej magras en la referaĵo, ĉar interesitoj havas tutan oceanon da fakaj helpiloj, kiuj celas rutinigi la kritikiston. Nu, ni povas akcepti, ke la kritikisto normale agas laŭ kutima skemo:

a) Estetika percepto kun analizo-elementoj dum la legado;
b) Pripenso de la aŭtora verko en ĝiaj temo, ideoj, karaktero, stilistiko, protagonistoj k.a.;
c) Sintezo (baze de la analizo) de sia bildo, kunigo de la diserigitaj elementoj en komparo kun la literatura procezo;
d) Verko de artikolo aŭ de recenzo;

Proksimume same oni juĝas ankaŭ verkiston aŭ procezon. Atentu, ke malgraŭ sia tuteco ĉiu verk(et)o videbligas kelkajn nivelojn: formalan (metriko k.s.), konkretan (fabulo, protagonistoj) kaj abstraktan. Ju pli funden venas la kritikisto, des pli plenan kaj koheran analizon li produktas.

La kritikisto adresante al la legantaro konsideras kelkajn specifaĵojn de LK, nome: titolo de la kritikaĵo; kontinueco kaj interna logiko; stilo de la recenzo. Uzante la sciencan nomenklaturon kaj aparaton LK nur escepte aplikas la terminologion en sia rezulta produkto. Tiu estas rezervita por TL kaj LH. La stilo ne foras de beletro, publicistiko aŭ ordinara stilo.

La tradiciaj kritikaj ĝenroj estas recenzo, artikolo, artikolo-recenzo (kiam la verko nur provokas kaj stimulas elmontron de aliaj pensoj: tipeco, ĉefa ideo...), revuo (ekz-e, panorama jar-revuo), antaŭkaj postparolo. Ankaŭ aliaj ĵurnalistaj ĝenroj aplikatas: felietono, eseo, dialogo, letero, polemikaĵo k.s. Tion ofte determinas la karaktero kaj emoj de la kritikisto, ne la konstruo de la kritikata verko. Ekz-e, nun multaj ŝatas eseojn, en kiuj analizo faratas el lirika, persona vidpunkto, stila kaj forma subtilecoj; ĝi celas ankaŭ beletran efekton, ne nur la logikan; en ĝi reliefiĝas subjektiveco. Aliflanke staras teoriaj artikoloj, kiuj proksimas al TL-verkoj. Ekzistas nuancitaj klasifoj, sed nia celo foras de tiu klasifo. Ni nur emfazu, ke necesas distingi inter recenzo (LK), prinotaĵo (bibliografia kategorio) kaj reklamo (eldoneja artifiko) — tiun distingon ankoraŭ ne bone lernis niaj Esperantaj redaktoroj.

La kazo de Esperanto

Nu, el tio ni komencis. La Esperanta kritikisto frontas kelkajn specifaĵojn, kiujn ne renkontas naciliteraturaj fakuloj. Tiuj aferoj ege spitas objektivecon. Jen, la ĉefaj:

1. La pioniraj prozelitoj de Esperanto nature opiniis la lingvon esti komunika faktoro, kiu nur sekundare rolas estetike. Tial longe dominis (eĉ nun ekzistas) la konvinko, ke la literaturo devas havi primare propagandan efikon. „Ja ni ne poemojn per ĝi verkos" — publike deklaris Zinovjev en la unua granda artikolo ruslingva pri Esperanto (Kolosja, 1890, N7). Nature, por la propagando kaj altiro de novaj homoj pli taŭgis belaj volumoj kun konataj verkoj de Tolstoj, Shakespeare aŭ Molière, sed ne efemeraj originalaĵoj verkitaj far dio-sciaskiu (eĉ la talenta originala novelisto Lejzerovič same polemikis). La situacio ŝajnas sami ankaŭ en aliaj planlingvoj, havantaj literaturajn provojn. Oni etikedas tiun fenomenon „tradukismo").

2. La konvinko de la Esperanta publiko nepre sugestis al la averaĝa esperantisto identigi la majusklan Movadon (aŭ iun organizon, kiu nomas sin Universala aŭ Tutmonda) kun la tuta kultura fenomeno de Esperanto.

3. Laŭ sia specifo la komunumo, kia estas la parolantaro de Esperanto, malŝatas molesti ion verkitan en lá Karega Lingvo (sian subkulturon). Tiu specifo nocas adopton de normalaj kritikaj kriterioj, substituas ilin per etmensa kalkulado de mistajpoj kaj longa rezonado pri frunto/fronto, kiuj for-foras de la literatura kritiko.

Krome oni havas aliajn problemojn, kiujn ne eblas tuj solvi el vidpunkto de ajna nacilingva aŭ ĝenerala literaturologio, dum manko de kohere ellaboritaj teorio kaj historio de la Esperanta literaturo ne permesas argumentite respondi.

1. Socia bazo de la esperanta literaturo... Ne ekzistas esperantaj nacio kaj folkloro. V. Benczik sugestas, ke la bazo ne nepre estu nacio — oni komparu kun la internacia sciencfikcia aŭ religia literaturo legataj tutmonde, sendepende de la lando kaj lingvo, far „sia" legantaro. Temas pri la subkulturo de la Esperanta komunumo. Ankaŭ la radikoj povas esti ne folkloraj, sed ideaj kaj parencaj al la verkoj kiaj

Utopia, Don Quijote aŭ tiuj de Voltaire, t.e. al universale humanismaj verkoj.

2. La Esperanta realo. Tre gravas konsidero de la Esperanta vivo en la periodo kaj lando kaj de la situacio en la esperanta literaturo Eldonejoj, merkato, honorarioj, legantaraj preferoj, literatura vivo, kritiko). Oni konsideru, ke nur esperantlingva verkado apenaŭ donas ĉiutagan panon al la verkisto, do...

3. Motivoj. Eĉ tiuj gravas, speciale, se la aŭtoro ne profesie agas. Ni jam menciis la propagandan motivon, sed estas ankaŭ aliaj:

— lingvoeduka, didaktika (socia propagando) kiel ĉe J. Baghy en „La verda koro";

— lingvoevoluigo, ekzemple, en iuj tradukoj kaj verkoj de K. Bein kaj K. Kalocsay;

— estetikaj pretendoj.

Nur la lasta klaso (iomgrade ankaŭ la lingvoevoluiga) reprezentas la beletran literaturon de Esperanto.

4. Naciaj influoj. Esperanto estas Eŭropa fenomeno kaj ĝia alikontinenta hejmiĝo dependas de penetro de l' Eŭropa (kristana) civilizo. Aliflanke, en diversaj historiaj etapoj, diversaj Eŭropaj kulturareoj dominis. Ekzemple, la rolo de la pola, juda kaj rusa kulturoj determinis la kulturan elekton kaj evolutendencojn de Esperanto antaŭ la unua mondmilito kaj grave influis la kulturan fonon de Esperanto kaj preferojn de la publiko. Ne malpli gravis la rolo de la intermilita Budapeŝto — la eminenta „Literatura Mondo" de K. Kalocsay epigonis al la hungarlingva „Nyugat" de M. Babits. Parenteze, tiu influo ne nepre dependas de la kvanto de esperantistoj en la areo — la Bulgaria kvoto kaj influo ne koheras.

5. Malfruoj. Tiun interesan problemon montris G. Silfer, kiun mi paŭsas laŭ kelkaj aspektoj:

Metriko. Grabowski, Baghy, Kalocsay estis apologetoj de la rimismo, kvankam libera versfarado jam klasikiĝis en Eŭropo, el kiu kontinento fontas la Esperanta literaturo. Aldoniĝas ankaŭ la nacia influo (vd. §4) de malpli evoluintaj orienteŭropaj poezioj.

Tradukoj. V. Benczik asertas, ke multaj tradukoj estas eĉ rekte malutilaj, precipe, se ili aperas ĉe esperantista eldonejo. Plejparte, la tradukoj portas nenion novan por la Esperantaj literaturo kaj stilistiko. En la rusa literaturo la traduka koncepto eksmodiĝis komence de la XIXa jc. Certe, la tradukoj ne povas ne esti, sed ili ne povas normale domini super la sana etna literaturo, kiu povas perdi sian identecon.

Ĝenroj. Estas la romano, kiu soklas en la nuna jarcento. La publika opinio juĝas pri la naciaj literaturoj laŭ roman-produktado, sed en Esperanto ĉefrolas la poezia kaj novela ĝenroj. La romana nur ekas, dum la drama preskaŭ mankas.

Specoj. Kino kaj TV revoluciis la kulturon ĉie, sed Esperanto baraktas ĉe la kurtonda radio. Foras de filmo. La Esperanta kulturo restas tro skriba. G. Silfer atentigas, ke la unua 33 l/3 turna disko aperis nur 1966, kaj Angoroj de Jean-Louis Mahé (Lorjak) 1964 plu restas la sola fikcia filmo. La unua songazeto emisiiĝis nur ek 1983. La vidbenda kulturo furoranta tra la mondo eĉ ne marĝenas en Esperantujo.

7. Integriteco. La problemo levita de V. Benczik estas ege grava kaj (dume) senresponda. Ja nur rare eldonatas verkoj kompareblaj inter si, kun simila tem-elekto. Komplikas lokigi freŝan verkon en la sinkrona (horizontala) kaj diakrona (vertikala) skaloj. En la Esperanta literaturo troan rolon havas t.n. periferiaj verkoj, dum la centraj — nature formantaj la kernon de naciaj literaturoj — mankas kiel integro. Eble pro troa malviglo de la literatura vivo kaj izoliteco de la verkistoj. Tiu manko de tradicioj rajtigas onin paroli pri aro da verkoj sporade verkataj diverslande en Esperanto, sed ne pri la Esperanta komunumo aŭ pri verkoj de diverslandaj literaturoj (hungara, franca, sovetia multnacia literaturo...). En kiu kadro, en la nacia aŭ Esperantuja oni klasu la verkojn kaj la aŭtorojn? La internacieca karaktero de la merkato, internaciaj revuoj (Literatura Foiro, Fonto k.s.), samtempa reago de la kritiko dissemita diaspore tra la mondo sugestas la kazon de la Esperanta literaturo, tamen povas esti esceptoj, precipe ĉe longa izolo en nepagipovujoj.

Do, la Esperanta kritikisto ricevinte recenzotaĵon konsideru la specifaĵojn, certe, sen forgesi pri la ĉefa kriterio. Fakte, oni rajtas diri, ke la Esperanta kritiko malfruas samkiel la literaturo mem. La evoluo de la Esperanta kritiko estas ege malrapida. Oni povas vidi kvar periodojn.

1. Ĝis mezo de la 1920-aj jaroj (do, dum kvar jardekoj) regis la opinio, ke la verkistoj prefere ne poluu la lingvon; la poetoj estis kvazaŭ atencantoj de la Netuŝebla. Rimismo, tradukismo. Kiam la literaturo defendas sian ekzistorajton, valora kritiko ne povas ekzisti.

2. L. Tárkony entreprenis la unuan seriozan esploron kritikan, substrekinte neceson studi la pli fruan sperton. Tamen, kurioze, lin ege influis la personeco de K. Kalocsay, kies opinio estis la primara kriterio por la unua Esperanta kritikisto (rememoru la takson pri J. Baghy).

3. Post Montevideo (1954) W. Auld deklaris la Esperantan kulturon indiĝena kaj ligis ĝin al la progreso de l'Movado (UEA), kiu kontinue progresas. Tial — Aulde — la nunaj aŭtoroj estas pli bonaj ol la fruaj, kaj la futuraj superos la nunajn. Sekvintajn jarojn ekaperis katalogoj kaj „literaturhistorioj", listigintaj eĉ la plej bagatelajn nomojn, sed forgesintaj pri „kio estas" la Esperanta literaturo. Ek tiam oni abunde parolas pri la t.n. „skoloj", mejloŝtonaj verkoj, periodoj k.s.

4. En la 1970-aj jaroj reliefiĝis du tendencoj (ambaŭ falintaj pli frue dum la movada renesanco en la 1950-60aj jaroj). La historian reprezentas ĉefe V. Benczik. La dua ellaboris koheran teorion pri la Esperanta literaturo, kiel kerna parto de la Esperanta subkulturo, ne de la indiĝena aŭ tutmonda. Subkulturo de la Esperanta komunumo, kiu kompareblas, nu — al tiu de la internacia skolta komunumo. La subkulturo povas diri ion valoran ankaŭ internacie, sed ne nepre. La teorio disvolviĝas estetike kaj sociologie kaj reliefiĝas literatur-kritike tra studoj, artikoloj, recenzoj kaj polemikaĵoj de C. Conterno, C. Minnaja, G. Silfer kaj N. Rossi, ĉefe en kadro de la iniciatoj de la Kooperativo de Literatura Foiro. En la plej lastaj jaroj aperas signoj de la kritika laboro ankaŭ en periferio de la Regno Verda, eĉ en Uralo, kie entuzisma grupeto ĉirkaŭ la almanako Sezonoj klopodas LK-kampe, kaj en unu el kies seminarioj estis prezentita ĉi tiu modesta raporto.

ESENCA BIBLIOGRAFIO

Auld W. Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto. — Saarbrücken, 1979.
Benczik V. Literaturlegado en fremda lingvo — Hungara Vivo, 1974, N-ro 4.
Benczik V. Studoj pri la Esperanta literaturo. — Takasago, 1980.
Carlevaro T. Literaturo — Esperanto en perspektivo. Faktoj kaj analizoj pri la internacia lingvo (Red. I. Lapenna.) — London; Rotterdam, 1974.
Ĝivoje M. Panoramo de la Esperanta literaturo. — Zagreb, 1979.
Kalcosay K. Kion fari por la Esperanta literaturo? — Hungara Vivo, 1971. N-ro 3.
Kalocsay K. Skizo de Esperanta literaturhistorio — Gvidlibro por supera ekzameno (Red. A. Pechan.) — 2a eld. — Budapest, 1979
Knĺchal O. Pensoj pri la kritiko — Hungara Vivo, 1976, N-ro 5.
Mayer H. Studoj pri la Esperanta literaturo: Recenzo — Literatura Foiro, 1981, N-ro 70.
Pov K. Esperanta literaturo en 1979 — Hungara Vivo, 1980, N-ro 4.
Silfer G. Enkonduko al literatura kritiko. — 2a eld., ampl. — Ĝenevo; Milano, 1983.
Silfer G. La sepan jaron li estu libera — Literatura Foiro, 1977, N-ro 43-44.
Silfer G. Por kvalita kresko de la traduka ĝenro — Literatura Foiro, 1980, N-ro 59.
Tarkony L. De paĝo al paĝo, — 2a eld. — Budapest, 1976.
Waringhien G. La Budapeŝta skolo — Scienca revuo, 1967, N-ro 1.
Baranov V., Bočarov A. Surovcev J. Literaturno-ĥudojestvennaja kritika. — Moskva, 1982.
Belinskij V. Vzgljad na russkuju literaturu. — Moskva, 1983.
Wellek R., Warren A. Teorija literatury. — Moskva, 1978.
Škiovskij V. O teorii prozy. — Moskva, 1983.



DEPARTEMENTO BÈKÈS troviĝas en sud-oriento de Hungario apud la landlimo de Rumanio. La ĉarman pejzaĝon trafluas la rivero Körös kun multaj pitoreskaj kurbiĝoj preter la vaste etendiĝantaj kamparoj de sunfloroj kaj maizoj, tritikoj. Sur la bordoj fiŝkaptistoj atendas plezure predojn el inter la multaj fiŝoj, pli fore ĉasistoj ne devas longe serĉi la pafindajn el la abunda bestaro, troveblaj vere multloke. La naturo prezentas tie ĉi multe da ĝuo; ankaŭ ĝia protektado estas bone observebla: o tidoj vivas en aparta rezervejo ĉe *Dévaványa,* kie eblas viziti la vivejon de tiuj plej grandaj stepaj birdoj. Pli ol interesa estas la tre rigardinda protektata arbaro *„Arboretum"* apud urbo *Szarvas.* Kaj pli sude jen *la ĉevalaro de Mezőhegyes,* kies pli ol 900 belaj ĉvaloj meritas la admiron de la tutmondaj vizitantoj, el kiuj multaj ne preterlasas la bonan ŝancon de la rajdado tra la kampoj.

La ŝatantoj de la arkitektutro vizitas la kastelon Wenekheim ĉe la ĉarma vilaĝo *Szabadkígyós*, ankaŭ la interesan monaĥejon *Csolt.* Tamen la plej multaj vizitantoj -- ankaŭ veturante al la limtrapasejo -- rigardas la pitoreskan urbon *Gyula*, promenas preter la romantika riverbordo, kaj banas sin en la sport-naĝejo kaj en la kuracakva baseno de natura varmfonto.

En la moderna Termal-Kampadejo troveblas 20 domoj, kaj lokoj por 30 loĝveturiloj kaj 200 tendoj.

En la unuaklasaj hejteblaj dometoj estas kvarlitaj ĉambroj. Dise en la kampadejo funkcias duŝejoj kaj lavejoj, oni trovas eĉ plurajn subĉielajn fajrejojn por plezure rosti aŭ baki lardon aŭ similajn delikataĵojn.

La matenmanĝon (grupoj ankaŭ la vespermanĝon) oni konsumas en la salonoj de la akceptejo, kie troviĝas ankaŭ bufedo. En la granda salono oni ofte aranĝas konferencojn kaj festenojn, ankaŭ familiajn. La infanoj ĝuas la ludplacon kaj la sportilojn. Post 10 minuta promenado tra aleo oni alvenas al la varmakvaj basenoj de la bele situanta urba banejo. Folklora muziko, danco kaj multspecaj hungaraj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj estas la agrablaj plezuroj, kiujn prezentas la proksima drinkejo-restoracieto, „Tölgyfa-ĉarda".

PROGRAMOJ

A) Nupta festeno en Szarvas

Dum 3 tagoj kaj 2 noktoj oni loĝas en du-litaj hotelĉambroj (kun banĉambro), kaj ĝuas plenan pensionon. Kotizo: 1950 forintoj.

La 2-an tagon vespere: gaja, muzika slovaka nupto-festeno kun danco kaj vespermanĝo, inter floklore vestitaj junuloj kiuj prezentas nacian programon. Gaja forŝtelo de l' fianĉino kun altplezura fina dancado kune kun la gastoj.

(:Laŭdezire ankaŭ en la urbo Békéscsaba, je konvenaj datoj.:)

B) Refreŝiga ferio en Gyula

Dum 7 tagoj kaj 6 noktoj oni loĝas en la Termal-Kampadejo en 4-lita ĉambro.

Matenmanĝo en la kampadejo, vespermanĝ en la restoracieto Tölgyfa.

Libera uzo de la kuracbanejo. -- Kotizo: (en kvarlitaj ĉambroj) 2645 Ft dum antaŭ kaj post-sezonoj; 2944 Ft dum ĉefsezono.

C) Familia ferio apud akvoj en Szarvas kaj Békésszentandrás

Tuta semajno apud la stagnantaj fluujoj de riveroj Körös, en apartaj ferio-domoj (kun kuirejo).

Kotizo: 700 Ft/tago/domo.

BÉKÉSTOURIST
Békéscsaba, Tanácsköztársaság útja 10.
Telefono: (36)-66-23-448
Telekso: 83-408

krome en

Gyula, KossuthL. u. 16.
Telefono: (36)-66-62-261
Telekso: 83-560
Szarvas. Szabadság u. 25.
Telefono: 11-122
Thermal Camping, Gyula, Szélső u. 16.
Telefono: (36)-66-62-240
Arany Szarvas Camping, Szarvas, Erzsébet-liget.
Telefono: 13-277

AŬTOMATAJ MEZURINSTRUMENTOJ

de la Fabriko de Elektronikaj Instrumentoj EMG

Rapide kreskas nuntempe la graveco de la elektroniko – ankaŭ el ekonomia vidpunkto – , ĉar la plej multaj produktaĵoj de la rapide evoluantaj industrioj enhavas pli kaj pli da elektronikaĵoj. Samtempe oni ĉiuterene postulas pli modernajn, pli fideblajn elektronikajn aparatojn, kiuj devas kontentigi multspecajn, sekve ofte tre komplikajn taskojn.

Tiuj postuloj estas kontentigeblaj – eĉ per elektroniko – nur helpe de multe pli vasta aŭtomatizado de la elektronikaj aparatoj. Ĝuste tial disvastiĝas nuntempe la komputilaj sistemoj por projektado (CAD), fabrikado (CAM) kaj testado (CAT), kompreneble ankaŭ ties kunigitaj kompleksoj (CADMAT). Temas pri ege komplikaj instalaĵoj, kies fidindecon garantias same aŭtomatizitaj test-aparataroj, kiuj ekzamenas la produktaĵon dum la fabrikado.

La Fabrikado de Elektronikaj Instrumentoj EMG – fondita en la jaro 1950 – projektas kaj fabrikas tiucelajn instrumentojn kaj aparatojn, tutajn mezursistemojn, kompleksojn. La mezurinstrumentoj kaj industriaj elektronikaĵoj de EMG, sekvintaj la plurfazan evoluon de la moderna elektroniko, daŭre prezentas plej modernajn, altfideblajn produktaĵojn laŭ postuloj de la mondmerkato.

Nuntempe la fabriko denove renovigas sian produktogamon, precipe celante elektronikizi la laboron de la plej diversaj entreprenoj. En kadro de tiu propra disvolvado EMG plimodernigas la tradiciajn elektronikajn instrumentojn kaj regilojn de ilmaŝinoj. Krom tio estas modernigata ankaŭ la projekta- kaj mezurteĥniko de la elektronika industrio laŭ sistemprincipo. La projektaj kaj modeligaj instalaĵoj, konekteblaj kune kun mezuraŭtomatoj en kompleksón, taŭgas por projekti, kontroli kaj helpi la fabrikadon de presitaj cirkvitoj; same por ekzameni antaŭ enigo duonkonduktilajn kaj integritajn erojn, poste aŭtomate ekzameni la pretajn unuojn. La novaj produktaĵoj de EMG forte kontribuas al ŝparado de kvalifikita laboro, krom grave altigante la fidindecon de la fabrikaĵoj. Utiligante tiujn instalaĵojn, la entrepreno fabrikanta elektronikajn aparatojn facile establas por si integritan sistemon de projektado-fabrikado-ekzamenado (TGE).

Paralele al tiuj, estas modernigata, do alĝustigata ankaŭ la manieroj de projektado kaj teknologio, koncerne la instalaĵojn kaj aparatojn produktatajn en la Fabriko de Elektronikaj Instrumentoj. La fidindecon de la varoj, ties eko-



Osciloskopo (tipo 1560)



Encirkvita testilo (tipo 19400)

nomian produktadon garantias moderna komplekso de aparataro. Komputilo helpas jam komence de la projektado la inĝenierojn, precipe pri diversgradaj akompanaj taskoj. En tiu aŭtomatizita projekta sistemo (AUTER) ankaŭ la presitajn cirkvitojn projektas komputilo.

Aŭtomatizita ekzamenado garantias, ke nur senriproĉa materialo estu enkonstruota en la aparatojn. Ekzamenante la presitajn cirkvitojn antaŭ muntado, eblas certamaniere elimini eventualajn problemojn, okazontajn pro materialdifektoj. La moderna fabriklinio, produktanta pretajn „platetojn" de surpresitaj kaj enigitaj cirkvitoj kun aŭtomatizita preparo kaj lutado, ebligas minimumigi homajn erarojn. Ekzamenado de pretaj cirkvit-kartoj dum funkciigo kaj encirkvite rezultigas tian filtradon, kiu permesas enkonstrui en aparatojn nenion alian krom senriproĉaj kartoj. Ĉiujn ĉi metodojn kompletigas zorgema kontrolo en ĉiu fazo de la fabrikado, laŭnecese klimat-ekzameno de la varoj, kiel nepra parto de la moderna teknologio en la Fabriko de Elektronikaj Instrumentoj.

Studante fabrikan procezgrafikaĵon de elektronika aparato kun presitaj cirkvitkartoj, oni vidas, ke tie la plej gravaj ekzamenoj direktiĝas al kontrolo de la alvenintaj materialoj kaj eroj, al ekzameno de la presitaj cirkvitkartoj kaj al la testado de la tuta aparato. EMG fabrikis mem instrumentojn por ĉiuj menciitaj taskoj. Pri tiuj ŝajnas inde mencii almenaŭ kelkajn pensojn.

La kostoj de la malkovro de iu difekto estas des pli malgrandaj, ju pli frue dum la fabrikado ĝi estas trovita. Ĝuste pro tio estas ege grava la ekzamenado de la alvenintaj partoj, eroj de la konstruotaj produktaĵoj. Tion servas la *IC-ekzamenilo de tipo 19680,* kiu kapablas tre rapide mezuri aŭtomate multflanke, krome klasifiki kaj selekti. Diversmaniere kombinitaj partoj de tiu inteligenta mezursistemo ebligas ekzamenadon de analogaj kaj diĝitaj integritaj cirkvitoj, ankaŭ de cirkvitoj ADC kaj DAC.

Integritaj cirkvitoj LSI kaj VLSI estas ekzamenataj pere de la *diĝita testilo de tipo 19700,* kiu ebligas ankaŭ kontroladon de duonkonduktaj cirkvitoj dum la fabrikado. Cetere ambaŭ supre menciitaj aparatoj funkcias ankaŭ helpe de aŭtomata dozigilo.

Karakteristiko-vidigilo estas la *diĝit-stora analizilo de tipo 1577.* Ĝi aparte taŭgas multmaniere figurante ekzameni diskretajn duonkonduktilojn (transistorojn, diodojn, FET-ojn ktp.). La aparato posedas aldonaĵojn ankaŭ alttensiajn.

La *mezuraŭtomato de tipo 19400,* kiel encirkvita testilo ebligas la ekzamenojn dum la pluaj fabrikfazoj. Pere de tiu aparato eblas konvene ekzameni la muntitajn-presitajn cirkvitkartojn kaj la erojn enigitajn en tiujn kartojn.

Por fari la totalan ekzamenadon de la aparatoj, EMG prezentas vastan produktogamon de instrumentoj: signalgeneriloj, impulso- kaj funkciogeneriloj, mezuriloj de moduladoj, osciloskopoj, analiziloj de la logika stato ebligas multrilatan kompletigon de la instrumentaro por la fabrikado. La plej multaj el tiuj estas instaleblaj en mezurkomplekson.

Apud la kampo de la mezurteĥniko, EMG prezentas sin ankaŭ surkampe de la projekta teĥniko. Nia nove perfektigata, *presitajn cirkvitojn projektanta instalaĵo* laboras per komputilaj kolorgrafikaĵoj. Ĝi projektas ne nur cirkvitoplatetojn, kaj krome ĝi prezentas paralele ankaŭ la necesajn informojn por la produktado kaj dokumentado.

Tria parto de la sistemo CADMAT estas la moderna fabrika teknologio. Tiurilate ni mencias nur la *aŭtomatan galvanizilon de presitaj cirkvitkartoj,* kiun EMG propre kreis



Lineara ekzamenilo de integraj cirkvitoj (tipo 19680)

Aŭtomata galvanizilo de presitaj cirkvitkartoj.

ma-spektrojn. Cetere granda parto de la produktado de EMG estas la reguligoj de ilmaŝinoj. Pere de tiuj reguligaj aparatoj eblas funkciigi tornilojn, bormaŝinojn, frezmaŝinojn kaj akrigilojn.

La merkatado de la entrepreno akomodiĝas al la modernigo de la produktogamo. Kiel ni jam aludis, nia ĉefa celo estas komplete kontentigi la mezurteĥnikajn bezonojn de la elektronika industrio, inkluzive liveri ankaŭ la teknologiajn celinstrumentojn.

Tiu celo kompreneble necesigas striktan kontaktadon kun la utiligantoj de niaj varoj, por ekkoni kaj kontinue kontentigi la tutmonde ŝanĝiĝantajn mezurteĥnikajn postulojn. La entrepreno krome volonte kunlaboras ankaŭ kun aliaj entreprenoj.

La modernigo de nia produktagamo kaj la fabrikado de novtipaj, grandaj teknologiaj instalaĵoj igis necese utiligi plurspecajn formojn de negocado. Inter aliaj negocaj formoj, ekzemple

– ni entreprenas kompleksajn mezurteĥnikajn servojn,

– pruntedonante iujn grandajn mezurinstalaĵojn ni kontribuas al ilia disvastiĝo en la industrio; foje ni aplikas tiucele la servojn de fakaj pruntedonaj firmaoj.

Krome estas aplikataj diversaj formoj de inter-entreprenaj kunlaboroj kaj kunproduktadoj kun fabrikoj. Efikecon kaj taŭgecon de nia produktado levas la jam tradicia produkta kunlaboro kaj specialigo ene de Konsilio de Ekonomia Interhelpo (KEI), kiuj daŭre pliampleksiĝas. Same evoluas la senpera inter-entreprena kunlaboro kun multaj entreprenoj de kapitalismaj landoj, kio ankoraŭ estas nur parte utiligata. Tiudirekte EMG intencas agi multe pli laŭ la jam sukcesa vojo.

La produktaĵoj de la Fabriko de Elektronikaj Instrumentoj uzatas vaste tra la mondo en multaj landoj kun bonegaj rezultoj. De jaro al jaro novaj kaj novaj modernaj produktaĵoj venas sur la merkaton el EMG. Daŭrigante la modernigon kaj preferante la grandiozan ekonomian gravecon por kontribui al la altnivela fabrikado de la cirkvitkarto-platetoj.

Ne indas ellasi el tiu ĉi varo-konigo kelkajn alispecajn produktaĵojn, kiuj servas al aliaj sferoj. Jen la multkanala analizilo de tipo 38000, kiu estas unuavice mezurinstrumento de la nuklea fiziko, precipe por akcepti kaj prilabori gade la aŭtomatigo, ni alcelas kreon de integrita komplekso por projektado-fabrikado-kontrolado en la elektronika aparatfabrikado.

Tradukis: Ervin *Fenyvesi*

ELEKTRONIKUS MÉRŐKÉSZÜLÉKEK GYÁRA
H-1163 Budapest, Cziráky u. 26.
Telefono: +36/1/837-950 Telekso: 22-4535

EMG

ĈEFVERKO ESPERANTOLOGIA

Serta Gratvlatoria in Honorem Juan Régulo. Volumen II. Esperantismo. Diversaj aŭtoroj. La Laguna: Universidad de La Laguna, 1987. 790 p. 25 cm. Bindita. ISBN 84 600 4292 8. Prezo: 120,- ned. gld.

Pri la kontribuo de Juan Régulo Pérez al la Esperanta kulturo ne necesas argumenti al esperantisto nur iom klera. Tamen, pri lia profunda agado en la Universitato de La Laguna la esperantista mondo havis malpli da scio: tiun lian laboron ni scias aprezi nur nuntempe, kiam unu post la alia atingis nin la informoj pri diversaj honorigoj, per kiuj dekoris lin la nacilingva profesia medio okaze de lia emeritiĝo. Eble la plej neordinara el tiuj estis la fakto, ke ekde la jaro 1984 portas lian nomon en la urbo La Laguna placo, en la urbo La Palma strato.

Tamen, el la omaĝoj pleje gravas por la kulturo — al kiu la omaĝato dediĉis sian tutan vivon — la kvarvoluma impona eldonaĵo Serta Gratvlatoria in Honorem Juan Régulo, el kiu mi tenas en la manoj la duan volumon, kiu portas la subtitolon Esperantismo.

Antaŭ ol alfronti la preskaŭ neeblan taskon prezenti la enhavon de tiu ĉi trezorejo, staru ĉi tie informoj pri la ceteraj tri volumoj.

En la unua volumo troviĝas studoj pri diversaj temoj, ne Esperantaj, tamen dek el tiuj studoj aperas en Esperanto. Tiujn dek studojn aŭtoris Baur, Bödvarsson, Chen Yeh, Gregor, Haugen, Mallia, Solzbacher, Szerdahelyi kaj Ullman. En la tria volumo (830 paĝa) Esperanto ne aperas, dum la kvara (ĉ. 1000 paĝa) enhavos kelkajn studojn pri Esperanto. En tiu ĉi studo aperos ankaŭ Apendico kun studoj pri Esperantaj temoj.

Revene al la dua volumo: en ĝi aperas 58 studoj el la plumo de sama nombro da signifaj fakuloj pri interlinvistiko kaj diversaj branĉoj de esperantologio. 51 kontribuaĵoj estis verkitaj en Esperanto, tri en la angla, kaj po unu en la franca, germana, hispana kaj rusa. La studoj estis verkitaj laŭ invito fare de Juan Régulo Pérez, kaj la aŭtoro de tiu ĉi artikolo fieras troviĝi inter la invititoj.

Estas malfacile diri ion ĝisfundan sur du revupaĝoj pri verko ampleksanta ĉ. 2,5 milionojn da literspacoj — la ĉisuban prezenton do nepre influas la personaj preferoj kaj ŝatoj de la recenzanto.

Por provi sekvi ian logikan ordon, ni komencu per la cito de du studoj, kiuj pritraktas interlingvistikajn temojn. La unua estas Pri la termino „planlingvo" de Detlev Blanke, en kiu la aŭtoro koncize eksplikas, kiel fortan psikologian rolon havas la terminoj ĝenerale, kaj li konvinke argumentas por nomi Esperanton „planlingvo", anstataŭ „helplingvo", „artefarita lingvo" ktp. La ruslingva artikolo de Aleksandr D. Duličenko (Pri la principoj de kreado de la historio de la lingvoprojektado) tuŝas la metodologion de interlingvistiko, ĝi pledas por pli trafa maniero de la prezentado de lingvoprojektoj.

Parencan temon havas la kontribuaĵo de Werner Bormann: Mondlingvo longperiode. En ĝi estas tuŝata paralele la teorie eblaj formoj de aplikado de planlingvo, kaj la elektinda strategio por la Esperanto-movado. Bormann trovas, ke anstataŭ strebi por la postulo „Esperanto, la dua lingvo por ĉiu", ni devus akcepti la pli realan plurisman celon, t.e. ke Esperanto estu unu el la lingvoj uzataj en la internacia komunikado. Li atentigas krome, ke la lingvo — por ne perdi siajn avantaĝojn — nepre devas konservi siajn simplecon kaj facilecon.

Konforme al la nuna stato de esperantologio estas aparte forte reprezentata en la volumo la lingvistiko. Probal Daŝgupto el Hindujo prezentas detalan analizon pri la adverboj en Esperanto. Imponas en ĝi la vasta aplikado de la atingoj de la moderna lingvoscienco, sed ne malpli la multaj akravidaj observoj pri la riĉeco de la diversaj roloj, kiujn adverboj plenumas en nia lingvo. G. F. Makkink metas sub lupeon la Esperantan difinan artikolon. Li konvinke demonstras, ke estas spertebla granda hezitado pri la uzado de „la", unuavice pro manko de klara normo. Ricevas sian porcion da kritiko ankaŭ PAGE, tute prave. Makkink ripročas pro tio, ke ĝi donas analizan priskribon, anstataŭ kritikan priskribon aŭ motivitan preskribon.

Geraldo Mattos (Brazilo) en ampleksa studo analizas la Esperantan verbon. La titolo de lia referaĵo estas Lingvistika priskribo de la verbo en Esperanto. Kvankam temas pri nefacila legaĵo, valoras la penon digesti ĝin, ĉar Mattos prezentas sistemon koheran, el kiu ne nur teoriuloj ĉerpos intelektan plezuron, sed tiros praktikan utilon ankaŭ ĉiuj uzantoj de Esperanto.

Alia aŭtoro, kiu tuŝas la demandon de la Esperanta verbo, estas Boris Kolker. Lia studo, titolita Kontribuo de la rusa lingvo al la verba sistemo de Esperanto, estas modela verko de la kompara lingvistiko: diafana, kohera kaj profunda. Laŭ lia demonstro la du

verbaj sistemoj havas vere okulfrapajn similecojn.

La franca profesoro Michel Duc-Goninaz alfrontas pli kompleksan temon en sia kontribuaĵo Kiel priskribi Esperanton? Problemoj metodologiaj kaj terminologiaj. Lia elira tezo estas — kaj same argumentas preskaŭ ĉiuj lingvistoj — , ke per la 16 reguloj de la Fundamento de Esperanto ne plu klarigeblas la moderna Esperanto. Tamen, li aldonas, ke „la plidetaligo de la prezentoj (la 16 paragrafoj de la Zamenhofa gramatiko ampleksis 6 paĝojn, kaj la Plena Analiza Gramatiko de Kalocsay kaj Waringhien ampleksas 436 paragrafojn kaj 508 paĝojn) pligravigis la nekoherecon kaj la komplikecon."

Josef Rumler (Prago) disertas pri stilo. Lia Koncepto pri la diversaj stiloj kaj ĝia aplikado al la Esperanta leksikọ enhavas la kutiman argumentaron de la pledantoj por la naturalisma evoluigado de Esperanto. Mi admiras lin pro la senmanka sistemeco de la prezento, tamen mi neniel povas konsenti kun li: la vojo, kiun li montras por Esperanto, estas danĝera, ja ĝi plene senigus nian lingvon je ĝia ĝis nun konservita relativa facileco.

Estas aparte bonvena la 25 paĝa studo de Rüdiger Eichholz: Esperanto kiel interlingvo en maŝina tradukado. Ĝi prezentas detale, kiel funkcios Distribuita Lingvo-Tradukado (DLT), pri kiu la plej multaj esperantistoj havas nur partajn aŭ eĉ tute nebulajn konojn. Eichholz funde konigas ankaŭ la ŝanĝojn en Esperanto, kiujn necesigas la maŝina aplikado, kun klara motivado de ĉiu aparta ŝanĝo. Fine de la artikolo li metas la demandon: kiujn sekvojn la realigo de DLT havus por nia movado? Ne eblas ĉi tie ripeti liajn konsiderojn, kiuj ĉiuj antaŭvidas nur avantaĝojn por Esperanto. La ĉefa avantaĝo estos la daŭra profesia ĝisdatigo de la Esperanta terminaro, almenaŭ sur la kampoj, sur kiuj DLT aplikiĝos.

Krom la supraj lingvistikaj kontribuaĵoj aperas kompreneble pluraj aliaj, kiuj pritraktas pli striktajn temojn, kiel esperantigo de loknomoj ktp.

Havas kulturhistorian gravecon la studo de Alec Venture: La historio de la Esperantaj lingvaj institucioj. Esence la saman temon prilaboras La Akademio de Esperanto: starigo kaj esenca rolo de André Albault, nuna prezidanto de la Akademio, kaj tiu paraleleco donas okazon por interesaj komparoj.

Tre bonvenaj kaj instruaj estas la kontribuaĵoj Kulturbazo historia de la Esperanto-movado de William Auld, kaj Esperanto: kulturo, lingvo, historio de Humphrey Tonkin. Ambaŭ studoj klopodas trovi la nutrogrundon de la Esperanta kulturo, helpante tiel refuti la akuzon pri senradikeco, kiun vorton uzas ne nur malamikoj de Esperanto, sed ĝi hantas ankaŭ multajn fervorajn disĉiplojn. Estus bone, se tiuj du studoj povus veki la intereson por plia esplorado de tiu problemaro.

Konforme al la malforta pozicio de la movada sociologio, primovadaj studoj maloftas en la volumo. Oni povas trovi nur du tiakarakterajn kontribuaĵojn: Nuntempo kaj Esperanta idearo de Tadeusz Ejsmont, kaj Some social sources of resistance to Esperanto de Peter G. Forster. Ankaŭ tiuj ĉi du studoj ekzamenas ne eksplicite la movadon mem, sed la rilatojn inter la movado kaj la nuntempa mondo, kio kompreneble estas tre grava temo, kies esplorrezultoj devus signife influi ankaŭ nian movadan strategion. Ejsmont trovas, ke Esperanto elvokas en diversaj kulturaj medioj la sekvajn reakciojn: aprobo, malaprobo kaj objektiva rilato al ĝia ekzisto. Ekzistas nenia dubo, ke el la tri sintenoj por ni pleje valoras la lasta, ĉar ĝi originas ne el emocia, sed el realisma, pragmatisma fonto, kaj tiel ĝi estas la plej firma el ĉiuj tri. Koncerne la studon de Forster, estas bedaŭrinde, ke ĝin ne sekvas esperantlingva resumo.

Kompreneble, ne mankas el la volumo kontribuaĵoj pri la Esperanta literaturo. Vlastimíl Novobilsky eseas pri Kontribuo de ĉeĥaj verkistoj al la Esperanta literaturo donante modelan prezenton pri la tiuterena aktivado ekde la pioniro Frantisek Vladimír Lorenc (1872-1957) ĝis Oldrich Kníchal (1939-). Nur rimarketo koncerne lian konstaton pri Vladimír Vána (1932-), kiu, laŭ Novobilsky estas „ekskluzive proza tradukanto" — nu, mi ne tiel plene ignorus la originalan verkadon de Vána.

La titolo de la studo de Aldo de' Giorgi — La rolo de eldonistoj en la Esperanto-Movado kaj la krizo de la Esperanta poezio post STAFETO — jam kvazaŭ resumas la enhavon. Ĝi estas miniatura skizo pri la historio de la Esperanta poezio, kiu nun ja vere estas en krizo.

Ankaŭ Edwin de Kock verkas pri poezio. En La Regula STAFETO kaj la originala Esperanta poezio li, kiel kutime, verve pledas por la prioritato de la originala poezio. Interese li pritraktas en la studo la periodigajn problemojn de la Esperanta literaturo, lanĉante mem la jenan propran proponon: unua periodo (tempo formiĝa) 1887-1920; dua periodo (tempo maturiĝa) 1921-1951; tria periodo (tempo normaliĝa) 1952-1984. Mi mem forte simpatias kun tia periodigo, kun la sola escepto, ke la starton de la dua periodo mi ŝovus unu jaron antaŭen, kiam ja ekaperis Literatura Mondo. Krome, tia periodigo necesigas nepre difinon de subperiodoj.

Mi ĝue legis — malgraŭ mia magra franca lingvoscio — la franclingvan studon de Marie-Therèse Lloancy pri la vortludoj en tri verkoj de Raymond Schwartz: La Zamenhofa Esperanto, Kiel akvo de l' rivero kaj ...kun siaspeca spico!

La plej grava priliteratura kontribuaĵo de la volumo venas el la plumo de Henri Vatré: Vort-statistikaj esploroj ĉe 15 novelistoj. Laŭ mia scio ĝi estas ĝis nun la sola provo, kiu aliras Esperantajn literaturajn tekstojn kun pretendo de kvanta analizo, kiu ja povas doni firman bazon por kvalitaj analizoj. Kvankam la tekstobazo de li prilaborita ne estas tre granda (li prenas po 7000 vortajn tekstojn el la verkaro de la koncernaj 15 novelistoj), liaj rezultoj estas tre interesaj kaj kelkrilate eĉ revelaciaj. El la enkonduka parto de la studo — kie estis tuŝitaj ankaŭ poemaroj — ni ekscias, ke en la 20.000 vorta Strĉita kordo de Kalocsay estis uzitaj 1694 diversaj radikoj, dum en la nur 10.000 vorta Duonvoĉe de Maŭra 1975 diversaj radikoj! Do, Kalocsay, kiun siatempe minacis ekskomuniko pro lia „multvorta neologismemo", montriĝas vortŝpara kompare al Maŭra. Alia pripensiga konstato estas la jena: dum en franca en 50.000 vorta teksto la plej oftaj 4000 vortoj formas 95% de la tuta teksto, en Esperanta samlonga teksto nur 745 malsamaj radikoj konsistigas 95%. Tio elokvente pruvas la facilecon de Esperanto, sed el stila vidpunkto en tiuj ciferoj sendube kaŝas sin danĝero de monotoneco. Ĉiukaze, estas dezirinde, ke Vatré daŭrigu siajn tiukampajn esplorojn, kaj ke tiuj esploroj ricevu vastan publikecon.

Baldaŭ mi atingos la limon de la permesita spaco, tial mi menciu ankoraŭ nur unu kontribuaĵon, tiun de Hugo Röllinger: Esperanto- kaj Zamenhof-objektoj. Ĝi estas elstare ĝisfunda kaj zorge prilaborita statistiko 56 paĝa pri stratoj, placoj ktp. nomitaj en la mondo pri Esperanto, Zamenhof aŭ aliaj elstaraj esperantistoj. Ĝi estas modela scienca laboraĵo, kaj samtempe utilega konsultverko por praktikaj agantoj.

Resume: per tiu ĉi dua volumo de Serta Gratvlatoria in Honorem Juan Régulo la Esperanta kulturo ricevis enorman kontribuon. Juan Régulo, kiu dediĉis grandan parton de sia vivo al la servado de la Esperanta kulturo, nun per tiu ĉi volumo inde kronis sian imponan vivoverkon. Meritas nian estimon kaj dankon ankaŭ la Universitato de La Laguna, kiu grandanime ebligis kaj financis la eldonon de tiu ĉi ĉefverko esprantologia.

Vilmos Benczik



AŬDACA LIBRO DULINGVA

Bildlibro pri la seksaj manieroj

En la Esperantan mondon venis nova libro.

Nova libro, kiu surkovrile portas nur hungarlingvan titolon, sed kies internaj paĝoj estas dulingvaj, kaj la teksto akompanas 77 ilustraĵoj.

Nova libro, ŝajne aŭdacaj ĉapitroj, tamen ne kun tre novaj sentoj. Tiu aŭdaca temo ja ne estis komplete ignorata en nia literaturo. Almenaŭ ne en nia beletro, kies eminentuloj delonge penetris — ho, nenia aludo! — en la profunde humanan terenon de la erotiko. Aŭ, se diri aliforme: niaj poetoj kaj poetinoj ofte elane priskribis emociojn korpajn kaj voluptajn el la senfine komplika homa sfero, pri la seksa vivo. En Esperantujo, samkiel en ĉiu kulturo, la *amo*, — kies ne cedemaj *radoj* svingas la individuojn ravitajn, for al antaŭe eble ne imagitaj ŝtupoj, al *amoraj* travivaĵoj, jen mildaj, jen sovaĝemaj, — ricevas indajn esprimojn de artistoj, bildigajn kaj vortajn. „Obscenaĵojn", kiel diras ofte pudoruloj, kiuj obstine kutimis(?) hipokrite neadi la ekziston de tiu homa afero, silentigi ties artan esprimadon — kompreneble nur kun provizoraj sukcesoj. Kvankam kio efektive koruptis kaj malmoraligis homojn, estis ĝuste la trudita kaŝado, subpremo de la instinktaj voluptoj kaj ne-rifuzeblaj inklinoj akiri amorajn emociojn.

Ĉio ĉi nuntempe estas jam sufiĉe konata kaj ĝenerale aprobata de seriozaj homoj; pri tio ni devas nek honti, nek plendi antaŭ la ne-esperantista publiko.

Sed nun venis libro, kiu ne estas beletra, tamen ĝi traktas abunde kaj bildserie la seksan vivon, eĉ ne en la senco medicina. *Iaspeca faklibro* ĝi tamen prezentiĝas, ĉar laŭ intenco de la aŭtoro — renoma seksologo — tiu verko volas instrui, aŭ pli ĝuste: klerigi junulojn kaj ne-jam-junulojn *por paŝi al pli altaj ŝtupoj de la kontentiga, pli perfekta seksa vivo.* Terure grava afero! Plenrajte eblas diri: por tre-tre multaj homoj! Ja, oni bezonas serioze konceptitajn, science ĝustajn *konsilojn* por sia seksa vivo, feliĉigajn por si kaj por la partnero samtempe. Psikajn problemojn, geedzecajn zorgojn eviti ne facilas. Ni, ĉiuj, de la praarbara naturo jam delonge fremdiĝintaj geviroj, denaske malhavas instinkton por vere ĝuste kaj konvene prezenti, kaj doni la efektive necesan kaj bezonatan al la partnero, kiu suferas cetere la saman mankon...

„La du gekunuloj interbrakumas kaj kisadas; iliaj manoj ekiras al „esplora vojo" — kvankam tradicie la viro iniciatas, nuntempe ankaŭ ŝi rajtas... — klarigas la aŭtoro en unu ĉapitro el la sepdek sep; kaj poste li daŭrigas: — Dum la manoj vagabondas, ili interkisadas, ridetas... sed necesas atenti, la vagabondaj manoj ne estu „trudemaj", ĝenaj por la alia... mildaj kaj delikataj estu la karesoj ĉu tra la vesto, ĉu sub la vesto... oni atentu do la signalojn de la partnero... ĉu estas agrable aŭ malpli... foje la reago estas malcerta, do retiriĝu..." — kaj tiel pli, tra multaj amoradaj formoj, helpantaj krei laŭplaĉan, fantaziriĉan ludon akceptatan de ambaŭ. Delikatan kaj taktoplenan amoradon sugestas desegnoj kaj teksto, el kiuj — eble kurioze por iuj — mankas ajna esprimado volupta aŭ sentimentala. Legu trankvile, praktiku entuziasme laŭ via karaktero.

Kaj fine interesa cifero pri tiu ĉi libro: ĝi estis eldonita en 246.000 ekzempleroj, kaj tio verŝsajne estas rekordo en la historio de la Esperanta eldonado. La plimulto de la ekzempleroj iros (fakte jam iris) al hungaraj neesperantistaj legantoj, kiuj renkontos en ĝi Esperantan tekston *funkciantan,* kaj tio certe favore influos ilian opinion pri la praktika uzebleco de Esperanto.

La fontpaĝo de la libro "Kulturo de la amo" portas nur hungarlingvan titolon, sed la internaj paĝoj estas dulingvaj





Du el la enkondukaj ilustraĵoj

RECENZOJ

Kantu kun Japanio!

La Granda Kantado, Red. Ŝin Niŝimoto. Nagoya: Grupo Ordikoj '86, 1986. 36p. 25,5cm. 17 kantoj, kun muziknotoj. Prezo: neindikita.

Estas kutimo, ke al muzikaj kasedoj aldoniĝas nura tekstokajero. Sed nun kuŝas antaŭ la recenzanto kompleta kantaro kun muziknotoj, kvankam ankaŭ ĝi nomas sin aldonkajero al iu kasedo, kiu ĝis nun bedaŭrinde ne prezentiĝis – almenaŭ por la recenzanto. Estas do bonŝance, ke la kajereto konvenas eĉ kiel memstara verko, alie ĉi recenzo nuñ ne estus legata de Vi.

El la 17 kantoj 12 havas 10 komponistojn, 5 estas popolkantoj el diversaj regionoj de la lando. La kajeron kompletigas enbindita maposkizo, montranta la devenlokon de la kantoj. Menciindas, ke ĉiun kanton ilustras belaj desegnaĵoj – laŭbezone en ekspresionisma stilo.

Al la plimulto de la kantoj oni donis simplajn gitarakordojn. (Estus interese aŭskulti la originalan akompanon!) Tamen, ĉiuj kantoj estas facile kanteblaj, escepte unu popolkanton, kies melodio riĉe ornamiĝas – tiu eĉ ne bezonas akompanon. Tri aliaj popolkantoj havas tielnomatan „pentatonan" skalon – propra skalo de la antikva Oriento. La aliaj kantoj, verkitaj de komponistoj, estas kun melodioj konformaj al la Eŭropa muzika gusto. La plej orelkaresaj melodioj – laŭ mi – apartenas al la kantoj titolitaj „Rememoro pri somero", „Lulkanto de la vilaĝo Takeda" (ĉi-lasta estas popolkanto) kaj „Kanto sur plaĝo", kiun mi konas kun la titolo „La kanto de marbordo", do en alia traduko, el la Japana Kantaro, eldonita en 1957, de Amo-Akademio. Cetere ankaŭ kelkaj aliaj kantoj jam aperis kaj en la menciita kolekto, kaj en la trivoluma (laŭ mia kono) „De Kant' al Kant' al Kanto" (1972-1975). Tio estas komprenebla, ja la redaktinto skribas en la antaŭvortoj: (la kantoj) „...estas vaste kantataj tra la lando".

Kaj nun ni turnu atenton al la tekstoj. Antaŭ ĉio menciindas, ke la prozodio estas modela.

Inter la temoj troviĝas ekzemple la kvar sezonoj, la naturo, floroj, la paso de la tempo, la amo, vilaĝaj scenoj, do la vivo. Sed ankaŭ la morto, ja en la pasinto – eĉ en la proksima pasinto – Japanio ege multe suferis. Tiun ĉi temon ni renkontas en la kanto „Afrika infano", laŭ kies teksto malsata infano preĝas – ne por nura pano –, sed pro plena homa vivo („... deziris mi ...lerni, ludi kun ĝoj' "); kaj en la jam konata „Ho, la atombombon ne

lasu plu ni!". Tamen min plej emociis kaj la melodio kaj la teksto – poezio de la turka poeto Nazim Hikmet – de la kanto „Mortinta knabino". Laŭ ties teksto la animo de sesjara knabineto mortinta pro la atombombo, frapas ĉe la pordo de la hodiaŭaj vivuloj, kaj, rakontinte sian morton („Fariĝis mi nur malvarma cindro... kaj flugis tuj malproksimen sen spur' en la vent'..."), petas la homon: „...skribu vi vian nomon por la petici' ". (Temas pri internacia movado kontraŭ nukleaj armiloj.)

La kantaro pretiĝis por la pasintjara Pekina UK, kiu okazis en „La Jaro de Paco". Do inter la temoj ĉeestas la paco, la instigo al la plumarŝado malgraŭ la malfacilaĵoj, la espero, la Espero.

Perlo Miela

Poka, tamen ne men valora

Astura bukedo (Serio Hispana literaturo (,Eldonis Astura Esperanto-Asocio 1986. Tradukis Fernando de Diego, Jorge Camacho, Liven Dek, 11x18 cm. Paĝoj 138. Prezo neindikita.

Por ne kaprompi, *poka* signifas malmulta, kaj *men:* malpli. La libro konsistas el poemoj kaj rakontoj ĉ. sampaĝe. La *Enkonduko* verkita de *Alcibiades*, donas utilan trarigardon pri Asturio, iom da historio, geografio, produktado, industrio. La antologieto „celas konigi iom pri la astura literaturo pere de parto de la verko de kvin elstaraj verkistoj." Tri poetoj, du prozistoj, ĉiu kun sia portreto. Escepte unu, ili naskiĝis en la pasinta jarcento. Pri ĉiu verkisto troviĝas *kurta* (mallonga) biografio kaj kelkaj vortoj pri iliaj verkoj, stilo, agado. Post la tradukoj legiĝas Notoj, Glosoj, Klarigoj. Do, preciza laboro.

Poemoj. Ramón de *Campoamor:* „La trajno espresa" konsistas el tri kantoj. La aŭtoro renkontiĝas en trajno kun belega franca junulino forlasita de sia amato kaj nun: „mi iras lin forgesi, jaron solos." Dumvojaĝe li enamiĝas al ŝi; ili devos renkontiĝi en la sama stacio post unu jaro, sed anstataŭ ŝi olda damo, vestita nigre, transdonas al li leteron, kiu finiĝas: „ke vin mi amas... kaj la mort' jam venas."

Ramón *Pérez de Ayala* rolas per unu poemo, „Universala danco."

Angel *Gonzáles.* Laŭ la biografio „Lia poezia stilo estas rekta, senartifika, spontana. Liaj poemoj reliefigas malkontenton kontraŭ la mondo." El la poemo „Pruvo."

Mi pensas: vespero mortas
kaj mia mano skribas: vespero
mortas. Dio ekzistas.

Prozaĵoj. Armando *Palacio Valdés.* La temaro de liaj romanoj rilatas al la kamparana kaj fiŝkaptista medio. En la rakonto „La bobeloj", la komizo de ĉevalvendisto dum komerca vojaĝo mortigas sian mastron, enterigas la ŝtelitan monon kaj daŭrigas sian metion kaj riĉiĝas. Atestantoj mankis, do li ne estis kondamnita. Jen la lastaj vortoj de la agonianta mastro: „La bobeloj de la akvo estos atestantoj de ĉi..." Vere pro la bobeletoj de pluvo li finas sian vivon sur eŝafodo post jaroj. „En Peĉjo la bona" la rolanto estas ege malbona knabo, poste kiel viro, vera diablo. Tamen foje el la flamoj li sola savas tri infanojn, sed la kvaran li jam ne povas savi, ili ambaŭ mortas en la incendio.

Leopoldo *Alas (Clarín).* De li legeblas tri rakontoj. „La duopo de la tusoj", „Adiaŭ, Cordera!" (Nomo de la amata bovino) kaj „La kavaliro de la Tablo Ronda", kiu estas la plej longa. En hotelon Termas-Altas (ban-domo) oni venas por

saniĝi en la sanigaj akvoj. La gastoj ĉiam gajas, precipe, se ĉeestas la jam ne juna, la ĉiam bonhumora jup-ĉasulo, kiun en la vivo interesas nek la sufero de aliuloj, nek malsanuloj, orfoj, nur la facila, leĝera vivo. Iun matenon li ne aperas ĉe la komuna matenmanĝo, li malsanas. Kiu en la tuta vivo ĉiam estis en la centro de la societo, nun estas vizitata, helpata de oldulino, kiu iam *hatis* (malamis) lin pro lia vivmaniero, konduto, sed nun ŝi enamiĝis al la nun jam kaduka kavaliro.

Kvankam ĉiuj rakontoj finiĝas triste, en tri kun morto, tamen oni absolute ne sentas, ke ili estas malgajaj historioj. Venkas la justeco aŭ la vivo juĝas.

Oni volonte daŭrigus la legadon pro du kaŭzoj: la rakontoj estas enhave interesaj, havas belan stilon kaj la traduko estas flua, komprenebla kvankam... mi trovis ĉ. kvindek vortojn, kiujn ne ĉiuj tradukintoj uzas (Iltisa Skolo). Feliĉe por mi tiuj vortoj ne faris malfacilaĵon, ĉar tiujn mi jam renkontis kaj konas el aliaj lingvoj. Jen kelkaj: *poka, mava, hati, vanui, tarda, rori, nul, fola, mido, men, turpa, holmo, prato, desaponti, siero, silvo, rura, pieno*... (parte ili troviĝas en PIV). Mi ne ŝatas la superfluajn, novajn vortojn, ĉar ekzistas tre konvenaj, de la plimulto uzataj. Per tiuj Esperanto ne iĝas pli facila, pli bela, pli internacia (eble nur pli Eŭropa), pli rapide ellernebla ktp. Kelkaj ekzemploj: *mido*=tagmezo. Ĉu *mido* aŭ *poka* estas internaciaj vortoj kiel radio, telefono? Kaj se morgaŭ ankaŭ ne-Eŭropaj esperantistoj komencos riĉigi Esperanton per siaj vortoj, nu, tiam eble por tagmezo ni havos kvin vortojn. *Kontra*=kontraŭ, sed en la sama linio: kontra kaj ankoraŭ. Kial ne *ankora* aŭ *ankor*? Nul havas du signifojn: faru nul favoron kaj nul sciis tion. La lingva unueco, miaopinie, hodiaŭ jam nur en la baz-lernolibroj troviĝas.

Kelkaj aliaj rimarkoj:... ordonis min rigardi akvon. Laŭ PIV ordoni ion al iu (kuracisto ordonis al mi ripozon). Demandi al ŝi. Ĝuste, demandi iun pri io (PIV). Anstataŭ la duŝon. Kial ne nur duŝo? Ĉu ĉi tiuj estas nur negravaĵoj? Certe, almenaŭ laŭŝajne, sed ili tute ne pruvas la lingvan unuecon. „Ni imitu la stilon kaj vortuzon de niaj famaj verkistoj" – jen la tradicia konsilo por novaj verkistoj, tradukistoj. Bone, konsentite, sed se ili mem ne uzas unuece Esperanton, kion fari? (Ĉu fondi Zamenhofan Skolon?)

Tamen mi trankvilanime proponas la legadon de Astura Bukedo. Maksimume la leganto pli ofte konsultos PIV-on aŭ legos la Glosojn. Kaj la poemoj kaj la rakontoj distras la legemulojn, kiuj akiras iom da trarigardo pri la literaturo de la asturoj, „kiuj vivas sur 11,000 km^2, kie loĝas pli ol unu miliono da homoj."

Daŭrigo estas atendata.

István Nagy

Du jardekoj da laborista esperantismo en Hungario

Zoltán Barna: La laborista Esperanto-movado en Hungario (1913-1934). Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, 1986 (vere 1987). 20ö14 cm., 184 p. Prezo: 18,- gld. (Por Hungario: 75,- forintoj.) Tradukita el la hungara lingvo de Imre Szabó.

Fontoj

La Esperanta traduko de tiu øi libro, originale verkita hungarlingve kiel doktoricea disertacio, estas bonvena kontribuaŭo al la relative malgranda kolekto da detalaj historiaj studaŭoj pri la Esperanto-movado.
Pli ol dudek dense presitaj paĝoj da notoj fine de la verko atestas la riĉan materialon, kiun la aŭtoro utiligis por dokumenti sian historion. Inter la fontoj specife rilatantaj al la laborista Esperanto-movado en Hungario estas: raportaĵoj en laboristaj periodaĵoj; studaĵoj de kleruloj aperintaj en fakrevuoj aŭ publikigitaj libroforme kiel monografioj; protokoloj, raportoj kaj aliaj dokumentoj de politikaj partioj kaj sindikatoj; oficialaj registaraj, parlamentaj kaj administrejaj aktoj; diversspeca materialo deponita en arkivejoj; publikigitaj kaj nepublikigitaj rememoroj kaj kolektaĵoj de partoprenintoj en la laborista Esperanto-movado en Hungario. Cetere, Zoltán Barna ĉerpis informojn el ĝeneralaj verkoj pri la historio de Hungario kaj ĝia labormovado dum la periodoj pritraktitaj en lia libro. La plejmulto de tiuj fontoj estas ekstermovadaj, t.e. ilin verkis aŭ pretigis oficialaj instancoj aŭ kvazaŭ-oficialaj organizaĵoj. Ili tuŝas demandojn pri la disvolviĝo kaj agado de laboristaj Esperanto-grupoj jen preterpasante, jen ĉefteme. Konsultitaj ankaŭ estis alilande eldonitaj esperantlingvaj verkoj, okupiĝantaj pri la agado kaj organizado de laboristoj en la Esperanto-komunumo ekde la plej fruaj manifestiĝoj.
Estas bedaŭrinde, ke tiu abundo da bibliografia materialo aperas nur en la formo de ĉapitraj notoj, ĉar tio malfaciligas serĉadon de specifaj verkoj kaj aŭtoroj. Estus estinta multe pli utila aranĝo de tiuj referencoj en aparta laŭalfabeta bibliografio. Imitinda modelo estas la 52-paĝa „Bibliografia Indekso" en Historio de la Esperanto-Movado en Ĉeĥoslovakio(1), kiu registras ĉiujn publikigaĵojn (a) cititajn en la verko, (b) ligitajn al la temo de la libro, kaj (c) havantajn rilaton kun personoj menciitaj en la teksto.

Kronologia aranĝo de la enhavo

Reliefigante, ke la laborista Esperanto-movado en Hungario evoluis diversmaniere konforme al la ĝenerala politika klimato en la lando, Zoltán Barna dividis sian historion en la sekvajn periodojn, kiuj formas la ok øapitrojn de la libro.
1. Œis 1914: Œenerala superrigardo de la evoluo de la internacia Esperanto-movado œis 1914.
2. 1902-1915: Organizado de esperantistoj en Hungario. La fenomeno de disduiceo de la Esperanto-movado en du antagonismajn grupojn – unuflanke la neùtrala/burœa/intelektula movado kaj aliflanke la laborista/klasbatala/socialisma movado. Fondiceo de Hungarlanda Esperantista Societo Laborista (HESL) en 1913.
3. 1918-1919: La Esperanto-movado dum la oktobra burœa demokratia revolucio kaj la Konsilantara REspubliko. Kunlaboro kun la neùtrala Hungarlanda Esperanto-Societo (HES).
4. 1919-1939: Disvolviceo de la agado de laboristaj esperantistoj dum la kriza periodo inter la du mondmilitoj. Fondiceo de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT). Intensiceo de politikumado en la hungara laborista Esperanto-movado kaj pli eksplicita rifuzo de la konceptoj de la neùtrala Esperanto-movado.
5. 1919-1923: la laborista Esperanto-movado en Hungario dum la kontraùrevolucio. Persekutado, reorganizado de HESL. Kunlaboro kun la „burœaj" esperantistoj daùras.
6. 1924-1929: Diversiceo de la agadoj de HESL: propagando, lingvoinstruado, bibliotekoj, libroeldonado, kontaktoj kun sindikatoj kaj aliaj laboristaj organizaÿoj. Rilatoj inter progresemaj „burœoj" en HES kaj laboristoj en HESL.

7. 1924-1930: Aktivado de komunistoj en la vicoj de HESL kun la celo politike organizi la laboristajn esperantistojn.
8. 1930-1934: Malforticeo de la laborista Esperanto-movado pro la tutmonda ekonomia krizo. Daùra politikumado. Persekutado fare de la hungara registaro. Malfondo de HESL.

Suplementoj

Sep suplementoj prezentas informojn pri la fondiceo de 30 lokaj grupoj de HESL, liston de membroj de la Centra Gvidantaro kaj statistikajn donitaŭojn pri la membronombro de la grupoj, la profesioj de la anoj, propaganda agado, lingvokursoj kaj korespondado de la Centra Gvidantaro. Mankas suplementoj temantaj pri la sekvaj gravaj temoj:
A/ Listo de øiuj mallongigoj, kaj Esperantaj kaj hungaraj, kun iliaj signifoj. Jam en la „Enkonduko" aperas la enigmaj sigloj HPK kaj HSDP sen iu ajn klarigo, kaj sur unu sola paceo (97) legantoj estas regalitaj per jena alfabet-supo: KLS, LGS, TSN, HESL, HPK, HAKJ kaj HSDP. Cetere, HESL estas la siglo de du diversaj organizaŭoj: Hungaria Esperantista Societo Laborista (p. 20) kaj Hungarlanda Esperantista Societo Laborista (p. 21)
B/ Listo de øiuj gravaj personoj rolantaj en la historio de la hungara laborista Esperanto-movado kune kun koncizaj biografiaj informoj. Ankoraùfoje mi mencias la verkon pri la historio de la Esperanto-movado en eñoslovakio[1] kies „Indekso de Personoj" listigas øiujn homojn pritraktitajn en la teksto kun naskiĉdato, eventuale mortdato, kaj ankaù pace-referencoj.
C/ Informoj pri nomšanceoj kun laùalfabeta listo de la originalaj nomoj kaj la hungarigitaj nomoj. Tiaj donitaŭoj troviceas dise en la teksto nur por kelkaj personoj; mankas, ekzemple, la familiaj nomoj Berceli kaj Tiborc, la hungarigitaj versioj de la nomoj de Béla Bleier kaj Zsigmond Tieder respektive. Sur p. 144 peras la nomo Payor kaj sekvapacee estas menciita Peyer. u temas pri du nomoj de la sama persono, aù øu ni havas aferon tie øi kun komposteraro?
D/ Malfaciligas rapidan kaj daùran konsultadon de tiu øi verko la manko de œenerala indekso, enhavanta øiujn person- kaj loknomojn, nomojn de organizaŭoj, kaj plej gravajn temojn.
E/ Tre utila estus bibliografio de øiuj verkoj publikigitaj de HESL inter 1913-1934 kaj ankaù listo de importitaj libroj. HESL-grupoj pagis siajn šuldojn per librovendado en Hungario kaj ankaù al eksterlandaj organizaŭoj, do estus interese scii, kiujn verkojn legis la laboristoj. Komparu la librolistojn publikigitajn en Historio de SAT (p. 143-145)[2]. La tabelo sur p. 77 sciigas pri libroj posedataj de grupoj de HESL en la jaroj 1924-1929 kaj la nombro de ekzempleroj legitaj (aù almenaù depruntitaj), sed ne estas detala informo pri la titoloj aù klasifo de tiuj libroj krom aludo, ke en la bibliotekoj estis hungarlingvaj kaj Esperantaj beletraj verkoj kaj ankaù politikaj libroj.

La terminoj „laboristo" kaj „intelektulo"

u estas œustaj la kontrastaj terminoj „laboristo" kaj „intelektulo" por klasifi la du polusajn elementojn en la disduiceinta Esperanto-movado? Ne estas klara difino de „intelektulo" en la teksto por indiki, kial œi estas sinonimo de „neùtrala" kaj „burcea". Eø estis intelektuloj en HESL laù Suplemento n-ro 3 (pœ. 173). Mi rimarkis, ke esprimoj kiel „intelektula societo" kaj „intelektula movado" estas uzataj precipe en la unuaj øapitroj de la libro; poste la adjektivoj „neùtrala" kaj plej ofte „burcea" anstataùas „intelektula". u la kialo estas, ke dum la tempo, kiam ekzistis kunlaboraj rilatoj inter la laborista kaj la neùtrala movadoj en Hungario, la aùtoro eùfemisme uzas „intelektula", sed poste, kiam firme kristaliceis la ideologia sinteno de la laboristoj, kaj opozicio inter la du grupoj fariceis pli akra, la antaùaj „intelektuloj" ricevis la epiteton „burcea", eventuale kun pejorativa nuanco?

Lingvonivelo de la laboristaj esperantistoj

Krom politikaj demandoj, gravas ankaù scio pri la grado de alproprigo kaj uzado de Esperanto fare de membroj de la hungara laborista Esperanto-movado. Suplemento n-ro 5, titolita „La lingvokursoj de HESL inter 1924-1929", informas statistike pri bazaj, mezgradaj kaj superaj kursoj. Estas ciferoj pri la kursoj kaj kursanoj øe la komencicoe de la instruado, sed ne eblas scii pri la nombro de kursoj, kiuj poste estis nuligitaj aù kiuj fiaskis, kaj pri la nombro de kursforlasintoj. Bedaùrinde, ne estas kompletaj la statistikaj donitaŭoj pri partoprenantoj en mezgradaj kaj superaj kursoj. Proksimuma kalkulado surbaze de tiuj mankhavaj informoj indikas, ke nur unu el cent komencantoj sukcesis fini la superan kurson. Sur p. 73 kaj sekv. estas konfirmo pri la difalo de multaj kursoj. La plej grava kialo estis manko de kompetentaj instruantoj, kaj por plenumi la instrulaboron HESL estis devigata peti helpon de la instruantoj de HES.

La mankanta 9-a ĉapitro

Mankas la 9-a øapitro de la libro, kiu devus temi ne tiom pri kronikado, kiel la unuaj ok øapitroj, kiom pri teoria analizo de la socia kaj kultura rolo de laboristaj Esperantistoj en la tuta Esperanto-movado. i-rilate estas necese fari komparon kun la sorto de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT). Tiu øi organizaŭo ne ricevis laùdajn vortojn de Zoltán Barna, øar li malsamopinias kun la ideologio de la fondinto de SAT, E. Lanti, kaj malfavore rigardas la agadon de la sennaciistoj. Tamen, SAT sukcesis œisvivi malgraù øiuspecaj internaj skismoj kaj eksteraj persekutoj kaj kreis organizan kaj kulturan tradicion, kiuj lasis spurojn aliloke en la Esperanto-komunumo. Eble adapticeo kaj kunekzistado kun la neùtrala movado parte klarigas tiun disvolviceon. Kontraùe, en la historio de HESL la breøo inter œi kaj la neùtrala movado daùre plivasticeis. Poste, HESL perdis la apogon de sia protekta organizaŭo, la Hungarlanda Socialdemokrata Partio (HSDP), kaj de la enlandaj sindikatoj. Fine, pli intensiceanta politikumado preparis la vojon por œia likvido. Kie, do, estas la postlasaŭo de HESL?

Lingvouzo

Kiel kutime, ankaù tiu øi eldonaŭo de HEA enhavas komposterarojn, sed estus enuige kaj sensence listigi øiujn en recenzo. Tamen, atentigenda estas la nomo „Renée Descartes" sur p. 8, øar la fama filozofo portas virinan voknomon anstataù la œusta „René". Ankoraù unu ekzemplo de fuša kompostado troviceas sur p. 103. Post la lasta vortparto sur p. 102 oni devas daùrigi la legadon øe la tria alineo de la sekva pacœo œis la fino kaj poste supreniri al la unua frazo sur tiu pacœo.
Inter la gramatikaj eraroj estas pekoj kontraŭ la uzo de la akuzativo kaj la refleksivo. Plurfoje verboj havas superfluan transitivan aŭ netransitivan sufikson: „li kabeiĝis" (p. 27) devas esti „li kabeis". Male, la sufikso povas manki, kiam ĝi estas bezonata: „kio rezultis plian akriĝon" (p. 43) devas esti „kio rezultigis plian akriĝon".
Ekzemplo de semantika eraro estas la uzo de „stacio" anstataŭ „stadio" en jena frazo: „La sekva stacio en la evoluo de la movado..." (p. 11). Tre ofta eraro en la teksto estas la uzo de la adjektivo „soveta" anstataŭ „sovetia".
Inter la hungarismoj, okulfrapa estas la misuzo de „respektive" tra la tuta verko pro sklaveca traduko de la hungara vorto illetve. Ankoraŭ unu misinfluo de la hungara lingvo estas la uzo de „sukcesi" sen subjekto (hungare sikerül) kiel en jena ekzemplo: „Ne sukcesis atingi rezultojn sur la kampo de la lingvoinstruado" (p. 60). Kiu aŭ kio ne sukcesis atingi la rezultojn? Obskura frazo en Esperanto estas: „Ili ĉiuj donacis monon por la fonduso de flagnajlo" (p. 57). En tiu kunteksto „flagnajlo" (zászlószeg) ne estas komprenebla por nehungaroj.
Inter la stilaj malglataĵoj, la plej ofta esta la uzo de vortordo, kiu ne spegulas la internacian Esperanton. Tiu difekto rezultas de la kutimo pensi hungare kaj skribi Esperante.

Notoj

1. Stanislav KAMARYT. Historio de la Esperanto-Movado en Ĉeñoslovakio. Praha: Ĉeña Esperanta-Asocio; 1983. 251 p.

2. Historio de S.A.T. 1921-199952. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda; 1953. 152 p.

Gloso

pejorativa – (pri vorto, nomo aŭ afikso) malestimiga, mallaŭda, insulta

Bernard Golden



GAJA PAĜO



Sincera preleganto

La klubprezidanto post la aplaŭdo dankis la eminentan gastpreleganton „pro la interesa prezentado". Li modeste klinis sin, kaj ekvoĉis: — Mi petas pardonon de la publiko, se eventuale mi uzis Esperantajn vortojn dum mia prelego.

Sincera aktoro

— Atentu Rudolfo — diras la reĝisoro al aktoro — , en nia sekvonta dramo vi ludos la rolon de bonkorulo tre helpema.

— Domaĝe, ĉefo, mi ne povas akcepti tian rolon, ĉar ĝi estas tute fremda al mi...

Sincera paciento

— Bonvolu do diri, kio doloras al vi?

— Hoho! Plej unue ni devas zorgi pri vi, doktoro! Vi aspektas ja tro pala...

Eĉ la knabo!

— Panjo kara, mi volonte kredas al vi, ke la cikonio alportas la infanojn. Sed aŭskultu: mi diras al vi kelkajn pikantaĵojn pri la antaŭ cikoniaj okazaĵoj...

Ĉu esti sincera?

Ho, karulinjo, kial vi vangofrapis min? — miregas la novedzeto.

— Hontu! Eĉ dum la nupta nokto viaj pensoj direktiĝas al seksaj plezuroj!

Foje nepre!

— Kredu al mi, kara najbarino, ke mia bofilo vere amas min.

— Gratulon, sinjorino. Kiel vi rimarkis tion?

— Nu, kiam mi venis al ilia loĝejo, li diris: — Nur vi mankis ĉi tie!

Laŭvorte

— Sed mia solsola, vi eĉ ne imagas, kiel arde mi amas vin...

— Kial mi ne scius? Ja mia mono ĉiam degelas en via mano.

Ne heredebla?

— Via fileto lernas bone — aŭdas la patro fiere la instruistajn vortojn. — Sed strange, li kapablas mensogadi eĉ seninterrompe...

— Tre surprize ankaŭ al mi — hontas la patro jam malfiere. — Ĉar hejme li ne povas lerni tion, mia edzino ja ne estas mensogema, kaj mi tuttage ne revenas hejmen.

Ĉu vere ne?

La diplomaton nokte vekas lia fileto: — Paĉjo, mi soifas!

— Dormu! — rekrias la patro, sed la fileto ripetas. Vane. Kiam triafoje la knabo krias, la patro jam koleregas:

— Unu vorton pli, kaj mi batos vin!

— Se vi venos min bati, paĉjo, alportu ankaŭ iom da akvo!

Kuri-ero

La eta Miĉjo frapas la pordon de la najbaro, kiu plezure aŭskultas lin: — Panjo sendis min, oĉjo, diri, ke paĉjo forveturis fiŝkapti.

— Dankon, fileto!

— Sed mi devas ankaŭ tion diri, ke mi ludos en la korto per sablo!

Pravas!

Oni intervjuas la plejaĝulon de la lando, la 120-jaran blankbarbulon.

— Rakontu jam, altestimata oĉjo, kiel vi atingis tiun grandiozan aĝon? — demandas ĵurnalistoj.

— Kiel, kiel? Pacience, karuloj, pacience...

Ne kalumniu hundon!

La ĉefo ne kredas al siaj okuloj. La ĉiam ĝentila librotenisto Paŭlo staras antaŭ li, sed...

— Kio okazis Paŭlo? Vi aspektas ege skrapita, kvazaŭ iu malfeliĉa tigroĉasisto!

— Tute ne gravas. Hieraŭ mi tro malfrue venis hejmen, kaj mia hundo ne rekonis min pro la malhelo, ĝi atakis min...

— Strange! Miaflanke, mi tuj eksedziĝus de tia hundo!

Alitage

— Vi trafis erare nian ambulancon, sinjoro. Tie ĉi ni kuracas virinajn dolorojn.

— Ĝuste tial mi venis, doktoro! Min doloras mia edzino.

Sed poste

— Jam sufiĉe! Amiko, mi eksiĝos de mia edzino. Jam depost ses monatoj ŝi ne parolas al mi.

— Kara mia! Pripensu bone: tian vi longe ne trovos!

Statistiko

— Mi legis en statistika verko, ke el dek geedziĝoj nur unu fariĝas sukcesa. Ĉu tio eblas?

— Mi ne povas scii tion, ĉar mi nur kvarfoje edziĝis...

Kaj tiuj viroj

— Ĉu vi havas minuton por mi, sinjorino? — sonas la kriọ el luksa aŭto.

— Nu, bone. Ĉu mi ensidu...?

— Ne necesas, nur bonvolu iom puŝi tiun ĉi damnitan ĉaron...

Eĉ en maljunulejo

— Nu, aveto, kiel vi fartas tie?

— Grandioze, ja la ĉambro, la provizado konvenas. Tamen la sinjorinoj povus esti pli junaj, eble je tridek jaroj.

Ervin *Fenyvesi*

DISTRAJ LIBROJ

Nia enigmo enhavas 5 titolojn de plezurigaj libroj eldonitaj de HEA (ensendendaj). Inter la solvantoj ni lotumos premiojn. Limdato: du monatoj post la alveno de la revuo.

HORIZONTALE: 1. Poemkolekto por infanoj, 9. Romano de István Nemere, 10. Organo de mamulinoj, 11. Enigi pinton ien (R), 12. Infekta malsan', 13. Malzenito, 15. Senpene, 17. Meritplenan, 10. Siberio — ruse, 20. Patro de patro (R), 22. Havas scion pri io, 24. Demandvorto, 25. Tre malofta (R), 27. Brila globeto formiĝanta en konkoj, 29. Blanketa vizaĝo, reeen, 31. Neoriginala, reproduktita, 32. Malgrandiga sufikso, 33. Fabelpoemo de Petőfi, plurfoje eldonita, 36. FJ, 37. Karesema, milde amema (R), 38. Reen: vigle rapidigi, 39. Kavaĵo en montoj, 41. Danca kunveno, 43. Delikata agat', 46. Legomo senvokala, 47. Gasoj tiel nevideble elvaporiĝas, 49. Publika parolanto, 51. Adverbo por daŭrigi, 58. Senflugila okgamba bestet', 59. Reen: interjekcio, 60. Romano de Zsigmond Móricz.

VERTIKALE: 1. Kolektaĵo por infanoj (de Elek Benedek), 2. Japana poemform: 3. Kun K: prepari pastonl 4. Konsumi brandon (R), 5. Ili preteras riveron, 6. Silenta tirfermilol, 7. Reen: abomeninda, 8. Reen: blasfemi (R), 9. Blanka floro, simbolo de pureco, 12. Dika osto de kruro, 14. Ano — miksate, 16. Kartvela poeto, E-isto (kontribuis al hungarigo de eposo de Rustaveli), 18. Franca imperiestro, 21. Intermontejoj, 23. Ezoliĝo de geedzoj (R), 26. Reen: korpa kovraĵ', 28. Arbet' de acidetaj beroj, 30. Kiel protektanto, 31. Skriba kalkulo pri negocaj ŝuldoj, 32. Soŋĝ' — mikse, 34. Nova — scienclingve, 35. Eĉ sučinfano havas, 39. Malraspa, 40. Sankta koleopter' de l' faraonoj, 42. Dio de amo, 44. Parto de birdol 45. Malpli bone ol sidi, 46. Brančaro (R), 48. Disrompi terbulojn, 50. Dekgamba (bongusta) markrustulo (R), 52. Instrumente, 54. Kiel V. 34., 57. Hom'.

I. Z.

Solvo de la krucenigmo en la numero 1987/5:
„Rigardos vin kun ĝoj' en la okuloj,
vin, eŭropanon inter blankhaŭtuloj."



(Attila József, trad. Lajos Tárkony)

Premion gajnis per lotumado: J.V. HAERING, Stechovice, CS; HEGEDŰS Imre, Debrecen, H; Julia REDLIH, Tomsk, SU. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

EKZAMENO SEN RISKO

Ekzamenanto: Márton Fejes

Adiaŭ, Kuzko!
de Oldrich Kníchal

Tiu ĉi movplena romano prezentas la movadan kaj privatan vivon de Sud-Amerikaj revoluciuloj dum la sesdekaj jaroj.

1. Kio estis la privojaĝa maksimo de Ernesto?
2. Pri kio temis lia doktoriĝa disertaĵo?
3. Kian rangon havis Alberto Bayo en la hispana respublikana armeo?

Limdato: du monatoj post la alveno de la revuo.

Solvoj de la demandoj en la n-ro 1987/5:

1. „Kvardek tagoj de Musa Dagh" de Fr. Werfel.
2. La atencinto estas Agamir.
3. La titolo devenas el Azia fabelo, legita iam de Lilla. („Serĉu mian soŋĝon" de István Nemere)

Premion gajnis per lotumado: Antanas *Krenceviĉius*, Vilnius, Litovio, SU; Manfred *Trenne*, Magdeburg, GDR.

La verkoj de la sekvaj ekzamenoj:

1988/3: „Adolesko" de Blazio Vaha; 1988/4: „Mistera lumo" de Julian Modest; 1988/5: „Terra" de István Nemere; 1988/6: „D-ro Braun vivas en ni — Kripto" de Julian Modest.

LETERKESTO

S-ino Ines Kraus. Leipzig, GDR: Se vi jam tradukis en la germanan „Laŭra" el la premiitaj verkoj de la Belartaj Konkursoj, ni rekomendas trovi publikigeblon, ĝi vere meritas tion. Nia „eksperimento" per ilia aperigo en H.V. montriĝis bonvena al multaj, tion vi trafe rimarkis, do ni klopodos aŭtune ripeti tion. Ŝajnas atentinda via averto, ke malgrandajn literojn ni ne uzu ĉe fakaj artikoloj, nur por beletraĵoj.

Tradukemaj gejunuloj en Aŝhabad, SU: Kun intereso ni legis vian deziron: traduki en la rusan pere de E-aj „krudaj" (sublinie laŭvortaj) tradukaĵoj diverslingvajn poemojn kaj novelojn. Kvankam ni ne estas certaj pri la tiel riceveblaj valoroj — la estiĝontaj internaciaj kunlaboroj kun alilingvaj gejunuloj — kiujn vi celas — kreos sendube agrablan kaj utilan lingvan-literaturan spertadon reciproke. Por informi la interesiĝantojn, jen via leteradreso: s-ro Akopian A.M., Aŝhabad, ul. Surikova 21-1-18, SU-744.028.

Ferdinand Simon, Bruselo, B: Kun ĝojo vi informas pri renoviĝo de la interrilatoj de E-naturistoj, kaj pri reapero de ilia ligilo, Naturista Vivo. Al tiu brava agado ni povas esprimi nur bondezirojn, por disvastigi la E-kontaktojn ankaŭ en tiu forte kreskanta homa medio kun sukceso!

Viktor Arolović, Moskvo, SU: Rememorante la entuziasman kaj ĉarman personecon de prof. Szerdahelyi, vi ĝustigas la daton, kiun d-ro Máthé skribis en la nekrologo (H.V. 1987/5): liaj eksterlandaj prelegoj komenciĝis jam en februaro de 1968 — do ne en 1970 — kion pruvas la universitata gazeto „Moskovskij Universitet" de la 19a de marto 1968. Akceptu koran dankon ankaŭ pro la samtempa foto!

Grzegorz Ciemny, Bydgoszcz, PL: Okazas foje, ke presejo klopodas plenumi ion elstaran por la publiko — kaj tio okazis feliĉe por la jubilea UK: la 4a numero de H.V. estis jam tie akirebla en certa kvanto, kiam la tuta amaso de ĝiaj ekzempleroj ankoraŭ ne estis preta por dissendi al la abonantoj. Post kelkaj semajnoj ili ricevis nian revuon, ankaŭ vi (se ni bone komprenis vian skribon tra lupeo). La limdato de la respondoj/solvoj validas laŭ la alveno en la Eŭropaj landoj, fakte preskaŭ samtempe.

Teodoro Kulagin, Moskvo, SU: Nia redakcio plenkore dankas viajn riĉe varmajn Novjarajn bondezirojn — ni povas nur promesi realigi ilin en la redaktado de via ŝatata revuo! Kaj ĉar ni eksciis, ke dum februaro vi atingis la altan aĝon de 90 jaroj — esperantisto dum 74 jaroj! — akceptu de ni plej sincerajn gratulojn kun profunda respekto, kiun meritas fidela kaj tiel agema, nelacigebla samideano kia vi estas!

Korespondi deziras

F-ino Malgorzata Zmuda (19) lernantino, pri literaturo, folkloro, turismo, kol. bk, pm. Debica ul. Tuwima 5/43. PL-39.200. — Andrzej Szczerbowski (23) konstruisto, pri naturo, folkloro, skiado, turismo montara, interŝ. bk turismajn. Czechowice-Dz. ul. Górnicza 340m9, PL-43.323. — Ludwig Schödl, pri div. temoj, Neuruppin Rosa Luxemburg Str. 37. DDR-1950. — Lernantoj el Klajpeda, Litovio SU-235.822. ktm, pĉt, kol. bk, kalendaretoj: Saŝa Jemeljanov (11) Simonajtites str. 23-95, kaj Ruslan Bolgov (13) Simonajtites str. 9-1387. — S-ino Wanda Knobloch serĉas informojn pri similnomaj familioj el tm, (Knoblauch, Knoblich k.s.) por prilaborota familia historio kaj familia E-klubo.

Wroclaw 2. skr. poczt. 312, PL-50-950. — F-ino Kordula Hassel, (18) pĉt. Zarrentin DDR-2824. — Tornisto Bronowski Tadeusz (28) pri literaturo, folkloro, turismo, kol. libroj, bk, diapoz. Bledzew Os. Piaskowe 2B/4, PL-66-350. — Ekonomikisto Tomasz Próchniak (26) akvaristo pri literaturo, muziko, filatelo, ornitologio, geografio. Wawelno, PL-89-413. — F-ino Wenke Oldorp (18) pĉt, Schwerin H. Wenzel Str. 13. DDR-2760. — S-ino Sylvi Oraviita (55) ktm. Oulu, Kipparintie 7, SF-90520, Finnlando. — Mariusz Komoszewski (19) kun hungaroj k.a. pri astronomio, geografio, japana kulturo, ankaŭ junularo, poezio, k.a.Olsztyn Wyszynskiego 26/136, PL-10-457. — F-ino Cornelia Deubler (19) ktm, Anklam Gellendiner Weg 23 C, DDR-2140. — F-ino Mészáros Anita kun 14-jaraj gelernantoj. Nagykálló Damjanich út 2. H-4320. — Lernanto Denis Poljanskij (13) pĉt, kol. pm. Celabinsk ul. Kurĉatov 8-60, SU-454.092. — F-ino Franka Seer (18) ktm, Schwerin R. Koch Str. 13, DDR-2756. — Instruisto Lucjan Kolodziejski (25) pri fotado, literaturo, turismo. Borzecin Dolny 374, PL-32-825. — Lernantino Markéta Baliaková (11) kun samaĝuloj, interŝ. pm, k.a. markojn. Ostrava-Poruba, Alšovo nám. 691/4, CS-708-00. — Japanaj lernantinoj (10) kun hungaraj lernantinoj. Kakegawa, urbo, Shizuoka-ken Japanio: Junko Miyazawa (622-14 Nagaya); Rika Suzuki (16-8 Kubor Ichome). — F-ino Antje Schwartz (18) pĉt. Wolgast Diesterweg 5, DDR-2220. — Fi-no Jana Panwitz (18) pĉt, ktm, Feldberg Alter Landweg 18. DDR-2082. — Lernantino Edyta Urtnowska (14) ktm, Swiecie ul. 10-Lutego 13/1, PL-86-100. — Lernanto Johano Mochalo (14) pri sporto k.a. kol. pm, bk, moneroj. Bytom Odrzenski ul. Nowe Miasto 6, PL-67-115. — Lernantino Marzena Niemira (18) pri muziko, danco, turismo, kol. pm, bk. Lochów ul. Szkolna 6. internat. PL-07-130. — F-ino Diana Tschauschewe (19) Berlin Gleimstr. 11. DDR-1058. — Zbigniew Malyszko (50) abelisto kaj ĉinĉilobredisto, int. pri fotoarto, literaturo, verkado. Bialystok Zajecza 17, PL-15-531. — Jerzy Gralak (40) ktm pri naturismo. Warszawa al. Waszyngtona 37m76. PL-04-015. — F-ino Liane Kermbach (18) pĉt, Kleinmachnow Eichenweg 5, DDR-1532. — Emil Timm ktm, pĉt, Kyritz, O. Grothewohl Str. 3a, DDR-1910.

Ĝustigo

En la rakonto „La ŝuldo" en HV 87/6 elfalis tri linioj sube de la dua alineo, gravaj ne nur por la tuja kunteksto, sed ankaŭ por la rakonto-fino. La ĝusta teksto estas:

„...Sed vi devos plenskribi multajn formularojn, kaj doni al mi du fotojn" — ne havas kapgesto — „...ne gravas, farigu kelkajn ĉe aŭtomato ĉirkaŭ la angulo; per tio mi post iom da monatoj da eŭrozumado ricevos de la francoj la pagon."
„Mi tre dankas, sinjoro..."

E HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO * Ĉefredaktoro: Vilmos Benczik * Redakta Komitato: Szilárd Bálint, Stefan McGill, Tibor Bessenyei, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, d-ro György Nanovfszky, Péter András Rados, Sándor Révész, Zsuzsa Varga-Haszonits. * Ĉefkunlaborantoj: Mihály Gergely, Alfons Pechan, Aurél Ponori-Thewrewk * H-1368 Budapest, pk. 193. Telefono: 563-659, 564-093. Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. * Respondeca eldonanto: Oszkár Princz. * Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (HELIR, Budapest XIII. Lehel u. 10/a. H-1900) senpere aŭ per poŝtmandato. * Abonprezo por jaro (ses numeroj) 11,- USD aŭ egalvalora sumo en alia valuto. *
Indexszám: 25 377 0018-7704, ISSN 0018-7704.

ESTU NIA GASTO!

En la bierejo GÖSSER „Krigli"en Makó

Tel:(65) 12·764

Per altnivela priservo ni staras je la dispono de niaj gastoj



VIZITU NIN EN DEPARTEMENTO KOMÁROM!

Vi povos pasigi agrable vian libertempon
en niaj bone ekipitaj kampadejoj kaj familiecaj ripozdomoj.
Ni atendas Vin kun variaj programoj!



komturist









Estu nia gasto en Tata, Komárom, Esztergom.



1988 AUG 24

Pli detalajn informojn petu ĉe:

Centro KOMTURIST, Telefono: 34/81-855